

Tiktoko DE OZ



De L. Frank Baum

N E T R A N S I R E B

LANDO

GILLIK

LANDO DE LA

MANGTULOJ

Kie la Domo de Doroŝo Fali

Yala, Elvaj, Brikaj

Kolegio de Profesoro Sancel-Inckio

Fino Trankvilo

Batalantaj

Peckanpuzlo

LANDO DE L

ARBARO


OMENLANDO

Magia Akvotalo

Palaco de Glinda la Bona

S
A
N
Ĝ
I
Ĝ
A
N
T
A
J
S
A
B
L
O
J


G R A N D A S A B



LA DEZERTO

DE LA
UJOJ

UGABUO



• Fia Sorĉistino

LANDO DE LA

Joĉjo
Kukurbokapo

Palaco de la
Stana Lignohakisto

PALPBRUMOJ

• Turo de la
Birdotirigilo

LAGO

• Anuŝtimuloj

• Galimatio

• Totenhotoj

• Manĝilio

• Sano Jup

Parcelana

Kornuloj

• Simuloj

• Lando • Bulkio

• Kanikio

Arboj

Montetoj

AKVELULOJ

MONTOJ

VED
LAGO

JIPOJ

MORRIGATA

MAPO DE LA
EKSTERORDINARA LANDO OZ
Desegnita de Profesoro Ŝancel-Insekto P.E.

LA DEZERTO



A
Ci tiu Libro
APARTENAS AL



Tiktoko^{DE} 



TIKTOKO DE OZ

DE

L. FRANK BAUM

AŬTORO DE

LA VOJO AL OZ, DOROTEO KAJ LA SORĈISTO EN OZ, LA
SMERALDA URBO DE OZ, LA LANDO OZ, OZMA
DE OZ, LA MIKSĈIFONA KNABINO DE OZ




ILUSTRITA DE

JOHN R. NEILL

TRADUKITA DE

DONALD BROADRIBB



Tiktoko de Oz
 De Baum, L. Frank (Lyman Frank), 1856–1919
 Ilustrita de Neill, John R. (John Rea), 1877–1943
 Tradukita el la angla al esperanto de Broadribb, Donald
 (Donald Richard), 1933–
 Unue eldonita en la angla kiel *Tik-Tok of Oz* de Reilly &
 Britton, 1914.
 Unue eldonita en Esperanto de Bookleaf Publishing, 1996.
 Ĉi tiu traduko kopirajta © 1996 Donald Broadribb.
 Ĉi tiu eldono de Books Reborn, julio 2002,
 ISBN 1-877051-07-1. Vidu <http://www.books-reborn.org/>

La ilustraĵoj kaj aranĝo de ĉi tiu eldono laŭeble plej konformas al tiuj de la originala angla eldono de 1914. La litertipo estas 14 sur 18 pkt Elegant Garamond.

National Library of Australia Cataloguing-in-Publication entry:

Baum, L. Frank (Lyman Frank), 1856-1919.
 [Tik Tok of Oz. Esperanto]
 Tiktoko de Oz.

New ed.
 For children.
 ISBN 1 877051 07 1.

I. Neill, John R. (John Rea). II. Title.

813.4



Al
Louis F. Gottschalk,
kies dolĉaj kaj delikataj melodioj
elspiras la veran spiriton de
felando,
ĉi tiu libro estas ame dediĉita



AL MIAJ LEGANTOJ



LA vere rimarkinda sukceso de mia felibro de la pasinta jaro, “La Mikscifona Knabino de Oz,” konvinkas min ke miaj legantoj “pleje” amas la Oz-rakontojn, laŭ la letero de unu knabineto skribinta al mi. Do jen, karaj, nova Oz-rakonto en kiu koniĝas Kaj Ceter, la Reĝino de Ugabuo, kiun Tiktoko helpis konkeri nian jaman konaton, la Reĝon de la Knomoj. Ĝi ankaŭ rakontas pri Betinjo Bobin kaj kiel, post multaj aventuroj, ŝi fine atingis la eksterordinaran Landon Oz.

Ekzistas dramo titolita “La Tiktoka Viro de Oz,” sed ĝi ne similas ĉi tiun rakonton “Tiktoko de Oz,” kvankam kelkaj el la

aventuroj raportitaj en ĉi tiu libro, kaj ankaŭ tiuj en pluraj aliaj libroj pri Oz, estas parto de la dramo. Personoj vidintaj la dramon kaj personoj legintaj la aliajn Oz-librojn trovos en ĉi tiu rakonto multajn strangajn rolantojn kaj aventurojn pri kiuj ili antaŭe ne aŭdis.

En la leteroj kiujn mi ricevas de infanoj estas urĝa peto ke mi verku rakonton kiu kondukos Troton kaj Kap'tanon Vilĉjon al la Lando Oz, kie ili renkontos Doroteon kaj Ozman. Ankaŭ ili opinias ke Buton-Brilo devus konatiĝi kun Oĝo la Bonfortuna. Kiel vi scias, mi devas diskuti tiajn aferojn kun Doroteo per la “sendrata,” ĉar nur per ĝi mi povas komuniki kun la Lando Oz. Kiam mi demandis al ŝi pri la ideo, ŝi respondis: “Nu, ĉu vi ne informiĝis?” Mi diris “Ne.” “Nu,” diris la mesaĝo per la sendrata, “mi parolos al vi pri ĝi, iam, kaj vi povos fari libron el tiu rakonto kiun la infanoj povos legi.”

Do, se Doroteo plenumos sian promeson kaj mi permesiĝos verki plian Oz-libron, verŝajne vi trovos kiel tiuj uloj renkontis unu la alian en la fama Smeralda Urbo. Intertempe, mi volas diri al ĉiuj miaj malgrandaj amikoj—kies kvanto pligrandiĝas per multaj miloj ĉiujare—ke mi multe dankas pro ilia amo al miaj libroj kaj pro la tre plaĉaj leteretoj kiujn mi konstante ricevas. Mi estas preskaŭ certa ke mi havas tiom da amikoj inter la infanoj de Usono kiel iu alia vivanta verkisto; kaj tio, kompreneble, multe fierigas kaj feliĉigas min.


L. FRANK BAUM.


“OZCOT”
ĉe HOLLYWOOD
en KALIFORNIO,
1914.



LISTO DE ĈAPITROJ

ĈAPITRO	PAGŬO
1—La Kohorto de Kaj	13
2—Unue Ugabuo	24
3—Magio Mistifikas la Marŝantojn	28
4—Betinjo Brave Boatas	39
5—La Rozoj Repelas la Rifuĝantojn	42
6—Vilulo Vokas Veni	48
7—La Priplendinda Pozicio de Polikromo	65
8—Tiktoko Trovas Teruran Taskon	78
9—La Rabio de Rugedo Ruĝe Radias	92
10—Tra Terura Tubo	107
11—La Fama Fratularo de Feoj	120
12—La Senkompara Sinjorino de la Suverenlumo	129
13—La Jinjino Juste Juĝas	136
14—La Longorela Aŭskultanto Lernas	149
15—La Drako Defias Dangĝeron	159
16—La Kaprica Knomo	168
17—Tragika Transformo	177
18—Lerta Liberigo	193
19—Reĝo Kalikot	202
20—Drako Delikate Demisias	213
21—Falsmodesta Frato	221
22—Komplezaj Kisoj	233
23—Rugedo Reformiĝas	245
24—Doroteo Delicas	251
25—La Am-Areo	263







ĈAPITRO 1

La Kohorto de Kaj

“MI rifuzas!” kriis Kaj; “mi rifuzas balai la plankon. Estas maldigne.”

“Tu devas balai ĝin,” respondis la pli juna fratino de Kaj, Salnje; “se ne, ni baldaŭ vados en polvo. Kaj vi estas la plej aĝa, kaj la estro de la familio.”

“Mi estas la Reĝino de Ugabuo,” diris Kaj, fiere. “Sed,” ŝi pludiris ĝemante, “mia Reĝlando estas la plej malgranda kaj plej malriĉa en la tuta Lando Oz.”

Tio estis tute vera. Tre for en la montaro, en malproksima angulo de la bela felando Oz, kuŝas malgranda valo nomata Ugabuo, kaj en tiu valo loĝis kelkaj personoj kiuj estis kutime feliĉaj kaj kontentaj kaj neniam ĉesis vagadi trans la

Tiktoko de Oz

trairejon inter la montoj en la pli loĝatajn partojn de la lando. Ili sciis ke la tuta Oz, inkluzive de ilia propra teritorio, estas regata de bela Princino nomata Ozma, kiu loĝas en la belega Smeralda Urbo; sed la simpla popolo de Ugabuo neniam vizitis Ozman. Ili havis propran reĝan familion—ne precipe por regi ilin sed nur kiel fierindaĵon. Ozma permesis ke la diversaj partoj de ŝia lando havu proprajn Reĝojn kaj Reĝinojn kaj Imperiestrojn ktp, sed ĉiujn regis la bela knabina Reĝino de la Smeralda Urbo.

La Reĝo de Ugabuo iam estis viro nomata Ĵol Ĵemkif Ceter, kiu dum multaj jaroj faris la tutan laboregon juĝi disputojn kaj diri al sia popolo kiam venis la sezono por planti brasikojn kaj pekli cepojn. Sed la edzino de la Reĝo havis akran langon kaj malmultan respekton al la Reĝo, sia edzo; sekve unu nokton Reĝo Ĵol kaŝe sekvis la vojon inter la montoj en la Landon Oz kaj malaperis por ĉiam de Ugabuo. La Reĝino dum kelkaj jaroj atendis lian revenon kaj poste komencis serĉi lin, lasante sian plejaĝan filinon, Kaj Ceter, kiel agantan Reĝinon.

Nu, Kaj ne forgesis la datrevenon de sia naskiĝtago, ĉar ĝi signifis feston kaj festenon kaj dancadon, sed ŝi ja plene forgesis kiom da jaroj signifas tiuj datrevenoj. En lando kie oni vivas eterne, oni ne supozas tian forgeson kaŭzo por bedaŭro, do ni prave rajtas diri ke Reĝino Kaj de Ugabuo estis sufiĉe aĝa por fari konfitaĵon—kaj ne pli ĝeni nin pri ŝia aĝo.

Ĉapitro Unu

Sed ŝi ne faris konfitaĵon, aŭ pli da endoma laboro ol estis neevitebla. Ŝi estis ambiciulo kaj konstante malplezuriĝis pro la fakto ke ŝia Reĝlando estas tiom malgranda kaj ŝia popolo tiom stulta kaj neentreprenema. Ofte ŝi demandis al si kio okazis al ŝiaj patro kaj patrino, tre for preter la trairejo, en la mirinda Lando Oz, kaj ilia nereveno suspektigis Kajon ke ili trovis pli bonan loĝlokon. Do, kiam Salnje rifuzis balai la plankon de la salono en la palaco, kaj Kaj ankaŭ rifuzis balai ĝin, ŝi diris al sia fratino:

“Mi foriros. Ĉi tiu absurda Regno Ugabuo tedas min.”

“Foriru se tion vi volas,” respondis Salnje; “sed estus tre malsaĝe foriri de ĉi tie.”

“Kial?” demandis Kaj.

“Ĉar en la Lando Oz, kiu estas la lando de Ozma, vi estos neniuj, sed ĉi tie vi estas Reĝino.”

“Ho, jes! Reĝino de dekok viroj, dudek sep virinoj kaj kvardek kvar infanoj!” respondis Kaj amare.

“Nu, certe estas pli da homoj en la granda Lando Oz,” ridis Salnje. “Kial ne estigi armeon kaj konkeri ilin kaj esti Reĝino de la tuta Oz?” ŝi demandis, dezirante moki Kajon kaj tiel kolerigi ŝin. Post tio ŝi fimienis al sia fratino kaj iris en la malantaŭan ĝardenon por swingi sin en la hamako.

Tiktoko de Oz

Ŝiaj mokvortoj, tamen, estigis ideon en Reĝino Kaj. Ŝi enmensigis ke Oz laŭdire estas pacema lando kaj ke Ozma estas nur knabino kiu regas ĉiujn mildmaniere kaj estas obeata ĉar ŝia popolo amas ŝin. Eĉ en Ugabuo oni rakontis ke la ununura armeo de Oz konsistas el dudek sep belaj oficiroj, kiuj portas belajn uniformojn sed neniujn armilojn, ĉar ekzistas neniu kontraŭbatalinda. Iam ekzistis ordinara soldato, krom la oficiroj, sed Ozma promociis lin al Kapitan-Generalo kaj forprenis lian pafilon ĉar ŝi timis ke akcidente ĝi vundos personon.

Ju pli Kaj pripensis tion des pli ŝi konvinkiĝis ke estus facile konkeri la Landon Oz kaj fari sin Reĝino anstataŭ Ozma, se ŝi havus Armeon por efektiviĝi tion. Poste ŝi povus eliri en la mondon kaj konkeri aliajn landojn, kaj post tio eble ŝi povus trovi rimedon iri al la luno kaj konkeri ĝin. Ŝi havis militeman spiriton kiu preferas problemojn ol senagadon.

Ĉio dependas de Armeo, Kaj decidis. Ŝi zorge kalkulis enmense ĉiuj viroj de sia regno. Jes: precize dek ok, ensume. Ili ne konsistigus tre grandan Armeon, sed se ili surprizus la nearmitajn oficirojn de Ozma ŝiaj viroj povus facile venki ilin. “Mildaj personoj ĉiam timas tempestemajn,” Kaj diris al si. “Mi ne volas elfluigi sangon, ĉar tio ŝokus miajn nervojn kaj mi eble svenus; sed se ni minacos kaj montros niajn armilojn mi estas

Ĉapitro Unu

certa ke la popolo de Oz surgenuiĝos antaŭ mi kaj cedos.”

Tiu argumento, kiun ŝi ripetis al si pli ol unufoje, fine decidigis la Reĝinon de Ugabuo efektivi la aŭdacan entreprenon.

“Negrave kio okazos,” ŝi pensis, “ĝi ne malfeliĉigos min pli ol resti fermita en ĉi tiun mizeran valon kaj balai plankojn kaj kvereli kun mia fratino Salnje; do mi vetos ĉion, kaj gajnos kio ajn venos.”

Tiun tagon mem ŝi komencis organizi sian Armeon.

Ŝi renkontis unue Joĉjon Pomon, kiu estis tiel nomata ĉar li posedis pomarbaron.

“Joĉjo,” diris Kaj, “mi intencas konkeri la mondon, kaj mi volas ke vi aniĝu al mia Armeo.”

“Ne petu min fari tian stultaĵon, ĉar mi devos ĝentile rifuzi, Via Moŝto,” diris Joĉjo Pomo.

“Mi tute ne petos vin. Mi ordonas vin, kiel Reĝino de Ugabuo,” diris Kaj.

“Tiuokaze, mi supozas ke mi devas obei,” la viro komentis malfeliĉavoĉe. “Sed mi petas ke vi konsideru ke mi estas tre grava civitano, do mi rajtas havi altrangan oficon.”

“Vi estos Generalo,” promesis Kaj.

“Kun oraj epoletoj kaj glavo?” li demandis.

“Kompreneble,” diris la Reĝino.

Tiktoko de Oz

Poste ŝi trovis la duan viron, kies nomo estis Joĉjo Bulko, ĉar li posedis arbaron sur kies arboj kreskis sekalaj kaj tritikaj bulkoj, varmaj kaj malvarmaj.

“Joĉjo,” diris Kaj, “mi konkeros la mondon, kaj mi ordonas ke vi aniĝu al mia Armeo.”

“Neeble!” li kriis. “Necesas rikolti la bulkojn.”

“Viaj edzino kaj infanoj rikoltu,” diris Kaj.

“Sed mi estas tre grava viro, Via Moŝto,” li protestis.

“Pro tio vi estos unu el miaj Generaloj, kaj sur via kapo vi portos trikornan ĉapelon kun ora brokato, kaj frizos viajn lipharojn kaj tintigos longan glavon,” ŝi promesis.

Do li konsentis, kvankam ege malvolonte, kaj la Reĝino plumarŝis al la sekva dometo. Tie loĝis Joĉjo Vafleto, tiel nomita ĉar la arboj en lia arbaro kreskigis bonegajn glaciaĵ-vafletojn.

“Joĉjo,” diris Kaj, “mi konkeros la mondon, kaj vi devas aniĝi al mia Armeo.”

“Bonvolu pardoni min,” diris Joĉjo Vafleto. “Mi estas malbona batalisto. Mia bona edzino konkeris min antaŭ jaroj, ĉar ŝi batalas pli bone ol mi. Prenu ŝin, Via Moŝto, anstataŭ min, kaj mi benos vin pro tiu komplezo.”

“Mia Armeo devas konsisti el viroj—ferocaj, fortegaj batalistoj,” deklaris Kaj, rigardante severe la malgrandan mildaspektan viron.

Ĉapitro Unu

“Kaj vi postlasos mian edzinon ĉi tie en Ugabuo?” li demandis.

“Jes, kaj vi estos Generalo.”

“Mi akceptas,” diris Joĉjo Vafleto, kaj Kaj pluiris al la dometo de Joĉjo Horloĝo, kiu havis horloĝarbaron. Tiu viro unue insistis ke ne li aniĝos al la armeo, sed ĉar Reĝino Kaj promesis Generaligi lin li fine konsentis.

“Kiom da Generaloj estas en via armeo?” li demandis.

“Kvar, ĝis nun,” respondis Kaj.

“Kaj kiom granda estos la armeo?” estis lia sekva demando.

“Mi intencas anigi ĉiun el la dek ok viroj en Ugabuo,” ŝi diris.

“Do kvar Generaloj sufiĉas,” anoncis Joĉjo Horloĝo. “Mi konsilas ke la restantaj viroj estu koloneloj.”

Kaj provis obei lian konsilon. La sekvajn kvar virojn vizititajn—Joĉjo Pruno, Joĉjo Ovo, Joĉjo Banĝo, kaj Joĉjo Fromaĝo, nomitaj pro siaj arbaroj—ŝi faris Koloneloj de sia regno; sed la kvina, Joĉjo Najloj, diris ke Koloneloj kaj Generaloj fariĝas multe tro oftaj en la Armeo de Ugabuo kaj ke li preferas estiĝi Majoro. Do Joĉjo Najloj, Joĉjo Kuko, Joĉjo Ŝinko kaj Joĉjo Ŝtrumpoj ĉiuj fariĝis Majoroj, kaj la sekvaj kvar—Joĉjo Sandviĉo, Joĉjo Seruro, Joĉjo Glaciaĵo kaj Joĉjo Butonoj—nomumiĝis Kapitanoj de la Armeo.

Sed nun la Reĝino perpleksiĝis. Restis nur du pliaj viroj

Tiktoko de Oz

en la tuta Ugabuo, kaj se ŝi farus ilin Leŭtenantoj, dum la aliaj estas kvar Kapitanoj, kvar Majoroj, kvar Koloneloj kaj kvar Generaloj, verŝajne estus ĵaluzo en la armeo, kaj eble ribelo kaj dizertoj.

Sed unu el tiuj viroj estas Joĉjo Bombonoj, kaj li tute rifuzis partopreni. Neniu promeso tentis lin, neniu minaco influis lin. Li diris ke li devas resti hejme por rikolti vanilajn, limonajn, ĉokoladajn, kaj kremajn bombonojn. Ankaŭ necesas tondi kaj draŝi la kampojn da krakmaizo-kun-sukero kaj buterumita krakmaizo, kaj li insistas ne trompi la esperon de la infanoj de Ugabuo per foriro por konkeri la mondon tiel lasante la sukeraĵ-rikolton pere.

Trovinte Joĉjon Bombonojn tiom obstina, Reĝino Kaj decidis cedi al li kaj ŝi daŭrigis sian veturon al la domo de la dekoka kaj lasta viro en Ugabuo, kiu estis junulo nomata Joĉjo Fajliloj. Tiu Fajliloj havis dek du arbojn kiuj kreskigis ŝtalajn fajlilojn diversspecajn; sed li ankaŭ havis naŭ librarbojn, sur kiuj kreskis bela sortimento de rakontolibroj. Povas esti ke vi neniam vidis librojn kreski sur arboj, do mi klarigos ke tiuj en la arbaro de Joĉjo Fajliloj estis kovritaj de larĝaj verdaj folioj kiuj, kiam plenumaturaj, fariĝis malhelruĝaj. Tiam oni rikoltis la librojn, deprenis la foliojn kaj ili estis legopretaj. Se oni rikoltis ilin tro frue, la rakontoj montriĝis tro konfuzitaj kaj malinteresaj kaj kun fuŝa literumado. Tamen, se oni lasis ilin perfekte maturiĝi, la rakontoj estis bonegaj legaĵoj kaj la



Tiktoko de Oz

literumado kaj la gramatika uzado perfektaj.

Fajliloj libere disdonis siajn librojn al ĉiu deziranto, sed la popolo de Ugabuo malmulte ŝatis librojn do li devis mem legi la plejparton, antaŭ ol ili putris. Ĉar vi verŝajne scias ke tuj kiam oni legas la librojn la vortoj malaperas kaj la folioj velkas kaj fadas—la plej grava difekto de libroj kiuj kreskas sur arboj.

Kiam Reĝino Kaj parolis al tiu junulo Fajliloj, kiu estis kaj inteligenta kaj ambicia, li diris opinii ke estus amuzege konkeri la mondon. Sed li atentigis ŝin ke li estas multe supera al la aliaj viroj en ŝia armeo. Sekve, li rifuzas esti unu el ŝiaj Generaloj aŭ Koloneloj aŭ Majoroj aŭ Kapitanoj, sed li pretendas la honoron esti la sola Ordinara Soldato.

Al Kaj tute ne plaĉis tiu ideo.


“Mi malvolas Ordinaran Soldaton en mia armeo,” ŝi diris; “ili estas tre vulgare. Oni diris al mi ke iam Princino Ozma havis ordinaran soldaton, sed ŝi faris el li Kapitan-Generalon, kio bone pruvas ke la ordinara soldato ne estis necesa.”

“La armeo de Ozma ne batalas,” respondis Fajliloj, “sed via armeo devos furioze batali por konkeri la mondon. Mi legis en miaj libroj ke ĉiam la ordinaraj soldatoj batalas, ĉar neniu oficiro estas sufiĉe kuraĝa por fronti la malamikojn. Ankaŭ, estas logike ke viaj oficiroj devas havi komandon al kiu ili povas doni ordonojn; do mi estos tiu. Mi sopiregas tranĉi kaj mortigi la malamikojn kaj fariĝi heroo. Poste, kiam ni revenos al Ugabuo, mi prenos ĉiujn

Ĉapitro Unu

ludglobojn de la infanoj kaj fandos ilin kaj faros statuon pri mi por ke ĉiuj rigardu kaj admiru ĝin.”

Al Kaj multe plaĉis Ordinarulo Fajliloj. Li ja ŝajnis esti batalisto kian ŝi bezonis por sia entrepreno, kaj ŝia espero sukcesi eksaltis kiam Fajliloj diris al ŝi ke li scias kie kreskas pafilarbo, kaj ke li tuj iros al ĝi kaj plukos la plej maturan kaj grandan musketon kiu kreskas sur la arbo.





ĈAPITRO 2

Unue Ugabuo

TRI tagojn poste la Granda Armeo de Ugabuo grupiĝis en la placo antaŭ la reĝa palaco. La dek ses oficiroj estis vestitaj per belegaj uniformoj kaj portis akrajn, brilantajn glavojn. La Ordinara Soldato plukis sian pafilon kaj, kvankam ĝi ne estis tre granda armilo, Fajliloj strebis aspekti feroce kaj tiom sukcesis ke ĉiuj liaj komandantaj oficiroj sekrete timis lin.

La virinoj ĉeestis, protestante ke Reĝino Kaj Ceter ne rajtas forpreni iliajn edzojn kaj patrojn; sed Kaj ordonis ke ili silentu, kaj ili neniam ricevis pli malfacilan ordonon.

La Reĝino aperis antaŭ sia Armeo vestite per impona



Tiktoko de Oz

verda uniformo, kovrita per ora brokato. Sur sia kapo ŝi portis verdan soldatoĉapon en kiu estis purpura plumo, kaj ŝi aspektis tiom reĝine kaj digne ke ĉiu en Ugabuo ĝojis ke ŝi foriras—escepte de la Armeo. La Armeo bedaŭris ke ŝi ne foriras sola.

“Faru vicojn!” ŝi kriis per sia akra voĉo.

Salnje rigardis tra la fenestro de la palaco kaj ridis.

“Mi kredas ke via Armeo povas pli bone kuri ol batali,” ŝi komentis.

“Kompreneble,” respondis Generalo Bulko, fiere. “Ni ne serĉas konflikton, sciu, nur kaptaĵojn. Ju pli da kaptaĵoj kaj ju malpli da batalado, des pli ni ĝuos nian laboron.”

“Rilate al mi,” diris Fajliloj, “mi multe preferas militon kaj mortigon. Oni fariĝas heroo nur per konkerado, kaj la rakontolibroj senescepte diras ke oni plej facile konkeras per batalado.”

“Precize tiel, mia bravulo!” konsentis Kaj. “Batali signifas konkeri kaj konkeri signifas akiri kaptaĵojn kaj akiri kaptaĵojn signifas fariĝi heroo. Apogate per tia nobla firma decidemo la mondo apartenos al mi! Adiaŭ, Salnje. Kiam ni revenos ni estos riĉaj kaj famaj. Venu, Generaloj; ni marŝu.”

Je tio la Generaloj rektigis sin kaj etendis siajn brustojn. Post tio ili svingis siajn brilantajn glavojn laŭ rapidaj cirkloj kaj kriis al la Koloneloj:

Ĉapitro Du

“An-taŭ-en Marŝu!”

Post tio la Koloneloj kriis al la Majoroj: “An-taŭ-en Marŝu!” kaj la Majoroj kriis al la Kapitanoj: “An-taŭ-en Marŝu!” kaj la Kapitanoj kriegis al la Ordinara Soldato:

“An-taŭ-en Marŝu!”

Do Fajliloj surŝultrigis sian pafilon kaj komencis marŝi, kaj ĉiuj oficiroj sekvis lin. Reĝino Kaj venis la lasta, ĝuante sian noblan armeon kaj demandante al si kial ŝi ne antaŭ longe decidis konkeri la mondon.

Laŭ tiu ordo la procesio marŝis el Ugabuo tra la mallarĝa vojo kondukanta inter la montoj en la belan Felandon Oz.





ĈAPITRO 3

Magio Mistifikas la Marŝantojn

PRINCINO OZMA tute ne konsciis ke la Armeo de Ugabuo, estrate de sia ambicia Reĝino, firme intencas konkeri ŝian Reĝlandon. La bela knabina Reganto de Oz okupadis sin pri la bonstato de siaj regatoj kaj ne havis tempon por pensi pri Kaj Ceter kaj ŝiaj mallojalaj planoj. Sed unu persono konstante gardadis la pacon kaj feliĉon de la Lando Oz, tiu persono estis la Oficiala Sorĉistino de la Reĝlando, Glinda la Bona.

En sia belega kastelo, kiu situas tre distance sude de la Smeralda Urbo kie Ozma havas sian kortegon, Glinda posedas mirindan magian Arkivo-Libron, en kiu presiĝas ĉiu evento kiu okazas ie ajn, tuj kiam ĝi okazas.

Ĉapitro Tri

La plej malgravaj kaj la plej gravaj eventoj ĉiuj troviĝas en tiu libro. Kiam infano piedbatas la plankon, Glinda legas pri tio; kiam urbo brulas, Glinda trovas tiun fakton notita en la libro.

La Sorĉistino ĉiam legas sian Arkivo-Libron ĉiutage, sekve ŝi sciis ke Kaj Ceter, Reĝino de Ugabuo, malsaĝe grupigis armeon de dek ses oficiroj kaj unu ordinara soldato, kiun ŝi intencas uzi por invadi kaj konkeri la Landon Oz.

Ne ekzistis dubo pri tio ke Ozma, apogate de la magiaj artoj de Glinda la Bona kaj la potenca Sorĉisto de Oz—ambaŭ estis bonaj amikoj ŝiaj—povus facile venki multe pli imponan armeon ol tiun de Kaj; sed estus domaĝe se interrompus la pacon de Oz iaspeca kverelado aŭ batalado. Do Glinda eĉ ne menciis la aferon al Ozma, aŭ al iu alia. Ŝi nur eniris grandan ĉambron de sia kastelo, nomatan la Ĉambron de Magio, kie ŝi faris magian riton kiu kaŭzis ke la intermonta vojo kondukanta de Ugabuo sin turnu plurfoje kaj tute malrekte konduku. La rezulto estis ke kiam Kaj kaj ŝia armeo atingis la finon de la trairejo ili ne estis en la Lando Oz sed en apuda teritorio kiu estis plene distingita disde la regno de Ozma kaj apartigita forde Oz per nevidebla bariero.

Kiam la Ugabuanoj eliris en tiun landon, la trairejo trairitita ekmalaperis malantaŭ ili kaj ne estis verŝajne ke

Tiktoko de Oz

ili iam povos retrovi la vojon al la Ugabua valo. Ilin vere tre perpleksis la pejzaĝo kaj ili ne sciis kiudirekten iri. Neniu el ili iam vizitis Ozon, do necesis multe da tempo por ke ili trovu ke ili ja ne estas en Oz sed en nekonata lando.

“Ne gravas,” diris Kaj, strebante kaŝi ke ŝiaj esperoj trompiĝis; “ni komencis konkeri la mondon, kaj jen parto de la mondo. Post iom da tempo, dum ni faros nian venkoplenan veturon, sendube ni trovos Ozon; sed, ĝis tiam, ni konkeru kiun ajn landon en kiu ni estas.”

“Ĉu ni konkeris ĉi tiun landon, Via Moŝto?” maltrankvile demandis Majoro Kuko.

“Certe,” diris Kaj. “Ni ankoraŭ ne renkontis homojn, sed kiam ni renkontos ilin, ni informos ilin ke ili estas niaj sklavoj.”

“Kaj poste ni rabos de ili ĉiujn iliajn posedaĵojn,” aldonis Generalo Pomo.

“Eble ili nenion posedos,” kontraŭis Soldato Faljliloj; “sed mi esperas ke ili batalos nin, malgraŭ tio. Paca konkero tute ne plezurigus.”

“Ne ĝenu vin,” diris la Reĝino. “Ni ja povos batali, ĉu aŭ ne batalos niaj malamikoj; kaj eble ni trovos ke estas pli komforte se la malamikoj cedas al ni rapide.”

La lando estis dezerta kaj veturado tie ne estis tre agrabla. Krome, estis malmulto manĝebla, kaj kiam la

Ĉapitro Tri

oficiroj malsatiĝis ili senpacienciĝis. Multaj dizertus se ili povus retrovi la vojon al sia hejmo, sed ĉar la Ugabuanoj nun estis senespere perditaj en nekonata lando ili opiniis ke estas pli sekure resti kune ol apartiĝi.

La humoro de Reĝino Kaj, neniam tre agrabla, fariĝis akra kaj kverelema dum ŝi kaj ŝia armeo marŝadis sur la rokoplajn vojoj sen renkonti aŭ homojn aŭ kaptatojn. Ŝi riproĉadis siajn oficirojn ĝis ili fariĝis koleremaj, kaj kelkaj el ili sufiĉe mallojalis por diri “ĉit!” al ŝi. Aliaj komencis riproĉi ŝin ĉar ŝi kondukis ilin al ĝenaĵoj kaj post tri malfeliĉaj tagoj ĉiu viro lamentis sian foreston de sia arbaro en la bela Ugabua valo.

Fajliloj, tamen, montriĝis diferenca. Ju pli da ĝenaĵoj li renkontis des pli gaja li fariĝis, kaj la ĝemojn de la oficiroj respondis gaja fajfado de la Soldato. Lia agrabla humoro multe kuraĝigis Reĝinon Kajon, kaj post nelonge ŝi konsultis la Ordinaran Soldaton multe pli ofte ol liajn superajn oficirojn.

Dum la tria tago de la marŝado ili renkontis sian unuan aventuron. Ĉirkaŭ la vesperiĝo la ĉielo subite malheliĝis kaj Majoro Najloj kriis:

“Nebulo proksimiĝas.”

“Mi kredas ke ĝi ne estas nebulo,” respondis Fajliloj, rigardante interesate la alproksimiĝantan nubon. “Ĝi aspektas pli simila al la spiro de Rako.”

Tiktoko de Oz

“Kio estas Rako?” demandis Kaj, ĉirkaŭrigardante timeme.

“Terura besto kun aĉa apetito,” respondis la soldato, fariĝante pli pala ol kutime. “Mi neniam vidis Rakon, estas vere, sed mi legis pri ili en la rakontolibroj kiuj kreskis en mia arbaro, kaj se ĉi tiu ja estas unu el tiuj timigaj monstroj, ni malverŝajne konkeros la mondon.”

Aŭdinte tion, la oficiroj tre maltrankviliĝis kaj pli dense grupiĝis ĉirkaŭ sian soldaton.

“Kia estas tiu besto?” demandis unu.

“Mi vidis nur unu bildon de Rako, kaj la bildo estis iom malklara,” diris Fajliloj, “ĉar la libro ne estis tute matura kiam mi plukis ĝin. Sed la besto povas flugi tra la aero kaj kuri kiel cervo kaj naĝi kiel fiŝo. Interne de ĝia korpo estas ardanta fajroforno, kaj la Rako enspiras aeron kaj elspiras fumon, kiu senlumigas la ĉirkaŭan ĉielon je distanco de kilometroj, kien ajn ĝi iras. Ĝi estas pli granda ol cent homoj kaj manĝas kian ajn vivantaĵon.”

La oficiroj nun komencis ĝemegi kaj tremi, sed Fajliloj strebis feliĉigi ilin dirante:

“Eble ni ja ne vidas aproksimiĝantan Rakon; kaj ne forgesu ke ni estas civitanoj de Ugabuo, kiu estas parto de la felando Oz, do ni ne estas mortigeblaj.”

“Malgraŭe,” diris Kapitano Butonoj, “se la Rako kaptos nin kaj dismaĉos nin kaj glutos nin—kio okazos?”

Ĉapitro Tri

“Ĉiu peceto restos vivanta,” deklaris Fajliloj.

“Mi ne komprenas kiel tio helpus nin,” ploregis Kolonelo Banĝo. “Hamburgro restas hamburgro ĉu aŭ ne ĝi vivas!”

“Mi ripetas, eble ĝi ne estas Rako,” persistis Fajliloj. “Ni scios, kiam la nuboj proksimiĝos, ĉu aŭ ne ĝi estas la spiro de Rako. Se ĝi tute ne odoros, verŝajne ĝi estos nebulo; sed se ĝi havos sal-kaj-pipran odoron, ĝi estos Rako kaj ni devos anticipi ĝisfinan batalon.”

Ĉiuj rigardis la malhelan nubon timoplene. Post nelonge ĝi atingis la timantan grupon kaj komencis ĉirkaŭi ilin. Ĉiu nazo flaris la nubon—kaj ĉiu perceptis en ĝi la odoron de salo-kaj-pipro.

“La Rako!” kriis Soldato Fajliloj, kaj ellasante senesperigante muĝon la dek ses oficiroj falis surteren, tordante sin kaj ĝemegante pro afliktiĝo. Reĝino Kaj sidiĝis sur rokon kaj frontis la nubon pli kuraĝe, kvankam ŝia koro batadis rapide. Kaj Fajliloj? Nu li trankvile ŝargis sian pafilon kaj staris preta batali la malamikon, kiel bonkondukta soldato.

Ilin nun kovris absoluta mallumo, ĉar la nuboj kovranta la ĉielon kaj la subigintan sunon estis nigra kiel inko. Subite tra la mallumo ekaperis du rondaj, ardantaj ruĝaj globoj, kaj Fajliloj tuj decidis ke sendube ili estas la okuloj de la monstro.

Li levis sian pafilon, celis kaj pafis.

Estis pluraj kugloj en la pafilo, ĉiuj estis plukitaj el

Tiktoko de Oz

bonega kuglarbo en Ugabuo, kaj ili estis grandaj kaj malmolaj. Ili flugis cele la monstron kaj atingis ĝin, kaj sovaĝe, kuriozege kriante la Rako ekfalas skuetante siajn flugilojn kaj ĝia giganta korpo falis rekte sur la formojn de la dek ses oficiroj, kiuj tiam ekkriegis pli laŭte ol antaŭe.

“Vel!” ĝemis la Rako. “Vidu kion vi faris per tiu danĝera pafilo via!”

“Mi ne povas vidi,” respondis Fajliloj, “ĉar la nuboj farita de via spiro senlumigas miajn okulojn!”

“Ne pretekstu ke estis akcidento,” pludiris la Rako, riproĉe, dum ĝi ankoraŭ skuetis siajn flugilojn senhelpe. “Ne pretendu ne sciinti ke la pafilo estis ŝargita, bonvolu!”

“Mi ne intencas diri tion,” respondis Fajliloj. “Ĉu la kugloj grave vundis vin?”

“Unu rompita mian makzelon, tiel ke mi ne povas malfermi mian buŝon. Rimarku ke mia voĉo sonas iom malglate kaj raŭke, ĉar mi devas paroli kun miaj dentoj firme kunfiksita. Alia kuglo rompita mian maldekstran flugilon, tiel ke mi ne povas flugi; kaj ankoraŭ alia rompita mian dekstran kruron, tiel ke mi ne povas marŝi. Mi neniam aŭdis pri pli mallerta pafo!”

“Ĉu vi povos levi vian korpon de miaj komandantaj oficiroj?” demandis Fajliloj. “Pro iliaj krioj mi suspektas ke via grandega pezo dispremas ilin.”

“Mi esperas ke ĝi dispremas ilin,” grumblis la Rako. “Mi



Tiktoko de Oz

volas dispremi ilin, se eble, ĉar mi estas malbonhumora. Se mi povus malfermi mian buŝon, mi manĝus vin ĉiujn, kvankam mia apetito suferas pro la varma vetero.”

Dirinte tion la Rako komencis ruli sian gigantan korpon flanken, por pli facile dispremi la oficirojn; sed farante tion ĝi rulis sin tute forde ili, kaj ĉiuj dek ses sukcesis surpiediĝi kaj forkuris laŭeble plej rapide.

Soldato Fajliloj ne povis vidi ilin forkuri sed li sciis per la sono de iliaj voĉoj ke ili eskapis, do li ĉesis maltrankvili pri ili.

“Bonvolu pardoni ke mi nun adiaŭos vin,” li diris al la Rako. “Necesas foriri ĉar ni deziras pluveturi. Se vi mortos, ne kulpigu min, ĉar mi devis pafi vin por protekti min.”

“Mi ne mortos,” respondis la monstro, “ĉar mi havas bonfortunan vivon. Sed mi petegas ke vi ne foriru de mi.”

“Kial?” demandis Fajliloj.

“Ĉar mia rompita makzelo resaniĝos post proksimume unu horo, kaj mi tiam povos manĝi vin. Mia flugilo resaniĝos post unu tago kaj mia kruro resaniĝos post unu semajno, kaj tiam mi estos tute sendifekta. Ĉar vi pafis min kaj tiel ĝenegis min, estas dece kaj juste ke vi restu ĉi tie kaj lasu ke mi manĝu vin tuj kiam mi povos malfermi miajn makzelojn.”

“Mi devas malkonsenti,” respondis la soldato firme. “Mi promesis al Reĝino Kaj de Ugabuo ke mi helpos ŝin

Ĉapitro Tri

konkeri la mondon, kaj mi ne rajtas nuligi promeson nur por ke Rako manĝu min.”

“Ho; mi komprenas,” diris la monstro. “Se vi promesis, mi ne malhelpu vin.”

Do Fajliloj ĉirkaŭpalpatis en la mallumo kaj prenis manon de la tremanta Reĝino, kiun li gvidis for de la batetanta, ĝemanta Rako. Ili stumblis pro la ŝtonoj sur parto de la vojo sed baldaŭ ili komencis malklare vidi la vojon antaŭ si, ju pli ili iris for de la timiga loko kie kuŝas la vundita monstro.

Post kelka tempo ili atingis malgrandan monteton kaj povis vidi la lastajn radiojn de la suno ilumini belan preteran valon, ĉar nun ili preterpasis la nuban spiron de la Rako. Tie kaŭris la dek ses oficiroj, ankoraŭ timantaj kaj anhelantaj pro sia kurado. Ili haltis nur ĉar ili tute ne povis pli kuri.

Reĝino Kaj severe riproĉis ilin pro ilia malkuraĝo, kaj samtempe laŭdis la kuraĝon de Fajliloj.

“Tamen, ni estas pli saĝaj ol li,” murmuris Generalo Horloĝo, “ĉar pro nia forkuro ni nun povos helpi Vian Moŝton konkeri la mondon; sed se Fajliloj estus manĝita, li dizertus vian Armeon.”

Post nelonga ripozo ili subeniris en la valon, kaj tuj kiam ili estis ekster la vidpovo de la Rako la humoro de la tuta grupo rapide altiĝis. Precize je krespuskiĝo ili

Tiktoko de Oz

atingis rivereton, sur kies bordoj Reĝino Kaj ordonis ke ili kampadu por la nokto.

Ĉiu oficiro kunportis en sia poŝo etan blankan tendon. Kiam ĝi estis metita sur la teron, ĝi rapide grandiĝis ĝis ĝi estis sufiĉe granda por ke la posedanto eniru ĝin kaj dormu inter ĝiaj kanvasaj muroj. Fajliloj devis porti dorsosakon, en kiu estis nur ne nur lia propra tendo sed ankaŭ kompleksa pavilono por Reĝino Kaj, plus lito kaj seĝo kaj magia tablo. Tiu tablo, metita sur la teron en la pavilono de Kaj, fariĝis giganta, kaj en tirkesto de la tablo estis la stoko de ekstraj vestoj, manprizorgiloj, tualetaĵoj kaj aliaj bezonaĵoj, de la Reĝino. La reĝa lito estis la sola lito en la kampejo; la oficiroj kaj la soldato dormis en hamakoj ligitaj al la tendostangoj.

En la dorsosako ankaŭ estis standardo sur kiu estis la reĝa emblemo de Ugabuo, kaj tiun standardon Fajliloj flirtigis de ĝia stango ĉiunokte, por montri ke la landon en kiu ili estas konkeris la Reĝino de Ugabuo. Ĝis nun nur ili mem vidis la standardon, sed al Kaj plaĉis vidi ĝin flirti en la venteto kaj ŝi opiniis sin jam fama konkeristo.



ĈAPITRO 4

Betinjo Brave Boatas

LA ondoj batis kaj la fulmo brilis kaj la tondro muĝis kaj la ŝipo frapiĝis kontraŭ rokon. Betinjo Bobin estis kuranta trans la ferdekon kaj la ŝoko flugigis ŝin tra la aero ĝis ŝi falis plaŭde en la malhele bluan akvon. La sama ŝoko kaptis Hanĉjon, maldikan malgrandan tristvizaĝan mulon, kaj ĵetis ankaŭ lin en la maron, tre for de la flanko de la ŝipo.

Kiam Betinjo alsurfaciĝis, anhelegante ĉar la malseka plonĝo senaverte trafis ŝin, ŝi etendis manon en la mallumo kaj kaptis aron da haroj. Unue ŝi kredis ke temas pri la fino de ŝnuro, sed baldaŭ ŝi aŭdis malgajan “Hi-ha!” kaj ŝi komprenis ke ŝi firme tenas la finon de la vosto de Hanĉjo.

Subite la maron lumigis giganta ardo. La ŝipo, nun tre

Tiktoko de Oz

tre for, ekbrulis, eksplodis kaj plonĝis sub la ondojn.

Betinjo tremis vidante tion, sed ĝuste tiam ŝia okulo ekvidis aron da ŝiprompaĵoj flosantaj proksime de ŝi kaj ŝi lasis la voston de la mulo kaj kaptis la krudan floson, kaj tiris sin sur ĝin tiel ke ŝi veturis sekure sur ĝi. Ankaŭ Hanĉjo vidis la floson kaj naĝis al ĝi, sed li estis tre mallerta kaj neniel povus grimpi sur ĝin se Betinjo ne helpus lin.

Ili devis kunpremiĝi, ĉar ilin subtenis nur lukokovrilo ŝirita el la ferdeko de la ŝipo; sed ĝi flosigis ilin relative bone kaj la knabino kaj la mulo sciis ke ĝi savos ilin de drono.

La ŝtormo ankoraŭ tute ne finiĝis, kiam la ŝipo pereis. Blindaj fulmoj flugis de nuboj al nuboj kaj la bruoj de profundaj tondroj eĥis alte super la maro. La ondoj ĵetis la floseton tien kaj tien kiel infano ĵetas kaŭĉukan pilkon kaj Betinjo havis solenan senton ke ĉiudirekte, sur centoj da akvaj kilometroj, ne ekzistas vivantaĵo escepte de ŝi kaj la malgranda azeno.

Eble Hanĉjo same pensis, ĉar li milde frotis sian nazon kontraŭ la timantan knabinon kaj diris “Hi-ha!” per sia plej milda voĉo, kvazaŭ por komfortigi ŝin.

“Vi protektos min, Hanĉjo kara, ĉu ne?” ŝi kriis senhelpe, kaj la mulo diris “Hi-ha!” denove, per promeso-signifaj tonoj.



Ĉapitro Kvar

Sur la ŝipo, dum la tagoj antaŭ la ŝiprompiĝo, kiam la maro estis trankvila, Betinjo kaj Hanĉjo fariĝis bonaj amikoj; do, kvankam la knabino eble preferus pli potencajn protektanton dum ĉi tiu terura krizo, ŝi sentis ke la mulo faros ĉion kion povas fari mulo por gardi ŝin sekura.

Dum la tuta nokto ili flosis, kaj kiam la ŝtormo lacigis sin kaj forflugis farante kelkajn forajn muĝetojn, kaj la ondoj malpligrandiĝis kaj estis pli facile surfloseblaj, Betinjo etendis sin sur la malseka floso kaj endormiĝis.

Hanĉjo neniom dormis. Eble li opiniis ke li devas gardi Betinjon. Nu, li kaŭris sur la floso apud la laca dormanta knabino kaj gardis pacience ĝis la unua mateniĝa lumo trafis la maron.

La lumo vekis Betinjon Bobinon. Ŝi sidiĝis, frotis siajn okulojn kaj rigardis trans la akvon.

“Ho, Hanĉjo; jen tero antaŭ ni!” ŝi kriis.

“Hi-ha!” respondis Hanĉjo per sia plendosona voĉo.

La floso iris rapide direkte al tre bela lando kaj dum ili proksimiĝis Betinjo povis vidi amasojn da belaj floroj brilantaj inter la altaj arboj. Sed tute neniu homo estis videbla.



ĈAPITRO 5

La Rozoj Repelas la Rifuĝantojn

DELIKATE la flosa gratiĝis sur la sabla plaĝo. Betinjo facile vadis al la bordo, la mulo proksime sekvis ŝin. La suno nun briladis kaj la aero estis varma kaj ŝarĝita per la odoro de rozoj.

“Mi deziras iom da matenmanĝo, Hanĉjo,” komentis la knabineto, pli bonhumora ĉar ŝi estas sur la seka tero; “sed ni ne povas manĝi la florojn, kvankam ili ja odoras tre alloga.”

“Hi-ha!” respondis Hanĉjo kaj li trotis laŭ vojeto al la supro de la dekliveto.

Betinjo sekvis kaj de la altaĵo ĉirkaŭrigardis. Iom for staris belega granda forcejo, ĝiaj miloj da kristalaj paneloj scintilis en la sunlumo.

Ĉapitro Kvin

“Devas esti homoj ie,” komentis Betinjo penseme; “ĝardenistoj, aŭ iuj. Ni iru vidi, Hanĉjo. Mi pli malsatas ĉiun minuton.”

Do ili marŝis cele la grandan forcejon kaj atingis ĝian enirejon sen renkonti iun ajn personojn. Pordo estis parte malferma, do Hanĉjo eniris la unua, supozante ke se ekzistas danĝero li povos retrenmarŝi kaj averti sian kunulinon. Sed Betinjo estis tre proksima malantaŭ li kaj tuj kiam ŝi eniris ŝi komencis miregi pro kion ŝi vidas.

La forcejo estis plena de belegaj rozarbustoj, ĉiuj kreskis en grandaj potoj. Sur la centra trunketo de ĉiu arbusto floris belega Rozo, grandiozkolora kaj tre plaĉodora, kaj en la centro de ĉiu Rozo estis la vizaĝo de bela knabino.

Dum Betinjo kaj Hanĉjo eniris, la kapoj de la Rozoj pendis kaj iliaj palpebroj estis dorme fermitaj; sed la mulon tiom mirigis ke li kriis laŭtan “Hi-ha!” kaj pro la sono de lia raŭka voĉo la rozfolioj moviĝetis, la Rozoj levis la kapojn kaj cent alarmitaj okuloj tuj firme rigardis la entrudiĝintojn.

“Mi—mi petas pardonon!” balbutis Betinjo, ruĝiĝante kaj konfuzite.

“H-o-o-o!” kriis la Rozoj, laŭ ia ĝema ĥoro; kaj unu el ili pludiris: “Kia bruaĉo!”

“Nu, tio estis nur Hanĉjo,” diris Betinjo, kaj kvazaŭ

Tiktoko de Oz

por pruvi la verecon de ŝiaj vortoj la mulo kriis novan laŭtan “Hi-ha!”

Audante tion ĉiuj Rozoj laŭeble plej sin turnis sur siaj tigoj kaj tremis kvazaŭ iu skuas la arbustojn. Delikata Portulako anhelis: “Fi! Aĉe aĉe!”

“Tute ne estas aĉe,” diris Betinjo, iom indigne. “Kiam vi kutimiĝos al la voĉo de Hanĉjo ĝi endormigos vin.”

La Rozoj nun rigardis la mulon malpli timeme kaj unu el ili demandis:

“Ĉu tiu sovaĝa besto nomiĝas Hanĉjo?”

“Jes; Hanĉjo estas mia kamarado, fidela kaj fidinda,” respondis la knabino, metante siajn brakojn ĉirkaŭ la kolon de la muleto kaj premante lin al si. “Ĉu ne, Hanĉjo?”

Hanĉjo povis respondi nur: “Hi-ha!” kaj pro tiu muĝo la Rozoj denove tremis.

“Bonvolu foriri!” petegis unu. “Ĉu vi ne vidas ke vi fortimigas el ni semajnon da kreskado?”

“Foriri!” eĥis Betinjo. “Sed, ni ne havas kien iri. Nia ŝipo ĵus pereis.”

“Ŝipo pereis?” demandis la Rozoj laŭ ĥoro de konfuziĝo.

“Jes; ni estis en granda ŝipo kaj la ŝtormo venis kaj pereigis ĝin,” klarigis la knabino. “Sed Hanĉjo kaj mi ekkaptis flosan kaj flosis al la bordo de ĉi tiu loko, kaj— ni estas lacaj kaj malsataj. *Kiu* lando estas ĉi tie, bonvolu diri?”



Tiktoko de Oz

“Ĉi tiu estas la Regno de Rozoj,” respondis la Portulako, arogante, “kaj ĝi estas dediĉita al la kulturiĝo de la plej raraj kaj belaj Rozoj kreskantaj.”

“Mi kredas tion,” diris Betinjo, admirante la belajn florojn.

“Sed oni permesas nur Rozojn ĉi tie,” aldonis delikata Te-Rozo, fleksante siajn brovojn sulkigocele; “sekve vi devos foriri antaŭ ol la Reĝa Ĝardenisto trovos vin kaj reĵetos vin en la maron.”

“Ho! Ĉu ekzistas do Reĝa Ĝardenisto?” demandis Betinjo.

“Certe.”

“Kaj ĉu ankaŭ li estas Rozo?”

“Kompreneble ne; li estas homo—mirinda homo,” estis la respondo.

“Nu, mi ne timas homon,” deklaris la knabino, multe pli trankvile, kaj eĉ dum ŝi parolis la Reĝa Ĝardenisto paŝis en la forcejon—li tenis ŝpatforkon en unu mano kaj akvumpoton en la alia.

Li estis kurioza vireto, vestita per rozkolora kostumo, kun bantoj ĉe la genuoj kaj kubutoj, kaj banto en la hararo. Liaj okuloj estis malgrandaj kaj scintilantaj, lia nazo akra kaj lia vizaĝo multe faltoplana.

“O-ho!” li kriis, mirante pro troviĝo de fremduloj en lia forcejo, kaj kiam Hanĉjo laŭte muĝis la Ĝardenisto ĵetis la

Ĉapitro Kvin

akvopoton sur la kapon de la mulo kaj ĉirkaŭdancis kun sia forkego, tiom agitite ke baldaŭ li stumblis pro la tenilo de sia forkego kaj etendiĝis sur la teron.

Betinjo ridis kaj fortiris la akvopoton de la kapo de Hanĉjo. La muleto koleris pro sia traktiĝo kaj retrenpaŝis cele la Ĝardeniston minace.

“Evitu liajn kalkanojn!” kriis Betinjo averte kaj la Ĝardenisto ekstariĝis kaj rapide kaŝis sin malantaŭ la Rozoj.

“Vi rompas la Leĝon!” li kriis, elpuŝante sian kapon por riproĉe rigardi la knabinon kaj la mulon.

“Kiun Leĝon?” demandis Betinjo.

“La Leĝon de la Regno de Rozoj. Oni malpermesas fremdulojn en ĉi tiu regiono.”

“Eĉ kvankam ili venis el ŝippereo?” ŝi demandis.

“La Leĝo ne esceptigas ŝippereojn,” respondis la Reĝa Ĝardenisto, kaj li estis tuj dironta ion pli kiam subite aŭdiĝis bruplena disrompiĝo de vitro kaj viro falis tra la tegmenton de la forcejo plump! sur la teron.



ĈAPITRO 6

Vilulo Vokas Veni

LA subitalveninto estis kuriozaspekta viro, vestita per vestoj tiom vilaj ke unue Betinjo supozis lin ia besto. Sed la fremdulo finis sian falon sidante kaj tiam la knabino konstatis ke li ja estas homo. Li tenis pomon en la mano, kiun evidente li manĝadis dum sia falo, kaj tiom malmulte li skuiĝis aŭ konfuziĝis per la akcidento ke li plu manĝis tiun pomon dum li trankvile ĉirkaŭrigardis.

“Jadi!” kriis Betinjo, proksimiĝante al li. “Kiu *vi* estas, kaj el kie vi venis?”

“Mi? Ho, mi estas Vilulo,” diris li, denove mordante sian pomon. “Mi rapidis viziti. Bonvolu pardoni la malatendon.”

Ĉapitro Ses

“Nu, mi s’pozas ke vi ne kulpas pri la rapido,” diris Betinjo.

“Ne. Mi grimpis pomarbon, ekstere; branĉo rompiĝis kaj—jen mi.”

Parolante la Vilulo finis sian pomon, donis la kernon al Hanĉjo—kiu avida manĝis ĝin—kaj stariĝis por ĝentile riverenci al Betinjo kaj la Rozoj.

La Reĝan Ĝardeniston preskaŭ timfrenzigis la bruo de la rompiĝanta vitro kaj la falo de la vila fremdulo en la laŭbon de Rozoj, sed nun li rigardetis el malantaŭ arbusto kaj kriis per sia grinca voĉo:

“Vi rompas la Leĝon! Vi rompas la Leĝon!”

Vilulo fiksrigardis lin solene.

“Ĉu la vitro estas la Leĝo en ĉi tiu lando?” li demandis.

“Rompi la vitron signifas rompi la Leĝon,” grincis la Ĝardenisto, kolere. “Ankaŭ, entrudiĝi en iun parton de la Regno de Rozoj signifas rompi la Leĝon.”

“Kiel vi scias tion?” demandis Vilulo.

“Nu, estas skribite en libro,” diris la Ĝardenisto, antaŭen venante kaj prenante libreton el sia poŝo. “Paĝo dek tri. Jen: ‘Se fremdulo eniras la Regnon de Rozoj la Reganto tuj kondamnu kaj mortigu lin.’ Do, komprenu, fremduloj,” li pludiris triumfe, “vi ĉiuj devas morti, via horo alvenis!”

Sed nun Hanĉjo ekpartoprenis. Li jam kaŝe retrenpaŝadis cele la Reĝan Ĝardeniston, kiun li malamamis, kaj nun la

Tiktoko de Oz

kalkanoj de la mulo elĵetiĝis kaj batis la ventron de la vireto. Li duobliĝis kiel la litero “U” kaj flugis el la pordo tiom rapide—eĉ ne tuŝante la teron—ke li estis for antaŭ ol Betinjo povis palpebrumi.

Sed la mulatako timigis la knabinon.

“Venu,” ŝi flustris, proksimiĝante al la Vilulo kaj prenante lian manon; “ni iru aliloken. Oni nepre mortigos nin se ni restos ĉi tie!”

“Ne maltrankvilu, kara,” respondis Vilulo, karesante la kapon de la infano. “Mi nenion timas, ne dum mi havas la Amo-Magneton*.”

“La Amo-Magneton? Kio estas tio?” demandis Betinjo.

“Ĝi estas ĉarma sorĉilo kiu kaptas la koron de ĉiu rigardanto,” estis la respondo. “La Amo-Magneto antaŭe pendis super la portiko de la Smeralda Urbo, en la Lando Oz; sed kiam mi komencis ĉi tiun veturon nia amata Regantino, Ozma de Oz, permesis ke mi kunprenu ĝin.”

“Ho!” kriis Betinjo, fiksrigardante lin; “ĉu vere vi estas el la mirinda Lando Oz?”

“Jes. Ĉu vi jam estis tie, kara?”

“Ne; sed mi aŭdis pri ĝi. Kaj ĉu vi konas Princinon Ozman?”

“Jes ja, tre bone.”

“Kaj—kaj Princinon Doroteon?”

“Doroteo estas malnova amiko mia,” deklaris Vilulo.

Ĉapitro Ses

“Jadi!” kriis Betinjo. “Kaj kial vi foriris el tiu belega lando Oz?”

“Mi havis taskon,” diris Vilulo, aspektante malfeliĉa kaj solena. “Mi serĉas mian karan frateton.”

“Ho! Ĉu li perdiĝis?” demandis Betinjo, sentante bedaŭron por la kompatindulo.

“Antaŭ dek jaroj,” respondis Vilulo, kiu elprenis poŝtukon kaj viŝis larmon de sia okulo. “Mi nur lastatempe trovis tiun fakton, kiam mi vidis ĝin menciita en la magia Arkivo-Libro de la Sorĉistino Glinda, en la Lando Oz. Do nun mi serĉas lin.”

“Kie li perdiĝis?” demandis la knabino simpatie.

“En Kolorado, kie mi loĝis antaŭ ol iri al Oz. Fraĉjo estis ministro, kaj forsis oron el mino. Unu tagon li eniris sian minon kaj neniam elvenis. Oni serĉis lin, sed li ne estis tie. Plene malaperis,” Vilulo finis mizere.

“Jadi! Kio do okazis al li?” ŝi demandis.

“Nur unu klarigo eblas,” respondis Vilulo, prenante novan pomon el sia poŝo kaj manĝante por kvietigi sian maltrankvilecon. “La Reĝo de la Knomoj verŝajne prenis lin.”

“La Reĝo de la Knomoj! Kiu li estas?”

“Nu, kelkfoje li nomiĝas la Metal-Monarko, sed lia vera nomo estas Rugedo. Loĝas en iu subtera kaverno. Pretendas posedi ĉiujn metalojn kaŝitajn en la tero. Ne

Tiktoko de Oz

demandu al mi la kialon.”

“Kial?”

“Ĉar mi ne scias. Sed tiu Rugedo ekkoleregas se iu fosas oron el la tero, kaj private mi opinias ke li kaptis Fraĉjon kaj portis lin al sia subtera regno. Ne—ne demandu la kialon. Mi vidas ke vi volegas demandi pri la kialo. Sed mi ne scias.”

“Sed—jadi!—sekve vi neniam trovos vian perditan fraton!” kriis la knabino.

“Eble ne; sed mi devas provi,” respondis Vilulo. “Ĝis nun mi vagadis sen trovi lin, sed tio pruvas nur ke li ne estas kie mi serĉis. Mi nun serĉas la kaŝitan enirejon de la subtera kaverno de la terura Metal-Monarko.”

“Nu,” diris Betinjo dubeme, “ŝajnas al mi ke se vi ja sukcesos iri tien la Metal-Monarko ankaŭ kaptos vin.”

“Absurde!” respondis Vilulo, senzorge. “Ne forgesu la Amo-Magneton.”

“Kion pri ĝi?” ŝi demandis.

“Kiam la feroca Metal-Monarko vidos la Amo-Magneton, li ekamos min elkore kaj faros kion ajn mi petos.”

“Ĝi devas esti vere mirinda,” diris Betinjo, respektoplene.

“Jes,” certigis la viro. “Ĉu mi montru ĝin al vi?”

Ĉapitro Ses

“Ho, jes!” ŝi kriis; do Vilulo serĉis en sia vila poŝo kaj eltiris malgrandan arĝentan magneton, kun huffera formo.

Tuj kiam Betinjo vidis ĝin ŝi komencis ami la Vilulon pli ol antaŭe. Hanĉjo ankaŭ vidis la Magneton kaj paŝetis al Vilulo por froti sian kapon ameme sur la genuo de la viro.

Sed ilin interrompis la Reĝa Ĝardenisto, kiu puŝis sian kapon en la forcejon kaj kriis kolere:

“Vi ĉiuj estas mortokondamnitaj! Via sola oportuno eskapi estas foriri tuj.”

Tio alarmis malgrandan Betinjon, sed la Vilulo nur skuis la Magneton direkte al la Ĝardenisto. Ĉi tiu, vidante ĝin, antaŭenkuris kaj ĵetis sin al la piedoj de la Vilulo, murmurante per mioldolĉaj vortoj:

“Ho, kara, kara viro! Kiom mi amas vin! Ĉiu vilaĵo kaj ero kiu ornamas vin estas kara por mi—mia tuta havaĵo apartenas al vi! Sed jadi! foriru antaŭ ol vi plene mortos.”

“Mi ne mortos,” deklaris la Vilulo.

“Vi devos. Laŭ la Leĝo,” kriis la Ĝardenisto, komencante plori per veraj larmoj. “Rompas mian koron diri al vi tiun malplaĉan informon, sed la Leĝo diras ke ĉiuj fremduloj estas kondamnendaj fare de la Reganto kaj devos plene morti.”

“Ankoraŭ neniu Reganto kondamnis nin,” diris Betinjo.

Tiktoko de Oz

“Kompreneble ne,” pludiris Vilulo. “Ni ankoraŭ eĉ ne vidis la Reganton de la Regno de Rozoj.”

“Nu, verdire,” diris la Ĝardenisto, per perplekstono, “ni ne havas veran Reganton, ĝuste nun. Komprenu ke ĉiuj niaj Regantoj kreskas sur arbustoj en la Reĝaj Ĝardenoj, kaj la lasta melduis kaj velkis tro frue. Do ni devis planti lin, kaj nuntempe neniu kreskas sur la Reĝaj Arbustoj kaj sufiĉe maturiĝis por ke ni pluku lin.”

“Kiel vi scias?” demandis Betinjo.

“Nu, mi estas la Reĝa Ĝardenisto. Multaj reĝuloj kreskas, mi agnoskas tion; sed ĝuste nun ili ĉiuj estas verdaj. Ĝis unu maturiĝos, mi devas mem regi la Regnon de Rozoj, kaj obeigi ĝian Leĝojn. Tial, kvankam mi amegas vin, Vilulo, mi devos mortigi vin.”

“Atendu momenton,” petegis Betinjo. “Mi volas vidi tiujn Reĝajn Ĝardenojn antaŭ ol morti.”

“Ankaŭ mi,” pludiris Vilulo. “Konduku nin tien, Ĝardenisto.”

“Ho, mi ne povas fari tion,” obĵetis la Ĝardenisto. Sed Vilulo denove montris al li la Amo-Magneton kaj post unu rigardeto la Ĝardenisto ne plu povis rezisti.

Li kondukis Vilulon, Betinjon kaj Hanĉjon al la fino de la granda forcejo kaj zorge malŝlosis malgrandan pordon. Trairinte tion ili venis en la grandiozan Reĝan Ĝardenon de la Regno de Rozoj.

Ĉapitro Ses

Ĝin tute ĉirkaŭis alta heĝo kaj interne kreskis pluraj gigantaj rozarbustoj kiuj havis densajn verdajn foliojn velurecajn. Sur tiuj arbustoj kreskis la anoj de la Reĝa Familio de la Regno de Rozoj—viroj, virinoj kaj infanoj en ĉiuj etapoj de maturiĝo. Ĉiuj ŝajnis esti helverdaj, kvazaŭ nematuraj aŭ ne plene kreskintaj, iliaj karno kaj vestoj estis same verdaj. Ili staris tute senvivaj sur siaj branĉoj, kiuj balancis milde en la venteto, kaj iliaj plene malfermaj okuloj rigardadis rekte antaŭen, senvidaj kaj seninteligentaj.

Dum ŝi ekzamenis tiujn kuriozajn kreskantajn homojn, Betinjo pasis malantaŭ granda centra arbusto kaj tuj ekkriis pro surprizo kaj plezuro. Ĉar tie, florante perfektakolore kaj -forme, staris Reĝa Princino, kies beleco mirigis.

“Nu, ŝi estas matura!” kriis Betinjo, forpuŝante kelkajn larĝajn foliojn por observi ŝin pli detale.

“Nu, povas esti,” agnoskis la Ĝardenisto, kiu venis al la flanko de la knabino; “sed ŝi estas knabino, do ni ne povas uzi ŝin kiel Reganton.”

“Tute ne!” sonis ĥoro de mallaŭtaj voĉoj, kaj ĉirkaŭ-rigardante Betinjo trovis ke ĉiuj Rozoj sekvis ilin el la forcejo kaj nun staras grupe antaŭ la enirejo.

“Sciu,” klarigis la Ĝardenisto, “la regatoj de la Regno de Rozoj ne volas knabinan Reganton. Ili volas Reĝon.”





Tiktoko de Oz

“Reĝon! Ni volas Reĝon!” ripetis la ĥoro de Rozoj.

“Ĉu ŝi ne estas Reĝa?” demandis Vilulo, admirante la belan Princinon.

“Kompreneble, ĉar ŝi kreskas sur Reĝa Arbusto. Tiu Princino nomiĝas Ozga, ĉar ŝi estas prakuzino de Ozma de Oz; kaj se ŝi estus viro, ni volonte ĝoje aklamus ŝin nia Reganto.”

La Ĝardenisto tiam forturnis sin por paroli kun siaj Rozoj kaj Betinjo flustris al sia akompananto: “Ni pluku ŝin, Vilulo.”

“Bone,” diris li. “Se ŝi estas Reĝa, ŝi rajtas regi ĉi tiun Regnon, kaj se ni plukos ŝin nepre ŝi protektos nin kaj malebligos ke oni damaĝu aŭ forpelu nin.”

Do Betinjo kaj Vilulo ambaŭ prenis po brakon de la bela Roza Princino kaj malgrada tordo de ŝiaj piedoj liberigis ŝin de la branĉo sur kiu ŝi kreskis. Tre gracie ŝi paŝis de la arbusto al la tero, kie ŝi riverencis antaŭ Betinjo kaj Vilulo kaj diris per tre plaĉe dolĉa voĉo: “Mi dankas vin.”

Sed aŭdinte la sonon de tiu vortoj la Ĝardenisto kaj la Rozoj turnis sin kaj trovis ke la Princino estas plukita kaj nun vivas. Sur ĉiu vizaĝo fulmis esprimo de rankoro kaj kolero, kaj unu el la Rozoj laŭte kriis:

“Aŭdacaj mortipovuloj! Kion vi faris?”

“Plukis Princinon por vi, jen ĉio,” respondis Betinjo, gaje.



Tiktoko de Oz

“Sed ni rifuzas ŝin! Ni volas Reĝon!” kriis Ĵak-Rozon, kaj alia aldonis per malestima voĉo: “Neniu knabino regos nin!”

La nove plukita Princino rigardis de unu al alia el siaj ribelemaj regatoj miroplene. Esprimo de malplezuro kovris ŝian vizaĝon.

“Ĉu neniu bonvenigo por mi ĉi tie, belaj regatoj?” ŝi demandis malsevere. “Ĉu mi ne venis de mia Reĝa Arbusto por esti via Reganto?”

“Vin plukis mortipovuloj, sen nia konsento,” respondis la Ĝardeno Portulako, malvarme; “do ni rifuzas permesi ke vi regu nin.”

“Elpelu ŝin, Ĝardenisto, kun la aliaj!” kriis la Te-Rozo.

“Momenton, mi petas!” vokis Vilulo, prenante la Amomagneton el sia poŝo. “Mi kredas ke ĉi tio instigos ilian amon, Princino. Jen—prenu ĝin per via mano kaj lasu ke la rozoj vidu ĝin.”

Princino Ozga prenis la Magneton kaj tenis ĝin antaŭ la okuloj de siaj regatoj; sed la Rozoj rigardis ĝin per trankvila malestimo.

“Ho, kio fuŝas?” demandis Vilulo surprizate. “La Magneto neniam malsukcesis antaŭ nun!”

“Mi scias,” diris Betinjo, kapjesante ŝage. “Tiu Rozoj ne havas korojn.”

Ĉapitro Ses

“Vi pravas,” akordis la Ĝardenisto. “Ili estas belaj, kaj dolĉaj, kaj vivaj; sed ili restas rozoj. Iliaj tigoj havas dornojn, sed ne korojn.”

La Princino ĝemis kaj redonis la Magneton al la Vilulo.

“Kion mi faru?” ŝi demandis malfeliĉe.

“Elpelu ŝin, Ĝardenisto, kun la aliaj!” ordonis la Rozoj. “Ni rifuzas havi Reganton antaŭ ol virrozo—Reĝo—estos sufiĉe matura por plukiĝi.”

“Bone,” diris la Ĝardenisto obeeme. “Pardonu min, kara Vilulo, ĉar mi oponas vian volon, sed vi kaj la aliaj, inkluzive de Ozga, devas eliri el la Regno de Rozoj tuj, aŭ eĉ antaŭtuje.”

“Ĉu vi ne amas min, Ĝarĉjo?” demandis Vilulo, senzorge montrante la Magneton.

“Mi ja amas, mi amegas vin!” respondis la Ĝardenisto fervore; “sed neniu vera viro akceptas neglekti sian devon pro amo. Mia devo estas elpeli vin, do—elen!”

Dirinte tion li kaptis ĝardenforkegon kaj komencis pikminaci la fremdulojn per ĝi, por devigi ilin eliri. La mulo Hanĉjo ne timis la forkegon kaj kiam li proksimigis siajn kalkanojn al la Ĝardenisto la viro retrenfalis por eviti piedbaton.

Sed nun la Rozoj dense grupiĝis ĉirkaŭ la

Tiktoko de Oz

malakceptitojn kaj ili baldaŭ trovis ke sub la drapiraĵoj de verdaj folioj estas multaj akraj dornoj kiuj estas pli danĝeraj ol la kalkanoj de Hanĉjo. Nek Betinjo nek Ozga nek Vilulo nek la mulo kuraĝis rezisti tiujn dornojn kaj kiam ili fortiris sin ili trovis sin malrapide pelataj tra la ĝardenpordon en la forcejon. De tie ili estis elpelataj ĉe la enirejo kaj simile tra la teritorion de la florkovrita Regno de Rozoj, kiu ne estis vere tre granda.

La Roza Princino ploris amare; Betinjo estis indigna kaj kolera; Hanĉjo kriadis defiajn “Hi-ha!”-ojn kaj la Vilulo fajfadis mallaŭte al si.

La bordo de la Regno de Rozoj estis profunda abismo, sed ekzistis baskulponto unuloke kaj tion la Reĝa Ĝardenisto mallevis ĝis la malakceptitoj transpasis ĝin. Tiam li relevis ĝin kaj reiris kun siaj Rozoj al la forcejo, lasante la kvar kurioze diversajn kamaradojn vagi en la dezertan kaj nekonatan landon preteran.

“Ne ĝenas min, ne multe,” komentis Vilulo, dum li gvidis ilin sur la ŝtonoplana, malfekunda tero. “Mi devas serĉi mian longe perditan frateton, do ne gravas kien mi iras.”

“Hanĉjo kaj mi helpos vin trovi vian frateton,” diris Betinjo per sia plej gaja voĉo. “Mi estas nun tiom distanca de mia hejmo ke verŝajne mi neniam trovos rimedon reiri al ĝi; kaj, efektive, estas pli plezurige ĉirkaŭmarŝadi kaj



Tiktoko de Oz

aventuradi ol resti enhejme. Ĉu vi akordas, Hanĉjo?”

“Hi-ha!” diris Hanĉjo, kaj la Vilulo dankis ilin ambaŭ.

“Rilate al mi,” diris Princino Ozga de Rozlando, kun milda ĝemo, “mi devos resti por ĉiam elpelita el mia Regno. Do ankaŭ mi volonte helpos la Vilulon trovi sian perditan fraton.”

“Vi estas vere kompleza, S’rino,” diris Vilulo. “Sed se mi ne povos trovi la subteran kavernon de Rugedo,* la Metala Monarko, mi neniam trovos karan Fraĉjon.”

“Ĉu neniuj scias kie ĝi estas?” demandis Betinjo.

“Nepre scias tion *iu*,” estis la respondo de Vilulo. “Sed ne ni. Ni povos sukcesi nur se ni plu marŝados ĝis ni trovis personon kiu povos gvidi nin al la kaverno de Rugedo.”

“Eble ni mem trovos ĝin sen helpo,” proponis Betinjo. “Kiu scias?”

“Neniuj scias tion, escepte de la verkanto de ĉi tiu rakonto,” diris Vilulo. “Sed ni trovos nenion—eĉ ne vespermanĝon—se ni ne plumarŝos. Jen vojo. Ni sekvu ĝin kaj trovu kien ĝi kondukas.”

* La Reĝo antaŭe nomiĝis “Rokat”, sed trinkinte la “Akvon de Forgeso” li forgesis sian nomon kaj devis renomiĝi.



ĈAPITRO 7

La Priplendinda Pozicio de Polikromo

LA pelvo de la Reĝo de Pluvo tropleniĝis kaj akvo verŝiĝis trans la randon. La rezulto estis pluvo en certa parto de la lando—vere densa pluvado, dum iom da tempo—kaj la Ĉielarko kuris al tiu loko por montri la belegajn kolorojn de sia arko tuj kiam la pluvnebuloj forpasis kaj la ĉielo estis klara.

La alveno de la Ĉielarko ĉiam estas ĝojiga evento por la teruloj, sed malmultaj el ili vidas ĝin apuda. Kutime la Ĉielarko estas tiom distanca ke oni povas observi ĝiajn belajn kolorojn nur malklare, kaj tial ni malofte vidas la dancantajn filinojn de la Ĉielarko.

En la malfekunda lando kie la pluvo ĵus falis laŭŝajne

Tiktoko de Oz

tute ne estis homoj; sed la Ĉielarko aperis, malgraŭe, kaj dancadis gaje sur ĝia arko la filinoj de la Ĉielarko, ĉe kies kapo estis la feineca Polikromo, kiu estas tiom delikata kaj bela ke neniu knabino iam tute egalas ŝin rilate al beleco.

Polikromo estis gajhumora kaj dancis laŭlonge de la arko al la tero, spitante siajn fratinojn sekvi ŝin. Ridante kaj gaje ili ankaŭ tuŝis la teron per siaj scintilantaj piedoj; sed ĉiuj filinoj de la Ĉielarko sciis ke tio estas danĝera ludo, do ili rapide regrimpis sur sian arkon.

Kun escepto de Polikromo. Kvankam la plej dolĉa kaj gaja, ŝi ankaŭ estis la plej sentima. Krome, por ŝi estis nekutima la sento tuŝi la malvarman, malseketan teron per siaj rozkoloraj piedfingroj. Antaŭ ol ŝi rimarkis, la arko leviĝis kaj malaperis en la ondantan bluan ĉielon, kaj jen Polikromo staranta senhelpe sur roko, kaj ŝiaj gazaj drapiraĵoj flosadis ĉirkaŭ ŝi kvazaŭ brilantaj araneaĵoj, kaj neniu—nek fea nek mortipova—povus helpi ŝin reatingi sian perditan arkon!

“Jadi!” ŝi kriis, sulkigante la brovon super sia bela vizaĝo, “denove mi estas kaptita. Jam duafoje mia senzorgeco lasis min sur la tero dum miaj fratinoj reiris al niaj Ĉielaj Palacoj. Unuafoje mi spertis kelkajn plaĉajn aventurojn, sed ĉi tiu estas soleca, forlasita lando kaj mi tre malfeliĉos ĝis mia Ĉielarko revenos kaj mi povos

Ĉapitro Sep

regrimpi sur ĝin. Mi pensu kion mi faru.”

Ŝi kaŭris sur la plata roko, tiris siajn drapiraĵojn ĉirkaŭ sin kaj klinis sian kapon.

Dum ŝi estis en tiu pozicio Betinjo Bobin ekvidis Polikromon, venante laŭlonge de la ŝtona vojo, sekvate de Hanĉjo, la Princino kaj Vilulo. Tuj la knabino kuris al la lumradia filino de la Ĉielarko kaj kriis:

“Ho, kia bela, bela persono!”

Polikromo levis sian oran kapon. Larmoj estis en ŝiaj bluaj okuloj.

“Mi estas la plej mizera knabino en la tuta mondo!” ŝi ploris.

La aliaj grupiĝis ĉirkaŭ ŝin.

“Diru al ni viajn problemojn, belulino,” urĝis la Princino.

“Mi—mi perdis mian arkon!” ploregis Polikromo.

“Mi muzikos por vi, kara,” diris Vilulo simpatie, kredante ke ŝi volis diri “arĉon” anstataŭ “arkon”.

“Mi ne volas vin!” kriis Polikromo, arogante batante la piedon per sia piedo; “Mi volas mian Ĉielarkon.”

“Ho; tio estas io alia,” diris Vilulo. “Sed forgesu ĝin. Kiam mi estis juna ankaŭ mi volegis la Ĉielarkon, sed mi ne povis atingi ĝin. Evidente ankaŭ *vi* ne povas; do bonvolu ne plori.”

Polikromo rigardis lin riproĉe.

“Mi ne ŝatas vin,” ŝi diris.

Tiktoko de Oz

“Ne?” respondis Vilulo, tirante la Amo-Magneton el sia poŝo; “neniom?—eble iometete?”

“Jes, jes!” diris Polikromo, ekstaze kunpremante siajn manojn dum ŝi rigardis la sorĉitan talismanon; “mi amas vin, Vilulo!”

“Kompreneble vi amas min,” diris li trankvile; “sed mi ne respondecas. Tion kaŭzas la potenca sorĉarto de la Amo-Magneto. Sed laŭaspekte vi estas tute sola kaj senamika, Ĉielarketo. Ĉu vi deziras esti parto de nia grupo ĝis vi retrovos viajn patron kaj fratinojn?”

“Kien vi iras?” ŝi demandis.

“Ni ne scias tion precize,” diris Betinjo, prenante ŝian manon; “sed ni provas trovi la longe perditan fraton de Vilulo, kaptitan de la terura Metala Monarko. Ĉu vi bonvolos akompani nin kaj helpi nin?”

Polikromo rigardis de unu al alia el la kurioza grupo de marŝantoj kaj alloga rideto subite lumigis ŝian vizaĝon.

“Azeno, mortipova knabino, Roza Princino kaj Vilulo!” ŝi kriis. “Nepre vi bezonas helpon, se vi intencas fronti Ruggedon.”

“Ĉu, do, vi konas lin?” demandis Betinjo.

“Neniel. La kavernoj de Ruggedo estas sub la surfaco de la tero, kien neniam povas iri Ĉielarko. Sed mi aŭdis pri la Metala Monarko. Oni ankaŭ nomas lin la Reĝo de la Knomoj, sciu, kaj li kaŭzis severajn problemojn por

Ĉapitro Sep

vere multaj personoj—mortipovuloj kaj feoj—siatempe,” diris Polikromo.

“Ĉu vi do timas lin?” demandis la Princino, maltrankvile.

“Neniu povas damaĝi filinon de la Ĉielarko,” diris Polikromo fiere. “Mi estas ĉielfeino.”

“Sekve,” diris Betinjo, rapide, “vi povos informi nin kie trovi la vojon al la kaverno de Ruggedo.”

“Ne,” respondis Polikromo, kapneante, “tion mi ne povas fari. Sed mi volonte akompanos vin kaj helpos vin trovi la lokon.”

Tiu promeso tre plaĉis al ĉiuj marŝantoj kaj post kiam la Vilulo retrovis la vojon ili komencis sekvi ĝin pli bonhumore. La filino de la Ĉielarko dancis leĝere sur la rokoplana vojo, ne plu malfeliĉa, sed kun siaj belaj trajtoj kovritaj per ridetoj. Vilulo venis la dua, marŝante regule kaj kelkfoje apogante la Rozan Princinon kiu sekvas lin. Betinjo kaj Hanĉjo venis lastaj, kaj kiam ŝi laciĝis pro marŝado la knabino suriris la dorson de Hanĉjo kaj lasis la fortan azeneton porti ŝin iom.

Je noktiĝo ili atingis kelkajn arbojn kreskantajn apud malgranda rivereto kaj tie ili kampadis kaj ripozis ĝis la mateno. Tiam ili formarŝis, trovante berojn kaj fruktojn tie kaj tie kiuj satigis la apetiton de Betinjo, Vilulo kaj Hanĉjo, tiel ke ili estis bone kontentaj pri sia situacio.

Surprizis Betinjon vidi la Rozan Princinon kunmanĝi,

Tiktoko de Oz

ĉar ŝi supozis ŝin feino; sed kiam ŝi menciis tion al Polikromo, la filino de la Ĉielarko klarigis ke kiam Ozga elpeliĝis el sia Regno de Rozoj ŝi ĉesis esti feino kaj neniam refariĝos pli ol normala mortipovulo. Polikromo, tamen, estas feino negrave kie ŝi estas, kaj kvankam ŝi trinketis kelkajn rosgutojn en la lunlumo por refreŝigi sin—nu, neniu vidis ŝin fari tion.

Dum ili daŭrigis sian vagan marŝadon, direktoj malmulton signifis al ili, ĉar ili estis senespere perditaj en tiu nekonata lando. Vilulo diris ke plej bone estos iri direkte al la montoj, ĉar la natura enirejo de la subtera kaverno de Ruggedo verŝajne estas kaŝita en iu rokoplana dezerta loko; sed montoj ŝajne estis tute ĉirkaŭ ili ĉiudirekte escepte de la unusola direkto el kiu ili venis, kiu kondukis al la Regno de Rozoj kaj la maro. Tial malmulte gravis kiudirekten ili iros.

Post kelka tempo ili rimarkis malklarajn spurojn de pado kaj sekvinte tion ili iom da tempo atingis vojkruciĝon. Tie estis multaj padoj, irantaj diversdirekten, kaj ankaŭ estis vojindikilo tiom malnova ke ne plu videblis vortoj. Unuflanke estis malnova puto, kun ĉena vinĉo por ĉerpi akvon, tamen nenie videblis domo aŭ alia konstruaĵo.

Dum la grupo haltis, perpleksaj pri kiudirekten iri, la mulo proksimiĝis al la puto kaj klopodis rigardi en ĝin.

Ĉapitro Sep

“Li soifas,” diris Betinjo.

“Ĝi estas seka puto,” komentis Vilulo. “Verŝajne jam de multaj jaroj ne plu estas akvo en ĝi. Sed, venu; ni decidu kiun vojon sekvi.”

Ŝajne neniu povis decidi tion. Ili sidiĝis grupe kaj provis konsideri pri kiu vojo estas plej sekvida. Sed Hanĉjo ne povis forteni sin de la puto kaj fine li levis sin sur siajn malantaŭajn kruojn, transmetis sian kapon kaj diris laŭte “Hi-ha!” Betinjo rigardis sian bestamikon scivoleme.

“Ĉu eble li vidas ion en la fundo?” ŝi diris.

Aŭdinte tion Vilulo levis sin kaj iris al la puto por rigardi, kaj Betinjo akompanis lin. La Princino kaj Polikromo, kiuj jam fariĝis firmaj amikoj, tenis la brakojn unu de la alia kaj promenis laŭlonge de unu el la vojoj, por trovi facilan padon.

“Efektive,” diris Vilulo, “ja ŝajnas esti io ĉe la fundo de tiu malnova puto.”

“Ĉu ni povos suprentiri ĝin kaj vidi kio ĝi estas?” demandis la knabino.

Ne estis sitelo ĉe la fino de la vinĉoĉeno, sed ja estis granda hoko kiu iam uziĝis por teni sitelon. Vilulo subenpendigis tiun hokon, trenis ĝin sur la fundo kaj relevis ĝin. Malnova ringoforma jupo venis kun ĝi, kaj Betinjo ridis kaj forĵetis ĝin. Tiu aĵo timigis Hanĉjon, kiu neniam antaŭe vidis ringoforman jupon, kaj li tenis sin

Tiktoko de Oz

bondistance for de ĝi.

Plurajn aliajn objektojn la Vilulo kaptis per la hoko kaj relevis, sed neniu el ili estis grava.

“Ĉi tiu puto ŝajne fariĝis ujo por la tuta rubo de la lando,” li diris, resubnigante la hokon. “Mi kredas ke mi jam kaptis ĉion. Ne—la hoko denove kaptis ion. Helpu min, Betinjo! Mi ne scias kio ĝi estas, sed ĝi estas ege peza!”

Ŝi alkuris kaj helpis lin turni la vinĉon kaj post multa klopodado konfuzita amaso da kupraĵo vidiĝis.

“Jadi!” kriis Vilulo. “Vere jen surprizo!”

“Kio ĝi estas?” demandis Betinjo, kroĉiĝante al la vinĉo kaj anhelegante.

Responde la Vilulo prenis la kupraĵaron kaj faligis ĝin sur la teron, for de la puto. Tiam li turnis ĝin per sia piedo, etendis ĝin, kaj mirige al Betinjo la objekto montriĝis esti kupra homo.


“Ĝuste tion mi supozis,” diris Vilulo, rigardante fikse la objekton. “Sed krom se ekzistas du kuprujoj en la mondo jen la plej miriga afero kiun iam mi vidis.”

Tiumomente la filino de la Ĉielarko kaj la Roza Princino proksimiĝis al ili, kaj Polikromo diris:

“Kion vi trovis, Vila Viro?”

“Aŭ malnovan amikon aŭ nekonaton,” li respondis.

“Ho, jen afiŝo sur lia dorso!” kriis Betinjo, kiu



Ĉapitro Sep

surgenuiĝis por ekzameni la homon. “Jadi, tre kurioze! Aŭskultu ĉi tion.”

Ŝi laŭtlegis la sekvajn vortojn, gravuritajn sur la kupraj platoj de la korpo de la homo:

de SMITH & TINKER
Patentita Duoble Aganta, Ekstre-Reagema,
Pensokrea, Perfekte Parolanta
MEKANIKA VIRO
Kun Nia Speciala Horloĝfunkcia Mekanismo.
Pensas, Parolas, Agas, kaj Perskaŭ Vivas.

“Mirige!” kriis la Princino.

“Jes; sed jen pli,” diris Betinjo, legante alian gravuritan platon:

INSTRUKCIOJ:

Por PENSADO:—Streĉu la risorton de la Mekanika Viro, (truo sub la maldekstra brako, signita No. 1).

Por PAROLADO:—Streĉu la risorton de la Mekanika Viro, (truo sub la dekstra brako, signita No. 2).

Por MARŜADO kaj AGADO:—Streĉu la risorton en la centro de lia dorso, (signita No. 3).

N. B.—Ni garantias la perfektan funkciadon de ĉi tiu mekanismo dum mil jaroj.

Tiktoko de Oz

“Se oni garantiis lin por mil jaroj,” diris Polikromo, “sendube li ankoraŭ povas funkcii.”

“Kompreneble,” respondis Vilulo. “Ni streĉu liajn risortojn.”

Por fari tion ili devis surpiedigi la kuprulon, por ke li estu rekta, kaj tio ne estis facila tasko. Li emis senekvilibrigî, kaj estis re- kaj re-apogenda. La knabinoj helpis Vilulon, kaj fine Tiktoko ŝajnis bone ekvilibrigî kaj staris sola sur siaj larĝaj piedoj.

“Jes,” diris Vilulo, atente rigardante la kuprulon, “ĉi tiu nepre estas mia malnova amiko Tiktoko, kiu tiktakadis gaje en la Lando Oz kiam mi foriris. Sed estas tre perplekse kiel li venis al ĉi tiu soleca loko kaj eniris tiun malnovan puton.”

“Se ni streĉos la risortojn, eble li informos nin,” sugestis Betinjo. “Jen la ŝlosilo, pendanta de hoko sur lia dorso. Kiun parton mi unue streĉu?”

“Liajn pensojn, kompreneble,” diris Polikromo, “ĉar oni devas pensi por povi paroli aŭ movigî inteligente.”

Do Betinjo streĉis sub lia maldekstra brako, kaj tuj lumfulmetoj komencis montriĝi en la supro de lia kapo, kio pruvis ke li komencis pensi.

“Nun,” diris Vilulo, “streĉu lian gramofonon.”

“Kio estas tio?” ŝi demandis.

“Nu, lian parolaparaton. Liaj pensoj eble estas interesaj, sed ili nenion diras al ni.”

Ĉapitro Sep

Do Betinjo streĉis la kuprulon sub lia dekstra brako, kaj tiam de la interno de lia kupra korpo venis malglataj vortoj: “Mul-taj-n dan-koj-n!”

“Hura!” kriis Vilulo, ĝoje, kaj li frapis la dorson de Tiktoko tiom elkore ke la kuprulo senekvilibrigis kaj falis sur la teron. Sed la horloĝmekanismo kiu ebligis ke li parolu estis streĉita kaj li diradis: “Le-vu mi-n! Le-vu mi-n! Le-vu mi-n!” ĝis ili relevis lin kaj ekvilibrigis lin sur liaj piedoj, kaj tiam li pludiris ĝentile: “Mul-taj-n dan-koj-n!”

“Li ne povos apogi sin ĝuste antaŭ ol ni streĉos lian agrisor-ton,” komentis Vilulo; do Betinjo streĉis ĝin, kiom eble plej firme—ĉar la ŝlosilo turniĝis iom rigide—kaj tiam Tiktoko levis siajn piedojn, cirkle marŝis kaj fine haltis antaŭ la grupo kaj riverencis profunde al ĉiuj.

“Kiel vi eniris tiun puton? Mi lasis vin sekura en Oz,” demandis Vilulo.

“La ra-kon-to es-tas lon-ga,” respondis Tiktoko, “sed mi mal-lon-gi-gos ĝi-n. Post vi-a fo-ri-ro por ser-ĉi vi-a-n fra-to-n, Oz-ma vi-dis vi-n va-ga-di en frem-daj lan-doj ki-am ajn ŝi ri-gar-dis si-a-n ma-gi-a-n bil-do-n, kaj ŝi an-kaŭ vi-dis vi-a-n fra-to-n en la ka-ver-no de la Re-ĝo de la Kno-moj; do ŝi sen-dis mi-n por di-ri al vi ki-e tro-vi vi-a-n fra-to-n kaj or-do-nis ke mi hel-pu vi-n se mi po-vos. La Sor-ĉis-ti-no, Glin-da la Bo-na, trans-por-tis mi-n al ĉi ti-u lo-ko tuj-tu-je; sed ĉi ti-e mi ren-kon-tis

Tiktoko de Oz

la Re-ĝo-n de la Kno-moj mem—mal-ju-na Ru-ge-do, ki-u-n o-ni no-mas ĉi-lo-ke la Me-ta-la Mo-nar-ko. Ru-ge-do sci-is por ki-o mi ve-nis, kaj li ti-om ko-le-ris ke li ĵe-tis mi-n en la pu-to-n. Ki-am mi-aj ri-sor-toj mal-stre-ĉi-ĝis mi es-tis sen-hel-pa ĝis vi ve-nis kaj el-ti-ris mi-n. Mul-taj-n dan-koj-n.”

“Jen, vere, plezuriga informo,” diris Vilulo. “Mi suspektis ke mia frato estas kaptito de Ruggedo; sed nun mi scias. Diru al ni, Tiktoko, kiel ni atingu la subteran kavernon de la Reĝo de la Knomoj?”

“Plej bo-ne ni mar-ŝu,” diris Tiktoko. “Aŭ eb-le ram-pu, aŭ sal-tu, aŭ ru-li-ĝu ĝis a-tin-gi ĝi-n; sed plej bo-ne es-tas mar-ŝi.”

“Mi scias; sed kiun vojon ni sekvu?”

“Mi-a me-ka-nis-mo ne es-tas kon-stru-i-ta por sci-i ti-o-n,” respondis Tiktoko.

“Ekzistas pli ol unu enirejo al la subtera kaverno,” diris Polikromo, “sed maljuna Ruggedo lerte kaŝis ĉiun aperturon, por ke teruloj ne entrudiĝu en lian regnon. Se ni ja trovos vojon subteren, estos hazarde.”

“Sekve,” diris Betinjo, “ni elektu kiun ajn vojon hazarde, kaj ni vidu kien ĝi kondukos nin.”

“Tio sonas bonsenca,” deklaris la Princino. “Eble ni bezonos multan tempon por trovi Ruggedon, sed ni havas pli da tempo ol da io alia.”

Ĉapitro Sep

“Si vi te-nos mi-n bo-ne stre-ĉi-ta,” diris Tiktoko, “mi taŭ-gos dum mil jar-oj.”

“Do la sola demando decidenda estas kiun vojon sekvi,” aldonis Vilulo, rigardante unue unu vojon, poste alian.

Sed dum ili staris hezitante, kurioza sono atingis iliajn orelojn—sono kia de la marŝado de multaj piedoj.

“Kio venas?” kriis Betinjo; kaj ŝi kuris al la maldekstra vojo kaj rigardis laŭ la vojo. “Sed estas armeo!” ŝi kriis. “Kion ni faru: kaŝu nin aŭ kuru?”

“Staru senmove,” ordonis Vilulo. “Mi ne timas armeon. Se ili montriĝos amikemaj, ili povos helpi nin; se ili estas malamikemaj, mi montros al ili la Amo-Magneton.”





ĈAPITRO 8

Tiktoko Trovas Teruran Taskon

DUM Vilulo kaj liaj kunuloj staris grupe ĉe unu flanko, la Armeo de Ugabuo proksimiĝadis laŭ la vojo, la sonon de iliaj piedoj fojfoje akompanis mizera krieto kiam unu el la oficiroj paŝis sur akran ŝtonon aŭ lia humero frapiĝis kontraŭ la glavtenilon de apudulo.

Nun el inter la arboj marŝis Soldato Fajliloj, portante la standardon de Ugabuo, kiu flirtis de longa stango. Tiun stangon li fiksas en la teron tuj antaŭ la puto kaj li kriis laŭtavoĉe:

“Mi nun konkeras ĉi tiun teritorion nome de Reĝino Kaj Ceter de Ugabuo, kaj ĉiujn loĝantojn de ĉi tiu lando mi proklamas ŝiaj sklavoj!”

Ĉapitro Ok

Kelkaj oficiroj puŝis siajn kapojn el inter la arbustoj kaj demandis:

“Ĉu libera Soldato Fajliloj?”

“Nek bera nek leguma,” estis la respondo, “sen disputo.”

“Nu, disa aŭ ne, puto sufiĉas por mi,” diris Generalo Vafleto, kuraĝiĝante antaŭeniri al la puto; sed ĝuste tiam li ekvidis Tiktokon kaj Vilulon kaj tuj surgenuiĝis, tremante kaj timante kaj kriis:

“Kompaton, afablaj malamikoj! Kompaton! Lasu nin vivi kaj ni estos viaj sklavoj poreterne!”

La aliaj oficiroj, kiuj nun ankaŭ antaŭeniris en la liberan spacon, simile surgenuiĝis kaj petegis kompaton.

Fajliloj turnis sin kaj, vidante la nekonatojn unuafoje, ekzamenis ilin tre scivoleme. Trovinte ke tri el la grupo estas knabinoj, li levis sian ĉapon kaj ĝentile klinis sin.

“Kio estas?” demandis severa voĉo, kiam Reĝino Kaj atingis la lokon kaj vidis sian riverencantan armeon.

“Permesu ke ni konigu nin,” respondis Vilulo, antaŭenpaŝante. “Jen Tiktoko, la Horloĝfunkcia Homo—kiu funkcias pli bone ol kelkaj viandaj homoj. Kaj jen Princino Ozga de Rozlando, ĝuste nun domaĝe ekzilita el sia Regno de Rozoj. Post ŝi mi prezentas Polikromon, ĉielfeinon, kiu akcidente perdis sian Arkon kaj ne povas trovi la vojon hejmen. La malgranda knabino estas Betinjo Bobin, el iu

Tiktoko de Oz

nekonata terparadizo nomata Oklahoma, kaj kun ŝi vi povas vidi S-ron Hanĉjo, mulo longvosta kaj iritiĝema.”

“Pu!” diris Kaj, malestime; “bela grupo de vagabondoj! Perditaj kaj forvagintaj, mi supozas, kaj ne valorantaj kaptiĝon fare de Reĝino. Mi bedaŭras esti konkerinta vin.”

“Sed vi ankoraŭ ne konkeris nin,” vokis Betinjo indigne.

“Ne,” konsentis Fajliloj, “tio estas vera. Sed se miaj oficiroj bonvole komandos ke mi konkeru vin, mi tuj faros tion, kaj post tio ni povos ĉesi kvereladi kaj pli plezure konversacii.”

La oficiroj jam levis sin de siaj genuoj kaj brosis la polvon de siaj pantalonoj. Al ili la malamikoj ne aspektis ferocaj, do la Generaloj kaj Koloneloj kaj Majoroj kaj Kapitanoj rekuraĝiĝis fronti ilin kaj komencis plej arogante marŝi antaŭ ili.

“Necesas kompreni,” diris Kaj, “ke mi estas la Reĝino de Ugabuo, kaj ĉi tiu estas mia nevenkebla Armeo. Ni okupas nin per konkerado de la mondo, kaj ĉar ŝajne vi estas parto de la mondo, kaj obstrukcas nian veturon, necesas ke ni konkeru vin—eĉ kvankam vi ne meritas tian altan honoron.”

“Ne gravas,” diris Vilulo. “Konkeru nin laŭdezire. Ne ĝenas nin.”

“Sed ni rifuzas esti sklavo de iu ajn,” aldonis Betinjo, pozitive.



Tiktoko de Oz

“Ni decidis tion,” respondis la Reĝino, kolere. “Antaŭen, Soldato Fajliloj, kaj ligu la malamikojn ĉemane kaj ĉepiede!”

Sed Soldato Fajliloj rigardis belan Betinjon kaj fascinan Polikromon kaj la belan Rozprincinon kaj kapneis.

“Estus malĝentile, kaj mi rifuzas,” li asertis.

“Vi devas!” kriis Kaj. “Via devo estas obei ordonojn.”

“Mi neniujn ordonojn ricevis de miaj oficiroj,” protestis la Soldato.

Sed la Generaloj nun kriis: “Antaŭen kaj ligu la kaptitojn!” kaj la Koloneloj kaj la Majoroj kaj la Kapitanoj ripetis la ordonon, kriante ĝin kiel eble plej laŭte.

La bruego ĝenis Hanĉjon, kiu jam rigardadis la Armeon de Ugabuo malaprobe. La mulo nun kuris antaŭen kaj komencis retrenpaŝi cele la oficirojn kaj piedbati feroce kaj danĝere. La atako estis tiom subita ke la oficiroj diskuris kvazaŭ polvo blovata de cikloneto, faligante siajn glavojn dum ili kuris kaj serĉante trovi rifuĝon malantaŭ la arboj kaj arbustoj.

Betinjo gaje ridis pro la komika forpelo de la “nobla armeo”, kaj Polikromo dancis gajege. Sed Kaj furiozis pro tio malnobla venkiĝo de ŝia brava armeo fare de unu malgranda mulo.

“Soldato Fajliloj, mi ordonas ke vi plenumu vian

Ĉapitro Ok

devon!” ŝi rekriis, sed ŝi mem devis faligi sin por eviti la kalkanojn de la mulo—ĉar Hanĉjo tute ne esceptis virinon kiu deklaris sin malamiko. Tamen Betinjo kaptis sian ĉampionon per antaŭbuklo kaj firme tenis lin, kaj kiam la oficiroj vidis ke la mulo estas malhelpata plu ataki ili rampis timeme antaŭen kaj reprenis siajn forĵetitajn glavojn.

“Soldato Fajliloj, prenu kaj ligu tiun kaptitojn!” kriaĉis la Reĝino.

“Ne,” diris Fajliloj, forĵetante sian pafilon kaj demetante la dorsosakon ligitan al lia dorso per rimeno. “Mi rezignas mian postenon de Armeo de Ugabuo. Mi aniĝis por batali la malamikojn kaj fariĝi heroo, sed se vi volas ke iu ligu senhelpajn knabinojn vi devos dungi novan Soldaton.”

Dirinte tion li marŝis al la aliaj kaj premis la manojn de Vilulo kaj Tiktoko.

“Perfido!” kriaĉis Kaj, kaj ĉiuj oficiroj eĥis ŝian krion.

“Absurdaĵo,” diris Fajliloj. “Mi rajtas rezigni kiam mi volas.”

“Neniell!” respondis la Reĝino. “Se vi rezignos tio nuligos mian Armeon, kaj mi ne plu povos konkeri la mondon.” Nun ŝi turnis sin al la oficiroj kaj diris: “Mi devas peti de vi komplezon. Mi scias ke estas maldigne ke oficiroj batalas, sed se vi ne tuj kaptos Soldaton Fajlilojn kaj devigos lin obei miajn ordonojn neniu el ni

Tiktoko de Oz

havos kaptaĵojn. Ankaŭ verŝajne vi ĉiuj suferos malsaton, kaj kiam ni renkontos potencan malamikon vi riskos kaptiĝi kaj sklaviĝi.”

Antaŭvido de tiu terura fato tiom timigis la oficirojn ke ili eltiris siajn glavojn kaj vere feroce kuris al Fajliloj, kiu staris apud Vilulo. Sed la postan momenton ili haltis kaj refalis sur siajn genuojn; ĉar jen, antaŭ ili, estis la brilanta Amo-Magneto, tenata de la mano de la ridetanta Vilulo, kaj vidante tiun magian talismanon ĉiu Ugabuo tuj donis sian koron. Eĉ Kaj vidis la Amo-Magneton, kaj forgesante ĉian malamikecon kaj koleron ŝi ĵetis sin al Vilulo kaj ame ĉirkaŭbrakumis lin.

Alarmite pro tiu neanticipita efekto de la Magneto, Vilulo liberigis sin de la ĉirkaŭantaj brakoj de la Reĝino kaj rapide kaŝis la talismanon en sia poŝo. La aventurantoj el Ugabuo nun estis liaj firmaj amikoj, kaj oni ne plu parolis pri konkeriĝo kaj ligiĝo de anoj de lia grupo.

“Se vi insiste volas konkeri,” diris Vilulo; “vi povos marŝi kun mi al la subtera Regno de Ruggedo. Por konkeri la mondon, laŭ via celo, vi devos konkeri ĉiujn sub ĝia surfaco kiel ankaŭ tiujn sur ĝia surfaco, kaj neniu en la mondo indas konkeriĝon tiom kiom Ruggedo.”

“Kiu estas li?” demandis Kaj.



Tiktoko de Oz

“La Metala Monarko, la Reĝo de la Knomoj.”

“Ĉu li estas riĉa?” demandis Majoro Ŝtrumpoj per fervora voĉo.

“Kompreneble,” respondis Vilulo. “Li posedas ĉiujn subterajn metalojn—oron, arĝenton, kupron, latunon kaj stanon. Li kredas ankaŭ posedi ĉiujn metalojn surterajn, ĉar li diras ke ĉiuj metaloj iam estis parto de lia regno. Do, se vi konkeros la Metalan Monarkon, vi akiros ĉiujn riĉaĵojn de la mondo.”

“Ha!” kriis Generalo Pomo, profunde ĝemante, “tia kaptaĵo vere meritus nian agadon. Ni konkeru lin, Via Moŝto.”

La Reĝino rigardis riproĉe Fajlilojn, kiu nun sidadis apud la bela Princino kaj flustradis en ŝian orelon.

“Ve,” diris Kaj, “mi ne plu havas Armeon. Mi havas multajn kuraĝajn oficirojn, jes, sed neniun ordinaran soldaton kiun ili komandu. Sekve mi ne povos konkeri Ruggedon kaj akiri ĉiujn liajn riĉaĵojn.”

“Kial ne promocii unu el viaj oficiroj al Ordinara Soldato?” demandis Vilulo, sed tuj ĉiu oficiro komencis protesti kaj la Reĝino de Ugabuo kapneis respondante:

“Neeble. Ordinara soldato devas esti timiga batalisto, kaj miaj oficiroj ne kapablas batali. Ili estas treege kuraĝaj kiam necesas komandi ke aliaj batalu, sed ili ne povus mem renkonti la malamikojn kaj venki.”

Ĉapitro Ok

“Tutvere, Via Moŝto,” diris Kolonelo Pruno, fervore. “Ekzistas multaj formoj de kuraĝo, kaj unu persono ne povas posedi ĉiujn formojn. Mi mem estas kuraĝa kiel leono ĉiumaniere escepte de batalado, sed kiam temas pri bataloj mia naturo ribelas. Batalado estas malafabla kaj povas damaĝi aliajn personojn; do, ĉar mi estas nature ĝentila, mi neniam batalas.”

“Nek mi!” kriis ĉiu el la aliaj oficiroj.

“Vidu,” diris Kaj, “kiom senhelpa mi estas. Se Ordinarulo Fajliloj* ne montriĝus perfidulo kaj dizertulo, mi volonte helpus konkeri tiun Ruggedon; sed Armeo sen ordinara soldato estas kia abelo sen pikilo.”

“Mi ne estas perfidulo, Via Moŝto,” protestis Fajliloj. “Mi dece rezignis, ĉar ne plaĉis al mi la laboro. Sed multaj personoj povus anstataŭi min. Kial ne soldatigi la Vilulon?”

“Eble li mortus,” diris Kaj, rigardante Vilulon ameme, “ĉar li estas mortipovulo, kaj povus morti. Se io okazus al li, mia koro rompiĝus.”

“Pli ol mia koro rompiĝus,” deklaris Vilulo. “Agnosku, Via Moŝto, ke mi estas la komandanto de ĉi tiu ekspedicio, ĉar ni serĉas mian fraton, ne kaptaĵojn. Sed mi kaj miaj akompanantoj deziras la helpon de via armeo, kaj se vi helpos nin konkeri Ruggedon kaj tiel savi mian fraton el kaptiteco ni permesos ke vi retenu ĉiujn oron kaj juvelojn kaj aliajn kaptaĵojn trovotajn.”

Tiktoko de Oz

Tiu propono estis tiom alloga ke la oficiroj komencis interflustradi kaj baldaŭ Kolonelo Fromaĝo diris: “Via Moŝto, kombininte niajn cerbojn ni ĵus evoluigis vere grandiozan ideon. Ni soldatigu la Horloĝfunkcian Homon!”

“Ki-u-n? Mi-n?” demandis Tiktoko. “Eĉ ne u-nu se-kun-do-n! Mi ne po-vas ba-ta-li, kaj nep-re ne for-ge-su ke Ru-ge-do ĵe-tis mi-n en la pu-to-n.”

“Tiutempe vi ne havis pafilon,” diris Polikromo. “Sed se vi aniĝos al la Armeo de Ugabuo vi portos la pafilon uzitan de Sinjoro Fajliloj.”

“Sol-da-to de-vas po-vi ku-ri kaj ne nur ba-ta-li,” protestis Tiktoko, “kaj se mi-a me-ka-nis-mo mal-streĉ-iĝ-os, ki-el of-te o-ka-zas, mi nek po-vos ku-ri nek ba-ta-li.”

“Mi tenos vin bone streĉita, Tiktoko,” promesis Betinjo.

“Nu, la ideo ne estas malbona,” diris Vilulo. “Tiktoko estos ideala soldato, ĉar nenio povas damaĝi lin escepte de martelego. Kaj ĉar simpla soldato ŝajne necesas por la Armeo, Tiktoko estas la sola persono en nia grupo kiu taŭgas por la tasko.”

“Ki-o-n mi de-vos fa-ri?” demandis Tiktoko.

“Obei ordonojn,” respondis Kaj. “Kiam la oficiroj ordonos ke vi faru ion, vi devos fari tion; jen ĉio.”

“Kaj tute suface,” diris Fajliloj.

“Ĉu mi ri-ce-vos sa-laj-ro-n?” demandis Tiktoko.

Ĉapitro Ok

“Vi ricevos vian porcion de la kaptaĵoj,” respondis la Reĝino.

“Jes,” komentis Fajliloj, “duono de la kaptaĵoj estos por Reĝino Kaj, la alia duono dividiĝos inter la oficiroj, kaj la Soldato ricevos la restaĵon.”

“Ti-o kon-ten-ti-gos,” diris Tiktoko, prenante la pafilon kaj ekzamenante ĝin miroplene, ĉar li neniam antaŭe vidis tian aferon.

Kaj ligis la dorsosakon al la kupra dorso de Tiktoko kaj diris: “Nun ni pretas marŝi al la Regno de Rugedo kaj konkeri ĝin. Oficiroj, komandu ke la Armeo marŝu.”

“Staru envice!” kriis la Generaloj, elprenante siajn glavojn.

“Staru envice!” kriis la Koloneloj, elprenante siajn glavojn.

“Staru envice!” kriis la Majoroj, elprenante siajn glavojn.

“Staru envice!” kriis la Kapitanoj, elprenante siajn glavojn.

Tiktoko rigardis ilin kaj poste ĉirkaŭ sin surprizite.

“Sta-ru en vi-ŝo? Ki-e es-tas la vi-ŝo, ĉu en la pu-to?”

“Ne,” diris Reĝino Kaj, “vi devas stari en marŝordo.”

“Ĉu la marĉbordo estas proksima?” demandis la Horloĝfunkcia Homo.

“Surŝultrigu vian pafilon kaj staru preta por marŝi,” konsilis Fajliloj, do Tiktoko tenis la pafilon rekta kaj staris senmove.

“Nun kion?” li demandis.

La Reĝino turnis sin al Vilulo.

Tiktoko de Oz

“Kiu vojo kondukas al la kaverno de la Metala Monarko?”

“Ni ne scias, Via Moŝto,” estis la respondo.

“Sed tio estas absurda!” diris Kaj sulkigante sian frunton. “Se ni ne povos atingi Ruggedon, certe ni ne povos konkeri lin.”

“Vi pravas,” agnoskis Vilulo; “sed mi ne diris ke ni ne povos atingi lin. Ni nur trovu la vojon, kaj pri tio ni diskutadis kiam vi kaj via imponega Armeo alvenis.”

“Nu, do, rapidu trovi ĝin,” knalvoĉis la Reĝino.

Tio ne estis facila tasko. Ili ĉiuj staris rigardante de unu vojo al alia perpleksite. La vojoj radiadis el la malgranda libera spaco kiel la radioj de la tagmeza suno, kaj ĉiu vojo similis ĉiun alian vojon.

Fajliloj kaj la Roza Princino, kiu jam fariĝis bonaj amikoj, antaŭeniris iomete laŭ unu el la vojoj kaj trovis ke ĝin flankas belaj sovaĝaj floroj.

“Kial ne peti la florojn informi vin pri la vojo?” li diris al sia akompanantino.

“La florojn?” respondis la Princino, surprizite pro tiu demando.

“Kompreneble,” diris Fajliloj. “La kampofloroj estas gekuzoj de Roza Princino, kaj mi kredas ke ili informus vin se vi demandus.”

Ŝi rigardis pli atente la florojn. Estis centoj da blankaj



Ĉapitro Ok

lekantetoj, oraj ranunkoloj, bluaj kampanuloj kaj dafodiloj kreskantaj apud la vojo, kaj ĉiu florkapo estis firme fiksita sur sia maldika sed fortika trunketo. Eĉ estis kelkaj sovaĝaj rozoj disŝutitaj tie kaj tie kaj eble ĉar la Princino vidis ilin ŝi akiris kuraĝon por fari la gravan demandon.

Ŝi surgenuiĝis, frontante la florojn, kaj etendis ambaŭ brakojn plede al ili.

“Diru al mi, belaj gekuzoj,” ŝi diris per sia dolĉa, milda voĉo, “kiu vojo kondukos nin al la Regno de Ruggedo, la Reĝo de la Knomoj?”

Tuj ĉiuj trunketoj kliniĝis gracie dekstren kaj la florkapoj kapgestis unu—du—trifoje tiudirekten.

“Jen ĝi!” kriis Fajliloj ĝoje. “Nun ni scias la vojon.”

Ozga surpiediĝis kaj rigardis miroplene la kampoflorojn, kiuj nun rerektiĝis.

“Ĉu kaŭzis tion la vento?” ŝi demandis per mallaŭta flustro.

“Neniel,” respondis Fajliloj. “Eĉ ne plej eta venteto blovas. Sed tiuj belaj floroj ja estas viaj gekuzoj kaj tuj respondis vian demandon, kaj mi sciis ke tiel estos.”



ĈAPITRO 9

La Rabio de Rugedo Ruĝe Radias

LA vojo elektita de la aventurantoj kondukis surmonten kaj envalen kaj turnadis sin tie kaj tie laŭ ŝajne sencela maniero. Sed konstante ĝi pliproksimiĝis al aro da malaltaj montoj kaj Fajliloj diris pli ol unufoje ke li certas ke la enirejo al la kaverno de Rugedo troviĝas inter tiuj severaj montetoj.

Pri tio li tute pravis. Profunde sub la plej proksima monto estis belega ĉambro ĉizita el la solida roko, kies muroj kaj tegmento scintilis pro miloj da grandiozaj juveloj. Tie, sur trono el pura oro, sidis la fama Reĝo de la Knomoj, vestita per belaj roboj kaj portanta superban kronon ĉizitan el unusola sangoruĝa rubio.

Ĉapitro Naŭ

Rugedo, la Monarko de ĉiuj Metaloj kaj Valoraj Ŝtonoj de la Subtera Mondo, estis ronda vireto kun fluanta blanka barbo, ruĝa vizaĝo, brilantaj okuloj kaj severa mieno kiu kovris lian tutan frunton. Oni supozus, rigardante lin, ke li sendube estas gaja; oni supozus, pro lia enorma riĉeco, ke li sendube estas feliĉa; sed tiel ne estis. La Metala Monarko estis malagrabra kaj kolera ĉar mortipovuloj elfosis tiom da trezoro el la tero kaj gardas ĝin surtere, kie la tuta potenco de Rugedo kaj liaj knomoj ne povas repreni ĝin. Li malamis ne nur la mortipovulojn sed ankaŭ la feojn loĝantajn sur la tero aŭ super ĝi, kaj anstataŭ esti kontenta pro la riĉaĵoj kiujn li plu posedas li malfeliĉis ĉar li ne posedas ĉiujn oron kaj juvelojn en la mondo.

Rugedo estis preskaŭ endorma, en sia seĝo, kiam li subite rektiĝis, elsonigis koleran muĝon kaj komencis batadi grandan gongon kiu staris apud li.

La sono plenigis la vastan kavernon kaj penetris ĝis multaj preteraj kavernoj, kie nenombreblaj knomoj prilaboradis siajn senfinajn taskojn, martelante oron kaj arĝenton kaj aliajn metalojn, aŭ fandante ercojn en grandaj fornoj, aŭ polurante scintilantajn gemojn. La knomoj tremis pro la sono de la gongo de la Reĝo kaj flustris timeme unu al alia ke io malagrabra nepre okazos; sed neniu aŭdacis heziti dum sia laborado.

Tiktoko de Oz

La pezaj kurtenoj el ordrapo repuŝiĝis kaj Kalikot, la Alta Ĉambelano de la Reĝo, eniris antaŭ la Reganton.

“Kio estas, Via Moŝto?” li demandis, larĝe oscedante, ĉar li ĵus vekigis.

“Estas?” muĝis Rugedo, feroce batante la plankon per sia piedo. “Tiuj malsaĝaj mortipovuloj estas, jen kio! Kaj baldaŭ ili estos ĉi tie.”

“Ĉi tie?” demandis Kalikot.

“Jes!”

“Kiel vi scias?” daŭrigis la Ĉambelano, denove oscedante.

“Mi sentas per miaj ostoj,” diris Rugedo. “Mi ĉiam sentas kiam tiuj malamindaj terrampuloj proksimiĝas al mia Regno. Mi estas certa, Kalikot, ke mortipovuloj ĉimomente mem estas survoje por ĝeni min—kaj mi malamas mortipovulojn pli ol eĉ katarian teon!”

“Do, kion mi faru?” demandis la knomo.

“Rigardu per via spiontubo, kaj vidu kie estas la invadantoj,” ordonis la Reĝo.

Do Kalikot iris al tubo en la muro el roko kaj metis sian okulon sur ĝin. La tubo iris el la kaverno laŭ la flanko de la monto kaj ĉirkaŭiris plurajn kurbaĵojn kaj angulojn, sed ĉar ĝi estis magia spiontubo Kalikot povis vidi per ĝi egalfacile kiel per rekta.

Ĉapitro Naŭ

“Ho—hum,” diris li. “Mi vidas ilin, Via Moŝto.”

“Kiaj ili aspektas?” demandis la Monarko.

“Estas malfacile respondi tiun demandon, ĉar ĝis nun mi neniam vidis pli kuriozan grupon da uloj,” respondis la knomo. “Tamen, tia kolektiĝo de kuriozuloj povus esti danĝera. Estas kupra homo, funkciigata de maŝinoj—”

“Ba! temas nur pri Tiktoko,” diris Rugedo. “Mi ne timas lin. Ja, antaŭ nelonge mi renkontis lin kaj ĵetis lin en puton.”

“Do evidente iu eltiris lin,” diris Kalikot. “Kaj estas knabineto—”

“Doroteo?” demandis Rugedo, saltante pro timo.

“Ne; alia knabino. Efektive, pluraj knabinoj, diversgrandaj; sed ne Doroteo, nek Ozma.”

“Bone!” kriis la Reĝo, ĝemante pro plitrankviliĝo.

Kalikot plu premis sian okulon al la spiontubo.

“Mi vidas,” diris li, “armeon de viroj el Ugabuo. Ĉiuj estas oficiroj kaj portas glavojn. Kaj estas Vilulo—li aspektas tute ne danĝera—kaj malgranda azeno kun grandaj oreloj.”

“Pu!” kriis Rugedo, klakante per siaj fingroj malestime. “Mi ne timas tian amasaĉon. Dekduo da miaj knomoj povas detrui ilin ĉiujn dum momenteto.”

“Mi ne certas pri tio,” diris Kalikot. “Estas malfacile detrui homojn el Ugabuo, kaj mi kredas ke la Roza

Tiktoko de Oz

Princino estas feino. Kaj vi scias tute bone ke Polikromon, la filinon de la Ĉielarko, povas damaĝi neniu knomo.”

“Polikromo! Ĉu ŝi estas en la grupo?” demandis la Reĝo.

“Jes; mi ĵus rekonis ŝin.”

“Do tiuj uloj venas ĉi tien pro neniu paca celo,” deklaris Ruggedo, feroce sulkigante la frunton. “Efektive, neniu venas ĉi tien pro paca celo. Mi malamas ĉiujn, kaj ĉiuj malamas min!”

“Tute vere,” diris Kalikot.

“Necesos iel malebligi ke tiuj uloj atingu mian regnon. Kie ili estas nun?”

“Ĝuste nun ili trairas la Kaŭĉukan Landon, Via Moŝto.”

“Bone! Ĉu viaj magnetaj kaŭĉukaj dratoj bone funkcias?”

“Mi kredas ke jes,” respondis Kalikot. “Ĉu via Reĝa Volo estas ke ni iom amuzu nin per tiuj invadantoj?”

“Jes,” respondis Ruggedo. “Mi volas instrui al ili ion neniam forgesotan.”

Nu, Vilulo tute ne konsciis ke li estas en Kaŭĉuka Lando, nek iu el liaj akompanantoj. Ili rimarkis ke ĉio ĉirkaŭ ili havas nehelan grizan koloron kaj ke la vojo sur kiu ili marŝas estas mola kaj resaltema, tamen ili eĉ ne suspektis ke la rokoj kaj arboj estas el kaŭĉuko kaj eĉ la vojo surtretata konsistas el kaŭĉuko.

Ĉapitro Naŭ

Baldaŭ ili atingis rivereton kie brilanta akvo kuras tra profunda kanalo kaj forrapidas inter altaj rokoj malalten cele la fundon de la flanko de la monto. Trans la rivereto estis paŝtonoj, tiel lokitaj ke veturantoj povas facile salti de unu al alia, kaj tiel transiri la akvon al la alia bordo.

Tiktoko marŝis antaŭe, sekvate de siaj oficiroj kaj Reĝino Kaj. Post ili iris Betinjo Bobin kaj Hanĉjo, Polikromo kaj Vilulo, kaj plejlaste la Roza Princino kun Fajliloj. La Horloĝfunkcia Homo vidis la rivereton kaj la paŝtonojn kaj, senhalte, metis sian piedon sur la unuan ŝtonon.

La rezulto estis miriga. Unue li subiĝis en la molan kaŭĉukon, kiu poste resaltis kaj sorigis Tiktokon en la aero, kie li renversiĝis plurfoje kaj surteriĝis sur kaŭĉukan rokon longe malantaŭ la grupo.

Generalo Pomo ne vidis Tiktokon salti, ĉar ĉi tiu tre rapide malaperis; sekve li ankaŭ paŝis sur la ŝtonon (vi prave divenas ke ĝi estis konektita al la magneta kaŭĉuka drato de Kalikot) kaj tuj suprenĵetiĝis kvazaŭ sago. Generalo Vafleto sekvis kaj lin trafis simila sorto, sed nun la aliaj rimarkis ke io malĝustas kaj unuanime ili haltigis la marŝvicon kaj reregardis laŭlonge de la vojo.

Jen Tiktoko, ankoraŭ saltanta de unu kaŭĉuka roko al alia, ĉiufoje leviĝante malpli alten super la tero. Kaj

Tiktoko de Oz

jen Generalo Pomo, saltanta alidirekten, kun sia triangula ĉapelo falinta sur liajn okulojn kaj la longa glavo frapanta la brakojn kaj kapon dum ĝi balanciĝis unuflanken kaj aliflanken. Jen, ankaŭ, Generalo Vafleto, kiu batiĝis kapantaŭe kontraŭ kaŭĉukan rokon kaj estis tiom ĉifita ke lia ronda korpo aspektis saltanta pilko pli ol homa formo.

Betinjo ridis gaje pro la kurioza vidaĵo kaj Polikromo eĥis ŝian ridon. Sed Ozga estis serioza kaj sindemandanta, kaj Reĝino Kaj koleriĝis vidante la ĉefoficiojn de la Armeo de Ugabuo saltadi tiom maldigne. Ŝi kriis al ili ke ili haltu, sed ili ne povis obei, eĉ kvankam ili volonte farus tion. Fine, tamen, ili ĉiuj ĉesis saltadi kaj sukcesis surpiediĝi kaj rekuniĝi kun la Armeo.

“Kial vi faris tion?” demandis Kaj, kiu aspektis multe provokita.

“Ne demandu al ili la kialon,” diris Vilulo tre serioze. “Mi sciis ke vi demandos al ili la kialon, sed vi devus ne fari tion. La kialo estas klara. Tiuj ŝtonoj estas el kaŭĉuko; sekve ili ne estas ŝtonoj. Eĉ ĉi tiu vojo ne estas vojo; ĝi estas kaŭĉuka. Se ni ne tre zorgos, via Moŝto, ni verŝajne ĉiuj devos salti, same kiel viaj kompatindaj oficiroj kaj Tiktoko.”

“Do ni zorgu,” komentis Fajliloj, kiu estis plena de



Tiktoko de Oz

sago; sed Polikromo volis provi la kvaliton de la kaŭĉuko, do ŝi komencis danci. Ĉiu paŝo pli alten ĵetis ŝin en la aeron, tiel ke ŝi similis grandan papilion leĝere flirtantan. Baldaŭ ŝi saltegis kaj flugis trans la rivereton, surteriĝante leĝere kaj firme aliflanke.

“Nenia kaŭĉuko ĉi tie,” ŝi vokis al ili. “Vi ĉiuj provu transsalti la rivereton sen tuŝi la paŝŝtonojn.”

Kaj kaj ŝiaj oficiroj ne emis provi tian riskoplenan aventuron, sed Betinjo tuj komprenis la valoron de la sugesto kaj komencis saltadi ĝis ŝi trovis sin saltanta preskaŭ tiom alten kiel Polikromo. Tiam ŝi subite klinis sin antaŭen kaj la sekva salto portis ŝin facile trans la rivereton, kie ŝi surteriĝis apud la Filino de la Ĉielarko.

“Venu, Hanĉjo!” vokis la knabino, kaj la azeno penis obei. Li sukcesis salti iom alten sed kiam li provis salti trans la rivereton li mistaksis la distancon kaj falis plaŭde en la mezon de la akvo.

“Hi-ha!” li ploris, baraktante por naĝi al la bordo. Betinjo antaŭenkuris por helpi lin eliri, sed kiam la mulo staris sekure apud ŝi ŝi mirege trovis ke li tute ne estas malseka.

“La akvo estas seka,” diris Polikromo, trempante sian manon en la rivereton kaj montrante ke la akvo falas de ĝi kaj lasas ĝin tute seka.

Ĉapitro Naŭ

“Tiukaze,” respondis Betinjo, “ili ĉiuj povos marŝi tra la akvon.”

Ŝi vokis al Ozga kaj Vilulo dirante ke ili transvadu, certigante al ili ke la akvo estas neprofunda kaj ne malsekigos ilin. Tuj ili sekvis ŝian konsilon, evitante la kaŭĉukajn paŝtonojn, kaj transiris facile. Tio kuraĝigis la tutan grupon vadi tra la seka akvo, kaj post kelkaj minutoj ili ĉiuj grupiĝis sur la bordo kaj rekomencis sian veturon laŭ la vojo kondukanta al la regno de la Reĝo de la Knomoj.

Kiam Kalikot denove rigardis per sia magia spiontubo li kriis:

“Misfortuno, Via Moŝto! Ĉiuj invadantoj trapasis la Kaŭĉukan Landon kaj nun rapide proksimiĝas al la enirejo de viaj kavernoj.”

Rugedo kolerege sakris pro la informo kaj lia kolero estis tiom granda ke plurfoje, dum li tien kaj reen paŝadis en sia juvelita kaverno, li paŭzis por piedbati la tibiojn de Kalikot, kiuj estis tiom sentemaj ke la kompatinda knomo kriegis pro doloro. Fine la Reĝo diris:

“Neniu alia rimedo ekzistas ol faligi tiujn aŭdacajn invadantojn en la Kavan Tubon.”

Kalikot eksaltis pro tio kaj rigardis sian mastron miroplene.

Tiktoko de Oz

“Se vi faros tion, Via Moŝto,” li diris, “vi tre kolerigos Tititi-Huĉun.”

“Ne gravas,” respondis Rugedo. “Tititi-Huĉu loĝas aliflanke de la mondo, do kiel ĝenos min lia kolero?”

Kalikot tremis kaj elsonigis ĝemeton.

“Memoru liajn terurajn fortojn,” li pledis, “kaj memoru ke li avertis vin, kiam lastafoje vi glitigis ulojn tra la Kavan Tubon, ke se vi denove faros tion li venĝos.”

La Metala Monarko marŝis tien kaj reen silente, profunde pensante.

“El du danĝeroj,” diris li, “estas saĝe elekti la plej malgravan. Kion, laŭ via supozo, tiuj invadantoj volas?”


“La Longorela Aŭskultanto aŭskultu ilin,” proponis Kalikot.

“Alvoku lin tuj!” ordonis Rugedo fervore.

Do post kelkaj minutoj eniris la kavernon knomo kun enormaj oreloj, kiu profunde klinis sin antaŭ la Reĝo.

“Fremduloj proksimiĝas,” diris Rugedo, “kaj mi volas scii ilian celon. Atente aŭskultu iliajn parolojn kaj diru al mi kial ili venas ĉi tien kaj cele kion.”

La knomo denove riverencis kaj etendis siajn grandajn orelojn, milde balancante ilin supren kaj malsupren kaj ambaŭflanken. Duonon de horo li staris silente, aŭskultante, dum senpacienciĝis la Reĝo kaj



Tiktoko de Oz

Kalikot pro la prokrasto. Fine la Longorela Aŭskultanto parolis:

“Vilulo venas ĉi tien por savi sian fraton el kaptiteco,” diris li.

“Ha, la Malbelulon!” kriis Ruggedo. “Nu, Vilulo rehavu sian malbelan fraton, ne gravas al mi. Li estas pigra kaj rifuzas labori kaj konstante ĝenas min. Kie estas la Malbelulo nun, Kalikot?”

“Kiam lastafoje Via Moŝto renkontis la kaptiton vi ordonis ke mi sendu lin al la Metala Arbaro, kaj mi faris tion. Mi supozas ke li ankoraŭ estas tie.”

“Tre bone. La invandantoj malfacile trovos la Metalan Arbaron,” diris la Reĝo, ridetante pro malica plezuro, “ĉar ja ofte mi mem ne povas trovi ĝin, kvankam mi mem kreis la arbaron kaj faris ĉiun arbon, el oro kaj arĝento, por sekure gardi tie la valorajn metalojn kontraŭ mortipovuloj. Sed diru al mi, Aŭskultanto, ĉu la fremduloj volas ankoraŭ ion?”

“Jes ja!” respondis la knomo. “La Armeo de Ugabuo nepre volas kapti ĉiujn riĉajn metalojn kaj maloftajn juvelojn en via regno, kaj la oficiroj kaj ilia Reĝino interkonsentis dividi la kaptaĵojn kaj forporti ilin.”

Aŭdinte tion Ruggedo elkriis koleregan muĝon kaj komencis saltodancadi, ruli siajn okulojn, kunfrapi siajn dentojn kaj swingi siajn brakojn furioze. Poste, dum

Ĉapitro Naŭ

ekstazo de kolero, li prenis la longajn orelojn de la Aŭskultanto kaj tiris kaj tordis ilin kruele; sed Kalikot kaptis la sceptron de la Reĝo kaj frapis liajn fingrartikojn, tiel ke Rugedo forlasis la orelojn kaj ekĉasis sian Reĝan Ĉambelanon ĉirkaŭ la tronon.

La Aŭskultanto utiligis tiun oportunon por forgliti de la kaverno kaj eskapi, kaj laciginte sin per ĉasado al Kalikot la Reĝo ĵetis sin sur sian tronon kaj anhelegis, dum li rigardadis malice sian defiemman regaton.

“Ŝparu vian forton por batali la malamikojn,” proponis Kalikot. “Okazos terura batalo kiam la Armeo de Ugabuo venos ĉi tien.”

“La Armeo ne venos ĉi tien,” diris la Reĝo, ankoraŭ tusante kaj anhelante. “Mi faligos ilin en la Kavan Tubon—ĉiun viron kaj inon!”

“Kaj vi tiel defios Tititi-Huĉun?” demandis Kalikot.

“Jes. Iru tuj al mia Ĉefmagiisto kaj ordonu ke li turnu la vojon cele la Kavan Tubon, kaj li faru la enirejon de la Tubo nevidebla, tiel ke ili ĉiuj falos en ĝin.”


Kalikot foriris skuante sian kapon, ĉar li kredis ke Rugedo tre grave eraras. Li trovis la Magiiston kaj ordonis ke la vojo tordiĝu tiel ke ĝi kondukos rekte al la aperturo de la Kava Tubo, kaj ke tiu aperturo nevidebliĝu.

Obeinte la ordonojn de sia mastro, la Reĝa Ĉambelano

Tiktoko de Oz

iris al sia privata ĉambro kaj komencis verki leterojn por rekomendi sin, dirante ke li estas honestulo, bona servisto, kaj manĝas malmulte.

“Tre baldaŭ,” li diris al si, “mi devos serĉi alian postenon, ĉar tute certe Rugedo ruinigis sin per tiu senzorga defio al la potenca Tititi-Huĉu. Kaj kiam oni serĉas postenon rekomendoletero estas tre efikoplana.”





ĈAPITRO 10

Tra Terura Tubo

VERŝAJNE Polikromo, kaj eble Reĝino Kaj kaj ŝia Armeo, povintus forpeli la sorĉon faritan de la Ĉefmagiisto de Ruggedo se ili sciis ke danĝero pretas; ĉar la Filino de la Ĉielarko estis feino kaj ĉar Ugabuo estas parto de la Lando Oz ĝiaj loĝantoj ne estas facile trompeblaj per tia vulgara magio kian majstris la Reĝo de la Knomoj. Sed neniu suspektis specialan danĝeron ĝis post sia eniro en la kavernon de Ruggedo, do ili marŝadis tute kontente kiam Tiktoko, kiu antaŭmarŝadis, ekmalaperis.

La oficiroj kredis ke sendube li ĉirkaŭiris angulon, do ili plu marŝis kaj ĉiuj same ekmalaperis—unu post la alia.

Tiktoko de Oz

Tio iom surprizis Reĝinon Kaj, kaj antaŭen rapidinte por informiĝi pri la kialo ankaŭ ŝi ekmalaperis.

Betinjo Bobin lacigis siajn piedojn per marŝado, do nun ŝi rajdis sur la dorso de la forta muleto, rigardante malantaŭen kaj parolante al Vilulo kaj Polikromo, kiuj estis tuj malantaŭ ŝi. Subite Hanĉjo antaŭenstumblis kaj komencis faladi kaj Betinjo ĵetiĝus trans lian kapon se ŝi ne kaptus la vilan kolon de la mulo per ambaŭ brakoj kaj firmege tenus.

Tute ĉirkaŭis ilin mallumo, kaj ili ne falis rekte suben sed laŭŝajne glitis laŭ abrupta deklivo. La hufoj de Hanĉjo tuŝis ian glatan substancon trans kiun li glitis ventorapide. Unufoje la kalkanoj de Betinjo supreniĝis kaj frapis similan substancon super ŝi. Ili efektive trairadis la “Kavan Tubon” kiu kondukas al la alia flanko de la mondo.

“Haltu, Hanĉjo—haltu!” kriis la knabino; sed Hanĉjo nur diris plendoplenan “Hi-ha!” ĉar li ja tute ne povis obei.

Post pluraj minutoj, dum kiuj nenia damaĝo trafis ilin, Betinjo rekuraĝiĝis. Ŝi povis vidi tute nenion kaj ŝi povis aŭdi nenion escepte de la forblovado de aero kiu pasis ŝiajn orelojn dum ili plonĝis suben laŭlonge de la Tubo. Ĉu ŝi kaj Hanĉjo estas solaj, aŭ ĉu la aliaj estas kun ili, ŝi ne povis decidi. Sed se iu povus fari fulmofoton pri la Tubo



Ĉapitro Dek

en tiu momento tre kurioza bildo rezultus. Jen Tiktoko, kuŝanta sur sia dorso kaj glitanta kapantaŭen laŭ la deklivo. Kaj jen la oficiroj de la Armeo de Ugabuo, kunĵetitaj kiel konfuzita amaso, skuantaj siajn brakojn kaj klopodantaj ŝildi siajn vizaĝojn kontraŭ la kunfrapiĝantaj glavoj, kiuj balancis tien kaj reen dum la rapida veturo kaj batis ĉiun atingeblan. Nun sekvis Reĝino Kaj, kiu trafis la Tubon sidante kaj flugadis senzorge kaj vigle kaj tute perplekse, ĉar la kompatindulino tute ne sciis kio okazas al ŝi. Post ŝi, ne tre multe for sed nevidate de la aliaj pro la inkeca mallumo, glitis Betinjo kaj Hanĉjo, kaj post ili estis Vilulo kaj Polikromo kaj fine Fajliloj kaj la Princino.

Kiam unue ili falis en la Tubon, ĉiuj estis tro konfuzitaj por povi pensi klare, sed la falo estis longa, ĉar la kavaĵo kondukis rekte tra la teron al loko precize kontraŭ la Regno de la Reĝo de la Knomoj, kaj longe antaŭ ol la aventurantoj atingis la finon ili komencis resagiĝi.

“Estas aĉe, Hanĉjo!” kriis Betinjo laŭtavoĉe, kaj Reĝino Kaj aŭdis ŝin kaj kriis: “Ĉu vi estas eksterdanĝera, Betinjo?”

“Jadi, ne!” respondis la knabineto. “Kiel mi povus esti eksterdanĝera kiam mi rapidas cent kilometrojn ĉiuminute?” Post paŭzo ŝi aldonis: “Sed kien ni iras, laŭ via supozo, Via Moŝto?”

Tiktoko de Oz

“Ne demandu al ŝi tion, ne demandu!” diris Vilulo, kiu ne estis tro distanca por aŭdi ilin. “Kaj ne demandu al mi la kialon.”

“Kial?” diris Betinjo.

“Neniu povas scii kien ni iras ĝis ni atingos ĝin,” respondis Vilulo, kaj li subite kriis “Ve!” ĉar Polikromo rapidiĝis kaj nun sidas sur lia kapo.

La Filino de la Ĉielarko ridis gaje, kaj tiom infekta estis tiu gaja rido ke Betinjo eĥis ĝin kaj Hanĉjo diris “Hi-ha!” per milda kaj simpatia voĉtono.

“Malgraŭ tio mi volas scii kien kaj kiam ni alvenos,” kriis la knabineto.

“Pacienca kaj vi informiĝos, kara,” diris Polikromo. “Sed vere estas stranga sperto, ĉu ne? Jen mi, kies hejmo estas en la ĉielo, veturanta tra la centron de la tero—kie mi neniam anticipis troviĝi!”

“Kiel vi scias ke ni estas en la centro de la tero?” demandis Betinjo, kaj ŝia voĉo tremis iomete pro nervozeco.

“Nu, ni ne povas esti aliloke,” respondis Polikromo. “Mi ofte aŭdis pri ĉi tiu koridoro, kiun iam konstruis Magiisto kiu amis veturi. Li kredis ke li ne bezonos ĉirkaŭiri la surfacon de la tero, sed li falis tra la Tubon tiom rapide ke li ĵetiĝis el la alia flanko kaj batiĝis kontraŭ stelon en la ĉielo, kiu tuj eksplodis.”

“La stelo eksplodis?” demandis Betinjo miroplene.

Ĉapitro Dek

“Jes, ĉar tiom forte la Magiisto batiĝis kontraŭ ĝin.”

“Kaj kio poste okazis al la Magiisto?” demandis la knabino.

“Neniu scias,” respondis Polikromo. “Sed mi opinias ke ne multe gravas.”

“Multe gravos, se ankaŭ ni trafos la stelojn kiam ni eliros,” diris Reĝino Kaj, ĝemante.

“Ne maltrankviliĝu,” konsilis Polikromo. “Mi kredas ke la Magiisto iris alidirekten, kaj verŝajne li falis multe pli rapide ol ni.”

“Laŭ mi ni jam iras sufiĉe rapide,” komentis Vilulo, milde forpuŝante kalkanumon de Polikromo el sia maldekstra okulo. “Ĉu vi bonvolos fali sola, kara?”

“Mi penos,” ridis la Filino de la Ĉielarko.

Tutdume ili rapide faladis tra la Tubo, kaj ne estis tiel facile paroli kiel eble vi imagas dum vi legas iliajn vortojn. Sed kvankam ili estis senpovaj kaj plene obskuris ilia fato, iom feliĉigis ilin ke ili ja kapablas konversacii eĉ kvankam malfacile.

Fajliloj kaj Ozga ankaŭ konversaciadis dum ili kroĉiĝis unu al la alia, kaj la junulo brave strebis sentimigi la Princinon kvankam li mem ege timadis ne nur rilate al ŝi sed ankaŭ rilate al si.

Horo, dum tia timiga cirkonstanco, estas tre multa tempo, kaj dum pli ol horo ili daŭrigis sian teruran

Tiktoko de Oz

veturon. Sed ĝuste kiam ili komencis timi ke la Tubo neniam finiĝos, Tiktoko puŝiĝis en la taglumon kaj, cirklinte gracie en la aero, li falis plaŭde en grandan marmoran fonton.

Elpuŝiĝis la oficiroj, rapide unu post alia, falante kalkanojn super kapon kaj trafante la teron tre maldigne.

“Je la amo al sasafraso!” kriis Plendema Persono, kiu sarkadis palruĝajn violetojn en ĝardeno. “Kion signifas ĉio ĉi?”

Responde, Reĝino Kaj flugis alten el la tubo, veturis tra la aero alte kiel la arboj, kaj surteriĝis precize sur la supron de la Plendema Persono, tiel frakasante juvelitan kronon sur liajn okulojn kaj faligante lin al la tero.

La mulo estis pli peza kaj Betinjo kroĉiĝis al lia dorso, do li ne tiom alten flugis. Bonfortune por lia malgranda rajdanto li trafis la teron sur siaj kvar piedoj. Betinjon tio skuis iomete sed ne damaĝis kaj kiam ŝi ĉirkaŭrigardis ŝi vidis la Reĝinon kaj la Plendeman Personon baraktadi sur la tero, kie la viro strebis sufoki Kajon kaj ŝi metis ambaŭ manojn en lian densan hararon kaj tiradis kiel eble plej forte. Kelkaj oficiroj, kiam ili surpiediĝis, rapidis distiri la baraktantojn kaj klopodis reteni la Plendeman Personon tiel ke li ne povos denove ataki ilian Reĝinon.

Jam Vilulo, Polikromo, Ozga kaj Fajliloj ĉiuj alvenis



Tiktoko de Oz

kaj scivoleme ekzamenadis la strangan landon en kiu ili trovas sin kaj kiu, laŭ ilia kompreno, estas precize kontraŭ la loko sur la alia flanko de la mondo el kie ili falis en la Tubon. Ĝi ja aspektis bela loko, kaj ŝajne ĝi estis ĝardeno de iu granda Princo, ĉar tra la arba kaj arbusta pejzaĝo videblis la turoj de giganta kastelo. Sed ĝis nun la sola loĝanto renkontinta ilin estis la Plendema Persono ĵus menciita, kiu senprobleme forŝovis la oficiojn kaj nun strebis tiri la frakasitan kronon desur siaj okuloj.

Vilulo, ĉiam ĝentila, helpis lin fari tion kaj kiam la viro estis libera kaj povis denove vidi li rigardis siajn vizitantojn videble mirante.

“Nu, nu, nu!” li kriis. “El kie vi venis kaj kiel vi venis ĉi tien?”

Betinjo strebis respondi al li, ĉar Reĝino Kaj estis malafable silenta.

“Mi ne scias, precize, el kie ni venis, ĉar mi ne scias la nomon de tiu loko,” diris la knabino, “sed la kielo de nia veno estis tra la Kava Tubo.”

“Bonvolu ne nomu ĝin ‘kava’ Tubo,” plendis la Plendema Persono per iritiĝema voĉtono. “Se ĝi estas tubo, nepre ĝi estas kava.”

“Kial?” demandis Betinjo.

“Ĉar ĉiuj tuboj estas tiaj. Sed tiu Tubo estas privata

Ĉapitro Dek

posedaĵo kaj al ĉiuj estas malpermesate fali en ĝin.”

“Ni ne intence faris tion,” klarigis Betinjo; kaj Polikromo aldonis:

“Mi certas ke Rugedo, la Reĝo de la Knomoj, puŝis nin en la Tubon.”

“Ha! Rugedo! Ĉu vi diris Rugedo?” kriis la viro, kiu nun tre ekscitiĝis.

“Tion ŝi diris,” respondis Vilulo, “kaj mi kredas ke ŝi pravas. Ni estis survoje por konkeri la Reĝon de la Knomoj kiam subite ni falis en la Tubon.”

“Do vi estas malamikoj de Rugedo?” demandis la Plendema Persono.

“Ne precize mal’mikoj,” diris Betinjo, iom perpleksa pro la demando, “ĉar ni tute ne konas lin; sed ni celis konkeri lin, kaj tio ne estas ege amikema ago.”

“Vere,” akordis la viro. Li rigardis penseme de unu al la alia dum kelka tempo kaj post tio li turnis sian kapon por rigardi transŝultren kaj diris: “Forgesu la fajron kaj tenajlon, miaj bonaj fratoj. Estos plej bone gvidi ĉi tiujn fremdulojn al la Privata Civitano.”

“Akorde, Tubĉjo,” respondis Voĉo, basa kaj forta, kiu ŝajne venis el la aero, ĉar la parolanto ne estis videbla.

Ĉiuj niaj amikoj eksaltetis pro tio. Eĉ Polikromo tiom alarmiĝis ke ŝia gaza drapiraĵo flirtis kiel standardo en venteto. Vilulo kapneis kaj ĝemis; Reĝino Kaj aspektis

Tiktoko de Oz

tre malfeliĉa; la oficiroj kroĉis sin unu al alia, tremante forte.

Sed baldaŭ ili kuraĝiĝis pli atente rigardi la Plendeman Personon. Ĉar li estis tipo de ĉiuj loĝantoj en ĉi tiu eksterordinara lando kiujn ili poste renkontis, mi provos priskribi lian aspekton.

Lia vizaĝo estis bela, sed senesprima. Liaj okuloj estis grandaj kaj blukoloraj kaj liaj dentoj fajnformaj kaj blankaj kiel neĝo. Lia hararo estis nigra kaj densa kaj aspektis bukliĝema ĉe la finoj. Ĝis tie neniu povus malfavore kritiki lian aspekton. Li surhavis sklarlaturan robon, kiu ne kovris liajn brakojn kaj etendiĝis nur ĝis liaj nudaj genuoj. Sur la sino de la robo estis brodita terura kapo de drako, egale teruraspekta kiel la viro belaspekta. Liaj brakoj kaj kruroj estis nudaj kaj la haŭto de unu brako estis brile flava, kaj la haŭto de la alia brako estis helbrile verda. Li havis unu bluan kruron kaj unu palruĝan, kaj ambaŭ piedoj—videblaj tra liaj malfermaj sandaloj—estis gudronigraj.

Betinjo ne povis decidi ĉu tiuj belaj koloroj estas tinkturaĵoj aŭ la natura aspekto de la haŭto, sed dum ŝi pripensis tion la viro nomita “Tubĉjo” diris:

“Sekvu min al la Loĝejo—ĉiuj!”

Sed ĝuste tiam Voĉo kriis: “Jen alia el ili, Tubĉjo, kuŝanta en la akvo de la fonto.”



Tiktoko de Oz

“Jadi!” kriis Betinjo; “devas esti Tiktoko, kaj li dronos.”

“Akvo ne taŭgas por lia mekanismo, certe,” akordis Vilulo, kaj unuanime ili ĉiuj ekiris al la fonto. Sed antaŭ ol ili povis atingi ĝin, nevideblaj manoj levis Tiktokon el la marmora pelvego kaj surpiedigis lin apud ĝin, dum akvo gutadis de ĉiu artikoj de lia kupra korpo.

“Mul-taj-n dan-dan-dan-dan-koj-n!” li diris; kaj tiam liaj kupraj makzeloj kunfiksiĝis kaj li ne povis plu paroli. Post tio li klopodis marŝi sed post pluraj nelertaj provoj li trovis ke li ne kapablas movi siajn artikojn.

Moka ridado el nevideblaj personoj gratulis la fiaskon de la ago de Tiktoko, kaj la novevenintoj en ĉi tiu stranga lando trovis ke estas tre nekomforte konscii ke multaj uloj ĉirkaŭas ilin nevidate sed klare aŭdeblaj.

“Ĉu mi streĉu la risortojn?” demandis Betinjo, kompatante Tiktokon.

“Mi kredas ke la mekanismo estas streĉita; sed ke li bezonas oleiĝon,” respondis Vilulo.

Tuj oleujo ekaperis antaŭ li, tenate ĉe lia okulnivele de iu nevidata mano. Vilulo prenis la ujon kaj komencis olei la artikojn de Tiktoko. Kvazaŭ por helpi lin, forta varma aerblovo direktiĝis kontraŭ la kupran homon, kaj tio rapide sekigis lin. Baldaŭ li povis diri “Multajn dankojn!” tute facile kaj liaj artikoj funkciis sufiĉe bone.

Ĉapitro Dek

“Venu!” ordonis Tubĉjo, kaj turninte sian dorson al ili li marŝis laŭ la vojo al la kastelo.

“Ĉu ni iru?” demandis Reĝino Kaj, necerta; sed ĝuste tiam ŝi ricevis ŝovon kiu preskaŭ antaŭenfaligis ŝin sur ŝian kapon; do ŝi decidis iri. La hezitantaj oficiroj ricevis plurajn energiplenajn piedbatojn, kvankam ili ne povis vidi kiu faris ilin; sekve ankaŭ ili decidis—tre saĝe—iri. La aliaj sekvis sufiĉe volonte, ĉar krom se ili preferus novan teruran falon tra la Tubon ili devos laŭeble ekzisti en la nekonata lando en kiu ili estas, kaj ŝajnis plej bone obei la ordonojn.





ĈAPITRO 11

La Fama Fratularo de Feoj

POST nelonga promeno tra tre belaj ĝardenoj ili atingis la kastelon kaj sekvis Tubĉjon tra la enirejon kaj en grandan kupolitan ĉambron, kie li ordonis ke ili sidiĝu.

Pro la krono kiun li portas Betinjo supozis ke tiu viro devas esti la Reĝo de la lando en kiu ili estas, sed sidiginte ĉiujn fremdulojn sur benkojn kiuj estis aranĝitaj duoncirkle antaŭ alta trono, Tubĉjo klinis sin humile antaŭ la vaka trono kaj tuj fariĝis nevidebla kaj malaperis.

La halo estis enorma loko, sed ŝajne en ĝi estis nur ili mem. Tamen baldaŭ ili aŭdis apudan mallaŭtan tuson kaj tie kaj tie estis apenaŭ aŭdebla susuro de robo kaj

Ĉapitro Dek Unu

malgranda sono de marŝpaŝoj. Subite sonis la klara tono de sonorilo kaj je tiu sono ĉio ŝanĝiĝis.

Miroplene ĉirkaŭrigardante la halon ili vidis ĝin plena de centoj da viroj kaj virinoj, ĉiuj kun belaj vizaĝoj kaj gapantaj bluaj okuloj kaj ĉiuj surhavis skarlatajn robojn kaj juvelitajn kronojn sur siaj kapoj. Efektive, tiuj homoj aspektis ekzaktaj duoblaĵoj de Tubĉjo, kaj estis malfacile trovi ian signon per kiu distingi ilin.

“Sed kia grandega aro da Reĝoj kaj Reĝinoj!” flustris Betinjo al Polikromo, kiu sidis apud ŝi kaj aspektis tre interesata de la sceno kaj tute ne maltrankvila.

“Certe estas stranga vidaĵo,” estis la respondo de Polikromo; “sed mi ne komprenas kiel povas esti pli ol unu Reĝo, aŭ Reĝino, en unu lando, ĉar se ĉiuj estus regantoj, neniuj scius kiu estas la Mastro.”

Unu el la apudstarantaj Reĝoj aŭdinte tiun komenton turnis sin al ŝi kaj diris: “Kiu estas sia propra Mastro ĉiam estas Reĝo, se nur Reĝo por si mem. En ĉi tiu favorata lando ĉiuj Reĝoj kaj Reĝinoj estas egalaj kaj nia privilegio estas klini nin antaŭ unu plejsupera Reganto—la Privata Civitano.”

“Kiu estas li?” demandis Betinjo.

Kvazaŭ por respondi al ŝi, la klaraj tonoj de la sonorilo denove aŭdiĝis, kaj tuj aperis sidanta sur la trono la viro kiu estas estro kaj mastro de ĉiuj ĉi tiuj reĝuloj. Tiu fakto estis evidenta kiam unuanime ĉiuj surgenuiĝis kaj tuŝis la

Tiktoko de Oz

plankon per la frunto.

La Privata Civitano ne malsimilis la aliajn, sed liaj okuloj estis nigraj anstataŭ bluaj kaj en la centroj de la nigraj iridoj ardis ruĝaj eroj kiuj aspektis fajraj karboj. Sed liaj trajtoj estis tre belaj kaj dignaj kaj lia mieno estis serioza kaj impona. Anstataŭ la kutiman sklarlatan robon li surhavis blankan, kaj la sama kapo de drako kiu ornamis la aliajn estis ankaŭ brodita sur ĝia sino.

“Kian akuzon oni faras kontraŭ tiuj uloj, Tubĉjo?” li demandis per trankvilaj, senfleksiaj tonoj.

“Ili venis tra la malpermesita Tubo, Ho Plejpotenca Civitano,” estis la respondo.

“Komprenu ke okazis tiel,” diris Betinjo. “Ni marŝadis cele la Reĝon de la Knomoj, por konkeri lin kaj liberigi la fraton de Vilulo, kaj subite—”

“Kiu vi estas?” severe demandis la Privata Civitano.

“Mi? Nu, mi estas Betinjo Bobin, kaj—”

“Kiu estas la estro de la grupo?” demandis la Civitano.

“Sinjoro, mi estas Reĝino Kaj de Ugabuo, kaj—”

“Do silentu,” diris la Civitano. “Kiu estas la estro?”

Dum momento neniu respondis. Poste, Generalo Bulko stariĝis.

“Sidiĝu!” ordonis la Civitano. “Mi vidas ke dek ses el vi estas nur oficiroj, do negravuloj.”

“Sed ni havas Armeon,” diris Generalo Horloĝo tempest-

Ĉapitro Dek Unu

humore, ĉar al li ne plaĉis aŭdi ke li estas negravulo.

“Kie estas via Armeo?” demandis la Civitano.

“La Ar-me-o es-tas mi,” diris Tiktoko, kaj lia voĉo sonis iom rusta. “Mi es-tas la so-la Pri-va-ta Sol-da-to en la gru-po.”

Aŭdinte tion, la Civitano leviĝis kaj klinis sin respektoplene antaŭ la Horloĝfunkcia Homo.

“Bonvolu pardoni ke mi ne jam komprenis vian gravecon,” diris li. “Ĉu vi kompleksos min prenante sidlokon apud mi sur mia trono?”

Tiktoko surpiediĝis kaj marŝis al la trono, kaj ĉiuj Reĝoj kaj Reĝinoj flankenpaŝis por li. Post tio, per tintegantaj paŝoj li supreniris sur la podion kaj sidiĝis sur la larĝan benkon apud la Civitano.

Kajon multe provokis tiu indiko pri favoro montrata al la humila Horloĝfunkcia Homo, sed al Vilulo ŝajne multe plaĉis ke la graveco de lia malnova amiko estas agnoskata de la reganto de ĉi tiu eksterordinara lando. La Civitano nun komencis demandadi al Tiktoko, kiu per sia mekanika voĉo rakontis pri la serĉo farata de Vilulo por trovi sian perditan fraton, kaj pri kiel Ozma de Oz sendis la Horloĝfunkcian Homon por helpi lin, kaj kiel ili kuniĝis kun Reĝino Kaj kaj ŝiaj sekvantoj el Ugabuo. Li ankaŭ rakontis pri kiel Betinjo kaj Hanĉjo kaj Polikromo kaj la Roza Princino aniĝis al la grupo.

Tiktoko de Oz

“Kaj vi intencas konkeri Ruggedon, la Metalan Monarkon kaj Reĝon de la Knomoj?” demandis la Civitano.

“Jes. Ti-o ŝaj-nis al ni la so-la fa-reb-la a-go,” estis la respondo de Tiktoko. “Sed li es-tis tro ler-ta por ni. Ki-am ni prok-si-mi-ĝis al li-a ka-ver-no li tur-nis ni-a-n vo-jo-n por gvi-di ni-n al la Tu-bo, kaj mal-vi-deb-li-gis la a-per-tu-ro-n, ti-el ke ni ĉi-uj fa-lis en ĝi-n an-taŭ ol ni kon-sci-is ke ĝi ek-zis-tas. Ti-o es-tis fa-ci-la me-to-do for-sen-di ni-n kaj nun Ru-ge-do es-tas se-ku-ra kaj ni es-tas tre mal-prok-si-maj en frem-da lan-do.”

La Civitano silentis dum momento kaj ŝajne pensadis. Poste li diris:

“Plej nobla Ordinara Soldato. Mi devas informi vin ke laŭ la leĝoj de nia lando ĉiu veninta tra la Malpermesitan Tubon devas torturiĝi dum naŭ tagoj kaj dek noktoj kaj poste reĵetiĝi en la Tubon. Sed estas saĝe malobservi leĝojn kiam ili konfliktas kontraŭ justeco, kaj evidentas ke vi kaj viaj sekvantoj ne malobeis volonte niajn leĝojn, ĉar vin devigis Rubedo eniri la Tubon. Sekve la Reĝo de la Knomoj sola kulpas kaj nur li estas punenda.”

“Tio kontentigas min,” diris Tiktoko. “Sed Ruggedo estas sur la alia flanko de la mondo kie li estas tre for de via punkapablo.”

La Civitano etendis sin fiere.

“Ĉu vi imagas ke io en la mondo aŭ sur ĝi estas for

Ĉapitro Dek Unu

de la kapablo de la Granda Jinjino?” li demandis.

“Ho! Ĉu, do, vi es-tas la Gran-da Jin-ji-no?” demandis Tiktoko.

“Jes.”

“Do vi-a no-mo es-tas Ti-ti-ti Hu-ĉu?”

“Jes.”

Reĝino Kaj ekkriis kaj komencis tremi. Vilulo maltrankviliĝis tiom ke li elprenis poŝtukon kaj viŝis la ŝviton de sia frunto. Polikromo aspektis serioza kaj la unuan fojon maltrankvila, kaj Fajliloj ĉirkaŭbrakumis la Rozan Princinon kvazaŭ por protekti ŝin. Kaj la oficiroj, nu la nomo de la Granda Jinjino instigis ilin ĝemadi kaj ploradi grandkvante kaj ĉiu el ili surgenuiĝis antaŭ la trono petegante kompaton. Betinjo maltrankviliĝis pro tiu malkvietiĝo de ŝiaj akompanantoj, sed ŝi ne sciis pro kio ĝi okazas. Nur Tiktoko restis neperturbita de la trovo.

“Do,” diris li, “se vi es-tas Ti-ti-ti Hu-ĉu kaj o-pi-ni-as ke Ru-ge-do kul-pas, mi es-tas cer-ta ke i-o ku-ri-o-za o-ka-zos al la Re-ĝo de la Kno-moj.”

“Interesos scii kio okazos,” diris Betinjo.

La Privata Civitano—ankaŭ nomata Tititi-Huĉu, la Granda Jinjino—fikse rigardis la knabineton.

“Mi baldaŭ decidos pri kio okazos al Rugedo,” diris li per severa, senkompata voĉo. Poste, turninte sin al la amaso da Reĝoj kaj Reĝinoj, li pludiris: “Tiktoko parolis

Tiktoko de Oz

vere, ĉar lia mekanismo ne permesas ke li mensogu, nek ĝi permesas ke liaj pensoj pensu erare. Tial ĉi tiuj uloj ne estas niaj malamikoj kaj estas traktendaj amike kaj juste. Gvidu ilin al viaj palacoj kaj gastigu ilin ĝis morgaŭ, kiam mi ordonos ke ili denove gvidiĝu al mia Loĝejo. Antaŭ tiam mi pretigos miajn planojn.”

Tuj post sia parolo Tititi-Huĉu malaperis, nevidebla. Tuj poste, la plejparto de la Reĝoj kaj Reĝinoj simile malaperis. Sed pluraj el ili restis videblaj kaj tre respektplene proksimiĝis al la fremduloj. Unu el la belaj Reĝinoj diris al Betinjo:

“Mi esperas ke vi honoros min fariĝante mia gasto. Mi estas Erma, Reĝino de Lumo.”

“Ĉu Hanĉjo rajtos veni kun mi?” demandis la knabino.

“La Reĝo de Bestoj prizorgos vian mulon,” estis la respondo. “Sed ne timu pri li, ĉar li estos reĝe traktata. Via tuta grupo renkontiĝos morgaŭ.”

“Mi—mi volas ke *iu* akompanu min,” diris Betinjo, petege. Reĝino Erma turnis sin kaj ridetis al Polikromo.

“Ĉu la Filino de la Ĉielarko estos agrabla akompananto?” ŝi demandis.

“Ho, jes!” kriis la knabino.

Do Polikromo kaj Betinjo fariĝis gastoj de la Reĝino de Lumo, kaj la aliaj belaj Reĝoj kaj Reĝinoj gastigis la aliajn anojn de la grupo.



Tiktoko de Oz

La du knabinoj sekvis Erman el la halo kaj tra la ĝardenojn de la Loĝejo al vilaĝo de belaj domoj. Neniu el ili estis egale granda aŭ impona kiel la kastelo de la Privata Civitano, sed ĉiuj estis sufiĉe belaj por nomiĝi palacoj—kaj efektive ili ja estis palacoj.





ĈAPITRO 12

La Senkompara Sinjorino de la Suverenlumo

LA PALACO de la Reĝino de Lumo staris sur malgranda altaĵo kaj konsistis el amaso da kristalaj fenestroj super kiuj estis vasta kristala kupolo. Post ilia eniro, Erman salutis ses belaj knabinoj, evidente altnivelaj, kiuj tuj vekis admiron en Betinjo. Ĉiu portis sceptron en sia mano, sur ĉiu sceptropinto estis emblemo de lumo, kaj iliaj kostumoj estis ankaŭ emblemoj de la lumoj kiujn ili reprezentis. Erma konigis ĉiun al siaj gastoj kaj ĉiu gracie kaj ĝentile akceptis ilin.

Unua estis Sunlumo, radie bela kaj tre blonda; la dua estis Lunlumo, mola, revema knabino kun nuksobruna hararo; sekvis Stellumo, egale bela sed

Tiktoko de Oz

retiriĝema kaj timida. Tiuj tri estis vestitaj per trembrilaj roboj el arĝenta blankaĵo. La kvara estis Taglumo, brilanta knabino kun ridantaj okuloj kaj sincera konduto, diversmaniere vestita. Sekvis Fajrolumo, vestita per lanugeca flamkovrita robo kiu blovetiĝis ĉirkaŭ ŝia bela formo tre alloge. La sesa knabino, Elektra, estis la plej bela, kaj Betinjo opiniis jam de la komenco ke kaj Sunlumo kaj Taglumo rigardas Elektran envie kaj iom ĵaluzas ŝin.

Sed ĉiuj elkore salutis la fremdulojn kaj ŝajne multe amis la Reĝinon de Lumo, ĉar ili ĉirkaŭmoviĝis ĉirkaŭ ŝin kiel vigla, brilanta grupo dum ŝi gvidis al sia reĝa salono.

Tiu ĉambro estis riĉe kaj komforte meblita, la mebloj estis multtinkturaj; kaj Betinjo kaj Polikromo ĝuis ripozon sur la lanugaj divanoj post la streĉaj aventuroj de la tago.

La Reĝino sidiĝis por babili kun siaj gastoj, kiuj rimarkis ke Taglumo estas la sola knabino nun sidanta apud Erma. La aliaj retiris sin al alia parto de la ĉambro, kie ili sidis modeste kun interplektitaj brakoj kaj tute ne entrudis sin.

La Reĝino rakontis al la fremduloj pri tiu bela lando, kiu estas unu el la ĉefaj loĝlokoj de feoj kiuj helpas provizi al la homaro bezonaĵojn. Tiom da gravaj feoj loĝis

Ĉapitro Dek Du

tie ke, por eviti rivaladon, ili elektis kiel sian Reganton la solan gravan ulon en la lando kiu ne devis labori por la homaro kaj sekve estis, en la praktiko, Privata Civitano. Tiu Reganto, kies titolo estis Jinjino, nomiĝis Tititi-Huĉu, kaj plej rimarkinde li tute ne havis koron. Sed anstataŭ tion li posedis grandan kvanton da Rezono kaj Justeco kaj kvankam li neniam juĝis kompate li neniam punis maljuste aŭ senkaŭze. Al malbonfarantoj Tititi-Huĉu estis egale terura kiel senkora, sed senkulpuloj ne bezonis timi lin.

Ĉiuj Reĝoj kaj Reĝinoj de tiu felando konsideris sin vasaloj de Jinjino, ĉar ili volis esti obeataj de aliaj ili konsentis obei tiun kiu estas aŭtoritata super ili.

La loĝantoj de la Lando Oz jam aŭdis multajn famojn pri tiu terure justa Jinjino, kies punoj preskaŭ ĉiam egalas la kulpojn. Polikromo ankaŭ sciis pri li, kvankam nun la unuan fojon ŝi vidas lin vizaĝ'-al-vizaĝe. Sed por Betinjo la historio estis tute nova, kaj ŝin multe interesis Tititi-Huĉu, kiun ŝi ne plu timis.

Tempo rapide kuris dum ilia konversacio kaj subite Betinjo rimarkis ke Lunlumo sidas apud la Reĝino de Lumo, anstataŭ Taglumo.

“Sed bonvolu diri al mi,” ŝi petis, “kial vi ĉiuj havas kapon de drako broditan sur viaj roboj?”

La agrabla vizaĝo de Erma serioziĝis dum ŝi respondis:

Tiktoko de Oz

“Vi sendube scias ke la Drako estis la plej unua pravivanto; tial la Drako estas la plej aĝa kaj plej saĝa vivanto. Bonfortune la Origina Drako, kiu plu vivas, loĝas en ĉi tiu lando kaj provizas al ni saĝon kiam ajn ni bezonas ĝin. Li estas samaĝa kiel la mondo kaj memoras ĉion okazintan ekde la kreiĝo de la mondo.”

“Ĉu li iam naskis infanojn?” demandis la knabino.

“Jes, multajn. Kelkaj vagis en aliajn landojn, kie homoj, kiuj ne komprenis ilin, do batalis ilin; sed multaj ankoraŭ loĝas en ĉi tiu lando. Tamen neniu estas egale saĝa kiel la Origina Drako, kiun ni tre multe respektas. Ĉar li estis la unua loĝanto ĉi tie, ni portas la emblemon de la kapo de la drako por indiki ke ni estas la favorataj personoj kiuj la solaj rajtas loĝi en ĉi tiu felando, kies beleco preskaŭ egalas tiun de la Felando Oz, kaj kies potenco estas multe pli granda.”

“Mi komprenas pri la drako, nun,” diris Polikromo, gestante per sia bela kapo. Betinjo ne tute komprenis, sed ŝin nunmomente interesis observi la ŝanĝiĝantajn lumojn. Kiel Taglumo cedis al Lunlumo, nun Stellumo sidis dekstre de Erma la Reĝino, kaj kiam ŝi venis spirito de paco kaj kontento ŝajnis plenigi la ĉambron. Polikromo, mem feino, volis fari multajn demandojn pri la diversaj



Ĉapitro Dek Du

Reĝoj kaj Reĝinoj kiuj loĝas en tiu fora, izola loko, kaj antaŭ ol Erma finis respondi ilin roza ardo plenigis la ĉambron kaj Fajrolumo sidiĝis apud la Reĝino.

Al Betinjo plaĉis Fajrolumo, sed rigardado al ŝiaj varmaj kaj ardantaj trajtoj dormemigis la knabinton, kaj baldaŭ ŝiaj palpebroj fermiĝis. Tiam leviĝis Erma kaj prenis manon de Betinjo delikate per la sia.

“Venu,” diris ŝi, “alvenis la festenhoro kaj la festeno estas preta.”

“Bele,” kriis la malgranda mortipovulino. “Vi memorigis min ke mi ege malsatas. Sed eble mi ne povos manĝi viajn femanĝaĵojn.”

La Reĝino ridetis kaj gvidis ŝin al pordejo. Dum ŝi forpuŝis pezan drapiraĵon inunde salutis ilin arĝenta lumo, kaj Betinjo vidis antaŭ si grandiozan bankedohalon, en kiu estis tablo kovrita per neĝoblanka tolo kaj kristalaĵoj kaj arĝentaĵoj. Unuflanke estis larĝa tronsimila seĝo por Erma kaj apud ŝi nun sidis la brilanta knabino Elektra. Polikronon oni sidigis dekstre de la Reĝino kaj Betinjon maldekstre. La aliaj kvin mesaĝistinoj de lumo nun servis ilin, kaj provizis al ĉiu persono precize ŝiajn plej amatajn manĝaĵojn. Polikromo trovis sian teleron da rosgutoj, freŝaj kaj scintilantaj, kaj al Betinjo oni servis tiom abunde ke ŝi decidis ke neniam antaŭe dum sia tuta vivo manĝis ŝi eĉ duonegale bone.

Tiktoko de Oz

“Mi s’pozas,” ŝi diris al la Reĝino, “ke Fraŭlino Elektra estas la plej juna el ĉiuj tiuj knabinoj.”

“Kial vi supozas tion?” demandis Erma, ridetante.

“Ĉar elektro estas la plej nova lumo kiun ni konas. Mi kredas ke S-ro Edison eltrovis ĝin, ĉu ne?”

“Eble li estis la unua mortipovulo trovinta ĝin,” respondis la Reĝino. “Sed elektro estas parto de la mondo ekde la kreiĝo, sekve mia Elektra estas aĝa kiel Taglumo aŭ Lunlumo, kaj egale bonfara al mortipovuloj kaj feoj.”

Betinjo estis pensema dum kelka tempo. Poste ŝi komentis, rigardante la ses mesaĝistinojn de lumo:

“Ni ja vere bezonas ĉiun el ili, ĉu ne?”

Erma ridis delikate. “*Mi* jes, certe,” ŝi respondis, “kaj mi kredas ke ankaŭ la mortipovuloj multe bezonas ĉiun el miaj knabinoj. Taglumo ne povas anstataŭi Sunlumon, kiu donas al ni forton kaj energion. Lunlumo valoras kiam Taglumo, laca pro sia longa deĵoro, foriras por ripozi. Se la luno dum sia transiro estas kaŝita malantaŭ la rando de la tero, kaj mia dolĉa Lunlumo ne povas gajigi nin, Stellumo anstataŭas ŝin, ĉar la ĉielo ĉiam donas al ŝi potencon. Sen Fajrolumo al ni mankus multe da niaj varmo kaj kontento, kaj ankaŭ multa gajeco kiam la muroj de domoj ĉirkaŭas nin. Sed ĉiam, kiam aliaj lumoj forlasis nin, nia glora Elektra pretas inundi nin per brilantaj radioj. Kiel Reĝino de Lumo, mi amas ĉiujn miajn knabinojn, ĉar mi scias ke ili estas fidelaj kaj fidindaj.”

Ĉapitro Dek Du

“Ankaŭ mi amas ilin!” deklaris Betinjo. “Sed kelkfoje, kiam mi estas *tre* dormema, mi povas bone farti tute sen lumo.”


“Ĉu vi estas dormema nun?” demandis Erma, ĉar la festeno jam finiĝis.

“Iom,” agnoskis la knabino.

Do Elektra kondukis ŝin al bela ĉambro en kiu estis mola blanka lito, kaj pacience atendis dum Betinjo senvestigis sin kaj surmetis trembrilan silkan noktorobon kiu kuŝis apud ŝia kapkuseno. Post tio la lumknabino bonannoktonis ŝin kaj malfermis la pordon.

Kiam ŝi fermis ĝin post si Betinjo estis en mallumo. La knabino bezonis nur ses momenterojn por endormiĝi.





ĈAPITRO 13

La Jinjino Juste Juĝas

ĈIUJ aventurantoj rekuniĝis la sekvan matenon kiam ili kondukiĝis el diversaj palacoj al la loĝejo de Tititi-Huĉu kaj gvidiĝis en la grandan Ŝtatan Halon.

Kiel antaŭe, nur niaj amikoj kaj iliaj eskortantoj estis videblaj antaŭ ol sonis la unua sonorilo. Tiam fulmrapide la ĉambro montriĝis plena de la belaj Reĝoj kaj Reĝinoj de la lando. La dua sonorilo signis la aperon en la trono de la potenca Jinjino, kies bela vizaĝo estis same trankvila kaj senesprima kiel ĉiam.

Ĉiuj profunde klinis sin antaŭ la Reganto. Iliaj voĉoj mallaŭte murmuris: “Ni salutas la Privatan Civitanon, plej potencan Reganton, kies vorto estas Leĝo kaj kies Leĝo

Ĉapitro Dek Tri

estas justa.”

Tititi-Huĉu agnoske klinis sin. Poste, ĉirkaŭrigardante la brilan kunvenon, kaj la malgrandan grupon de aventurantoj antaŭ si, li diris:

“Io nekutima okazis. Loĝantoj de aliaj landoj ol nia, diferencaj de ni multmaniere, estis truditaj al ni tra la Malpermesita Tubo, kiun unu el nia popolo malsaĝe faris antaŭ jaroj kaj tiu persono taŭge puniĝis pro sia malsaĝo. Sed tiuj fremduloj ne deziris veni ĉi tien kaj estis fie ĵetitaj en la Tubon de kruela Reĝo aliflanke de la mondo, nomata Ruggedo. Tiu Reĝo estas senmortulo, sed ne bona. Liaj magiaj povoj damaĝas la homaron pli ol helpas ilin. Ĉar li maljuste tenis kaptita la fraton de la Vilulo, tiu malgranda grupo de honestuloj, konsistanta el mortipovuloj kaj senmortuloj, decidis konkeri Ruggedon kaj puni lin. Timante ke ili eble sukcesus pri tio, la Reĝo de la Knomoj miskondukis ilin tiel ke ili falis en la Tubon.

“Nu, mi jam multfoje avertis tiun saman Ruggedon ke se iam li iumaniere uzos tiun Malpermesitan Tubon li severe puniĝos. Mi trovis, konsultante la Fearkivojn, ke servisto de tiu Reĝo, knomo nomata Kalikot, petegis sian mastron ne fari tiun fian agon, ne ĵeti tiujn ulojn en la Tubo, ne sendi ilin por ke ili falu en nian landon. Sed Ruggedo defiis min kaj miajn ordonojn.

“Sekve ĉi tiuj fremduloj estas senkulpaj. Nur Ruggedo

Tiktoko de Oz

meritas punon, kaj mi punos lin.” Li paŭzis momente kaj poste daŭrigis per la sama malvarma, senkompata voĉo:

“Tiuĵ fremduloj devos reiri tra la Tubo al sia propra flanko de la mondo, sed mi plifaciligos kaj pliagrabiligos ilian falon ol antaŭe ĝi estis. Ankaŭ mi sendos kun ili Ilon de Venĝo, kiu en mia nomo forpelos Ruggedon el liaj subteraj kavernoj, forprenos liajn magiajn fortojn kaj faros el li senhejman vaganton sur la faco de la tero—loko kiun li malamas.”

Aŭdiĝis murmureto de hororo de la Reĝoj kaj Reĝinoj pro la severeco de tiu puno, sed neniu protestis, ĉar ĉiuj agnoskis ke la verdikto estas justa.

“Elektante mian Ilon de Venĝo,” pludiris Tititi-Huĉu, “mi komprenis ke temos pri malplaĉa tasko. Tial neniu senkulpulo inter ni devu entrepreni ĝin. En ĉi tiu miriga lando malofte iu kulpas pri misfaroj, eĉ plej ete, kaj kiam mi ekzamenis la Arkivojn mi trovis ke neniu Reĝo aŭ Reĝino misfaris. Nek iu sekvanto aŭ servisto ilia. Sed kiam mi atingis la Drakan Familion, kiun ni alte respektas, tiam mi trovis la misfaron de Kuoks.

“Vi bone scias ke Kuoks estas juna drako kiu ankoraŭ ne akiris la saĝon de sia raso. Pro tiu manko, li malrespektis sian plej antikvan praulon, la Originan

Ĉapitro Dek Tri

Drakon, kaj unufoje diris ke ĉi tiu atentu la proprajn aferojn kaj aliffoje li diris ke la Antikvulo malsaĝiĝis pro sia granda aĝo. Ni konscias ke drakoj ne identas kun feoj kaj ne povas esti plene gvidataj de niaj leĝoj, sed tia malrespekto kian montris Kuoks nepre devas ne esti ignorata de ni. Do mi elektis Kuokson mia reĝa Ilo de Venĝo kaj li trairos la Tubon kun tiuj uloj kaj transmetos al Rugedo la punon kiun mi dekretis.”

Ĉiuj aŭskultis silente tiun parolon kaj nun la Reĝoj kaj Reĝinoj riverencis serioze por indiki sian aprobon pri la juĝo de la Jinjino.

Tititi-Huĉu turnis sin al Tubĉjo:

“Mi ordonas ke vi,” diris li, “eskortu tiujn fremdulojn al la Tubo kaj certigu ke ili ĉiuj eniros ĝin.”

La Reĝo de la Tubo, kiu la unua trovis niajn amikojn kaj kondukis ilin al la Privata Civitano, antaŭenpaŝis kaj klinis sin. Dum li faris tion, la Jinjino kaj ĉiuj Reĝoj kaj Reĝinoj subite malaperis kaj nur Tubĉjo restis videbla.

“Bone,” diris Betinjo, ĝemante; “ne *multe* maltrankviligas min ke necesas reiri, ĉar la Jinjino promesis faciligi la reiron por ni.”

Efektive, Reĝino Kaj kaj ŝiaj oficiroj estis la solaj kiuj aspektis maltrankvilaj kaj ŝajne timis la reiron. Ĝenis

Tiktoko de Oz

Reĝinon Kajon ke ŝi ne konkeris la landon de Tititi-Huĉu. Dum ili sekvis la gvidanton tra la ĝardenoj al la buŝo de la Tubo ŝi diris al Vilulo:

“Kiel mi povos konkeri la mondon, se mi foriros kaj lasos ĉi tiun riĉan landon nekonkerita?”

“Vi ne povos,” li respondis. “Ne demandu de mi la kialon, ĉar se vi ne scias mi ne povas informi vin.”

“Kial ne?” diris Kaj; sed Vilulo malatentis la demandon.

Ĉi tiu fino de la Tubo havis arĝentan randon kaj ĉirkaŭ ĝi estis ora balustrado al kiu estis fiksita afiŝo kiu diris:

“SE VI ESTAS EKSTERE, RESTU TIE.
SE VI ESTAS INTERNE, NE ELVENU.”

Sur malgranda arĝenta plato ĝuste interne de la Tubo estis gravuritaj vortoj:

*“Elfosita kaj konstruita de
Hiergargo la Magiisto,
En la Jaro de la Mondo
1 9 6 2 5 4 7 8
Ekskluzive por sia propra uzo.”*

“Li ja estis mirinda konstruisto, estas vere,” komentis

Ĉapitro Dek Tri

Betinjo, leginte la tekston; “sed se li sciintus pri tiu stelo li verŝajne preferus elspezi sian tempon ludante soliteron.”

“Nu, kial ni atendas?” demandis Vilulo, kiu senpaciencis komenci.

“Ni atendas Kuokson,” respondis Tubĉjo. “Sed mi kredas aŭdi lin veni.”

“Ĉu la juna drako estas nevidebla?” demandis Kaj, kiu neniam vidis vivan drakon kaj iom timis renkonti ĝin.

“Tute ne,” respondis la Reĝo de la Tubo. “Vi vidis lin post minuto; sed antaŭ ol li ne plu akompanos vin vi nepre dezirus ke li ja estu nevidebla.”

“Ĉu, do, li estas danĝera?” demandis Fajliloj.

“Tute ne. Sed Kuoks ege tedas min,” diris Tubĉjo, “kaj mi preferas liberan spacon ol lian ĉeeston.”

Tiun momenton skrapa sono aŭdiĝis, pli kaj pli proksimiĝante ĝis el malantaŭ du grandaj arbustoj aperis giganta drako, kiu iris al la grupo, skuetis sian kapon kaj diris: “Bonan matenon.”

Se Kuoks estus eĉ iomete timida mi estas certa ke li malkomfortiĝus pro la miroplena rigardado de ĉiu okulo en la grupo—escepte de Tubĉjo, kompreneble, kiu ne miris ĉar li jam tre ofte vidis Kuokson.


Betinjo supozis ke “juna” drako devas esti malgranda drako, sed ĉi tiu estis tiom enorma ke la knabino decidis

Tiktoko de Oz

ke li nepre estas plenkreskinta, eble trokreskinta. Lia korpo estis bele ĉielblua sur kiu estis densa aro da brilantaj arĝentaj skvamoj, ĉiu granda kiel pleto. Ĉirkaŭ lia kolo estis palruĝa rubando kun buklo ĝuste sub lia maldekstra orelo, kaj sub la rubando videblis perla ĉeno al kiu ligiĝis ora medaliono kies cirkonferenco estis proksimume tiel granda kiel la surfaco de basa tamburo. Tiu medaliono estis inkrustita per multaj grandaj belaj juveloj.

La kapo kaj vizaĝo de Kuoks ne estis tre malbelaj, se oni enmensigas ke li estis drako. Sed liaj okuloj estis tiom grandaj ke li bezonis multan tempon por palpebrumi kaj liaj dentoj aspektis tre akraj kaj teruraj kiam ili videblis, kaj ili videblis kiam ajn la besto ridetis. Ankaŭ lia nazo estis tre granda kaj larĝa, kaj apudstarantoj riskis flari sulfuron—precipe kiam li elspiris fajron, kion drakoj laŭnature faras. Al la fino de lia longa vosto granda elektra lumo estis fiksita.

Eble plej kurioze rilate al la aspekto de la drako tiutempe estis ke vico de seĝoj estis ligita al lia dorso, unu por ĉiu ano de la grupo. Tiuj seĝoj estis duoblaj, kun kurbitaj dorsoj, tiel ke du povis sidi en ĉiu, kaj estis dekdu tiaj duoblaj seĝoj, ĉiuj firme ligitaj ĉirkaŭ la dika korpo de la drako kaj metitaj unu malantaŭ la alia, en vico kiu etendiĝis de liaj ŝultroj preskaŭ al lia vosto.



Ĉapitro Dek Tri

“Ha!” kriis Tubĉjo; “Mi vidas ke Tititi-Huĉu transformis Kuokson en omnibuson.”

“Mi ĝojas pro tio,” diris Betinjo. “Mi esperas, Sinjoro Drako, ke ne ĝenos vin ke ni rajdos sur via dorso.”

“Neniel,” respondis Kuokso. “Mi estas malfavorata ĝuste nun, kaj por rehonorigi mian bonan nomon mi devos obei la ordonojn de la Jinjino. Ke li faras el mi portobeston, tio estas nur parto de mia puniĝo, kaj mi devas toleri ĝin kiel drako. Mi tute ne kulpigas vin, kaj mi esperas ke vi ĝuos la rajdadon. Suriru, bonvolu. Ĉiuj suriru por vojaĝo al la alia flanko de la mondo!”

Silente ili iris al siaj lokoj. Hanĉjo sidis en la fronta seĝo kun Betinjo, por ke li povu apogi siajn antaŭajn piedojn sur la kapo de la drako. Malantaŭ ili estis Vilulo kaj Polikromo, post ili estis Fajliloj kaj la Princino, kaj Reĝino Kaj kaj Tiktoko. La oficiroj rajdis en la malantaŭaj seĝoj. Kiam ĉiuj estis en siaj lokoj la drako aspektis tre simila al turisma ĉarego kian oni vidas en grandaj urboj—sed li havis krurojn anstataŭ radojn.

“Ĉu pretaj?” demandis Kuoks, kaj kiam ili diris ke jes li rampis al la buŝo de la Tubo kaj enmetis sian kapon.

“Adiaŭ, kaj bonfortunon!” vokis Tubĉjo; sed neniun atentis respondi, ĉar ĝuste tiam la drako gligitis sian grandan korpon en la Tubon kaj la veturo al la alia flanko de la mondo komenciĝis.

Tiktoko de Oz

Unue ili tiom rapidis ke ili apenaŭ povis spiri, sed baldaŭ Kuoks malpli rapidis kaj diris kun ia gaka rido:

“Je miaj skvamoj! vere ĉi falo estas giganta! Mi pli komfortigos min kaj falos malpli rapide, alie mia kapo konfuziĝos. Ĉu la distanco al la alia flanko de la mondo estas longa?”

“Ĉu neniam antaŭe vi trairis ĉi tiun Tubon?” demandis Vilulo.

“Neniam. Nek iu alia en nia lando; certe ne de kiam mi naskiĝis.”

“Kiam okazis tio?” demandis Betinjo.

“Mia naskiĝo? Ho, antaŭ ne tre longe. Mi estas nur juna infano. Se mi ne estus ordonita fari ĉi tiun vojaĝon, mi festus mian trimil-kvindek-sesan naskiĝtagon je la venonta ĵaŭdo. Panjo intencis prepari naskiĝtagan kukon kun trimil kvindek ses kandeloj; sed nun, kompreneble, ne estos festo, ĉar verŝajne mi ne reestos hejme sufiĉatempe.”

“Trimil kvindek ses jaroj!” kriis Betinjo. “Mi tute ne sciis ke eblas vivi tiom longe!”

“Mia respektenda Praulo, kiun mi nomus malsaĝa olda fraŭdo se mi ne estus pentinta, estas tiom aĝa ke mi estas nur bebo kompare kun li,” diris Kuoks. “Li datas de la komenco de la mondo, kaj insiste rakontas al ni pri aferoj okazintaj antaŭ kvindek mil

Ĉapitro Dek Tri

jaroj, kiuj tute ne interesas junulojn kia mi. Vere, Prapaĉjo ne estas aktualema. Li pensas nur pri la pasinteco, do mi ne komprenas kial li rajtas vivi ankoraŭ nun... Ĉu vi ĉiuj povas vidi, aŭ ĉu mi faru pli fortan lumon?"

"Ho, ni povas tre bone vidi, dankon; sed kion ni rigardu krom nin mem?" respondis Betinjo.

Estis vere. La grandaj okuloj de la drako estis kiaj la lampoj sur la antaŭo de aŭtomobilo kaj lumigis la Tubon longe antaŭ ili. Li ankaŭ kurbigis sian voston supren tiel ke la elektra lumo sur ĝia fino ebligis ke ili vidu unu la alian tre klare. Sed la Tubo mem estis nur malhela metalo, glata kiel vitro sed precize samaspekta de unu fino al la alia. Do ne estis interesa pejzaĝo kiu povus distri ilin dum la vojaĝo.

Ili nun faladis tiom milde ke la vojaĝo montriĝis vere komforta, ĝuste kiel promesis la Jinjino; sed tio signifis pli longan vojaĝon kaj la sola ebla distraĵo estis konversacio. La drako estis volonta kaj persista konversaciisto kaj li tiom interesis ilin ke ili urĝis lin babiladi. Lia voĉo estis iomete raŭka sed ne malplaĉa kiam oni kutimiĝis al ĝi.

"Mi timas nur," diris li baldaŭ, "ke la konstanta glitado sur la surfaco de la Tubo malakrigos miajn ungojn. Komprenu ke ĉi tiu truo ne iras rekte suben sed laŭ kruta

Tiktoko de Oz

dekliĉo, do anstataŭ faladi libere tra la aero mi devas glitadi sur la flanko de la Tubo. Bonfortune mi havas fajlilon en mia ilujo, kaj se miaj ungoj malakriĝos mi povos reakrigi ilin.”

“Kial vi bezonas akrajn ungojn?” demandis Betinjo.

“Ili estas mia natura armilo, kaj ne forgesu ke mi komisiigis konkeri Ruggedon.”

“Nu, ne ĝenu vin pri tio,” komencis Reĝino Kaj, plej arogante; “ĉar kiam ni atingos Ruggedon mi kaj mia nevenkebla Armeo povos konkeri lin sen via helpo.”

“Tre bone,” respondis la drako, afable. “Tio ŝparos por mi multan laboron—se vi sukcesos. Tamen mi malgraŭ tio fajlos miajn ungojn.”

Li forte ĝemis, dirante tion, kaj amasa flamego, plurajn metrojn longa, ĵetiĝis el lia buŝo. Betinjo tremis kaj Hanĉjo diris “Hi-ha!” dum kelkaj oficiroj kriegis pro teruriĝo. Sed la drako ne rimarkis esti farinta ion nekutiman.

“Ĉu estas fajro interne de vi?” demandis Vilulo.

“Kompreneble,” respondis Kuoks. “Kia drako mi estus se mia fajro estingiĝus?”

“Kio daŭrigas ĝin?” Betinjo demandis.

“Mi tute ne scias. Mi scias nur ke ĝi ekzistas,” diris Kuoks. “La fajro vivtenas min kaj ebligas mian moviĝon; ankaŭ mian pensadon kaj paroladon.”

Ĉapitro Dek Tri

“Ha! Vi tre si-mi-las mi-n,” diris Tiktoko. “La so-la di-fe-ren-co es-tas ke mi-n mo-vas hor-log̃-me-ka-nis-mo kaj vi-n mo-vas faj-ro.”

“Mi neniel vidas eĉ eron da simileco inter ni, mi devas protesti,” respondis Kuoks bruske. “Vi ne vivas; vi estas pupo.”

“Sed mi po-vas a-gi, ne-ce-sas ag-nos-ki ti-o-n,” diris Tiktoko.

“Jes, kiam viaj risortoj estas streĉitaj,” rikanis la drako. “Sed kiam ili malstreĉiĝas, vi estas senhelpa.”

“Kio okazus al vi, Kuoks, se via benzino eluziĝus?” demandis Vilulo, al kiu ne plaĉis tiu atako je lia amiko.

“Mi ne uzas benzinon.”

“Nu, supozu ke eluziĝus via fajro.”

“Kial supozu tion?” demandis Kuoks. “Mia pra-pra-pra-prapatro vivas ekde la komenco de la mondo, kaj neniam eluziĝis lia fajro. Sed mi ja agnokas, sekrete, ke ju pli li maljuniĝas des pli li montras fumon anstataŭ fajron. Sed rilate al Tiktoko, nu li estas sufiĉe bona, siamaniere, sed li estas nur kupra. Kaj la Metala Monarko tute bone konas kupron. Ne mirigus min se Rugedo fandus Tiktokon en unu el siaj fornoj kaj fabrikus el li kuprajn monerojn.”

“Ti-u-o-ka-ze mi ta-men an-ko-raŭ cir-ku-la-dus,” komentis Tiktoko, trankvile.

Tiktoko de Oz

“Jes, tiel agas moneroj,” diris Betinjo bedaŭroplene.

“Absurdaĵo,” diris la Reĝino, iritite. “Tiktoko estas mia granda Armeo—krom la oficiroj—kaj mi kredas ke li povos facile konkeri Ruggedon. Kion vi opinias, Polikromo?”

“Lasu lin provi,” respondis la Filino de la Ĉielarko, kun sia dolĉa penetra rido kiu sonis kiel la tintado de sonoriletoj. “Kaj se Tiktoko malsukcesos, ankoraŭ restos la granda fajrospiranta drako kiu helpos vin.”

“Ha!” diris la drako, kaj nova flamamaso fluis el liaj buŝo kaj nazo; “saĝa knabineto, tiu Polikromo. Ĉiu tuj konstatus ke ŝi estas feino.”





ĈAPITRO 14

La Longorela Aŭskultanto Lernas

DUME Rugedo, la Metala Monarko kaj Reĝo de la Knomoj, klopodis distri sin en sia belega juvelita kaverno. Estis malfacile por Rugedo amuzi sin hodiaŭ, ĉar ĉiuj knomoj bonkonduktas kaj neniu meritas riproĉon aŭ punon. La Reĝo sesfoje ĵetis sian sceptron kontraŭ Kalikoton, kaj malsukcesis trafi lin eĉ unufoje. Kalikoto ne misagis. Tute male, li obeis la Reĝon ĉiumaniere kun unu escepto: li rifuzis stari senmove, kiam la Reĝo ordonis tion, por ke la peza scepro trafu lin.

Kalkikoto ne estis kulpigebla pro tio, kaj eĉ kruela Rugedo pardonis lin; ĉar li tute bone sciis ke se li frakasos sian Reĝan Ĉambelanon li neniam trovos alian

Tiktoko de Oz

egale inteligentan kaj obeeman. Kalikoto povis laborigi la knomojn eĉ kiam la Reĝo ne povis, ĉar la knomoj malamamis Ruggedon kaj estis tiom da miloj da tiuj kuriozaj malgrandaj subteruloj ke ili povus facile ribeli kaj defii la Reĝon se ili kuraĝus. Kelkfoje, kiam Ruggedo firiproĉis ilin pli ol kutime, ili fariĝis morozaj kaj forĵetis siajn martelojn kaj pikilojn. Tiam, negrave kiom la Reĝo riproĉis kaj vipis ilin, ili rifuzis labori ĝis iris Kalikot por petegi ilin. Ĉar Kalikot estis unu el ili mem kaj estis egale firiproĉata de la Reĝo kiel ĉiu alia knomo en la vasta kaverno.

Sed ĉitage ĉiuj uletoj laboradis sindediĉe pri siaj taskoj kaj Ruggedo, havante nenion farindan, estis tre tedita. Li alvokis la Longorelan Aŭskultanton kaj petis lin atente aŭskulti kaj raporti pri kio okazas en la granda mondo.

“Ŝajnas,” diris la Aŭskultanto, “ke en Usono multaj virinoj havas bas-tonojn.”

“Ĉu kun spikoj?” demandis Ruggedo, oscedante.

“Mi ne aŭdas spikojn, Via Moŝto,” estis la respondo.

“Do iliaj bastonoj estas malpli utilaj ol mia scepro. Kion alian vi aŭdas?”

“Okazas milito.”

“Ba! Ĉiam okazas milito. Kion alian?”

Dum kelka tempo la Aŭskultanto silentis, klininte sin

Ĉapitro Dek Kvar

antaŭen kaj etendante siajn grandajn orelojn por kapti la plej etan sonon. Subite li diris:

“Jen interesaĵo, Via Moŝto. Uloj kverelas pri kiu konkeru la Metalan Monarkon, kaptu lian trezoron kaj pelu lin el lia regno.”

“Kiuuj uloj?” demandis Rugedo, ekrektigante sin en sia trono.

“La uloj kiujn vi ĵetis en la Kavan Tubon.”

“Kie ili estas nun?”

“En tiu sama Tubo, kaj ili revenas ĉi tien,” diris la Aŭskultanto.

Rugedo levis sin el sia trono kaj komencis paŝadi tien kaj reen en la kaverno.

“Kio estas farebla por haltigi ilin?” li pervoĉe pensis.

“Nu,” diris la Aŭskultanto, “se vi povus renversi la Tubon, ili falus alidirekten, Via Moŝto.”

Rugedo kolere rigardadis lin fie, ĉar estis neeble renversi la Tubon kaj li kredis ke la Aŭskultanto mokas lin. Baldaŭ li demandis:

“Kiom for estas la uloj nun?”

“Proksimume deksekmil okcent sep kilometrojn, dudeknaŭ metrojn, kvardek unu centimetrojn, kaj tri milimetrojn—laŭ la sono de iliaj voĉoj; mi ne povas esti pli preciza,” respondis la Aŭskultanto.

“Aha! Do pasos longa tempo antaŭ ol ili alvenos,”

Tiktoko de Oz

diris Ruggedo, “kaj kiam ili alvenos mi estos preta ricevi ilin.”

Li kuris al sia gongo kaj bategis ĝin tiom feroce ke Kalikot saltis en la kavernon kun ŝuo sur unu piedo kaj neniŭ ŝuo sur la alia, ĉar kiam eksonis la gongo li estis vestanta sin post naĝo en la varmega bobelanta lago de la Subtera Regno.

“Kalikot, la invadintoj kiujn ni ĵetis en la Tubon revenas!” li kriis.

“Mi antaŭsupozis tion,” diris la Reĝa Ĉambelano, surtirante sian ŝuon. “Tititi-Huĉu ne lasus ilin resti en sia regno, kompreneble, do jam delonge mi anticipas ilian revenon. Vi tre malsaĝe agis, Rugo.”

“Kion, ĵetante ilin en la Tubon?”

“Jes. Tititi-Huĉu malpermesis ke ni ĵetu eĉ rubon en la Tubon.”

“Pu! kiel gravas al mi la Jinjino?” demandis Ruggedo malestime. “Li neniam eliras sian propran regnon, kiu estas aliflanke de la mondo.”

“Vere; sed eble li sendos iun tra la Tubo por puni vin,” sugestis Kalikot.

“Mi volonte vidus tion! Kiu povus konkeri miajn milojn da knomoj?”

“Nu, ili jam antaŭ nun konkeriĝis, se mi ĝuste memoras,” respondis Kalikot ridetante. “Iam mi vidis vin

Ĉapitro Dek Kvar

kuradi for de knabineto nomita Doroteo, kaj ŝiaj amikoj, kvazaŭ vere timante.”

“Nu, mi ja timis tiam,” agnoskis la Reĝo de la Knomoj, profunde ĝemante, “ĉar Doroteo havis Flavan Kokinon kiu demetis ovojn!”

La Reĝo timtremis dirante “ovojn”, kaj ankaŭ Kalikot tremis, kaj ankaŭ la Longorela Aŭskultanto; ĉar ovoĵo estas la sola minaco kiu povas timigi knomojn. Estas ĉar ovoĵo apartenas al la sufaco de la tero, kie loĝas birdoj ĉiaspecaj, kaj ĉio rilatanta al kokina ovo, precipe, plenigas knomon per timo. Se hazarde la interno de ovo tuŝas unu el tiuj subteruloj, li ekvelkas kaj forbloviĝas kaj tiel pereas—se li ne sukcesas rapide diri magian vorton kiun konas nur kelkaj el la knomoj. Tial Rugedo kaj liaj sekvantoj tre bonkiale timtremis pro ĉu mencio pri ovoĵo.

“Sed Doroteo,” diris la Reĝo, “ne estas kun tiu bando de invadantoj; nek la Flava Kokino. Kaj rilate al Tititi-Huĉu, li ne povas scii ke ni timas ovojn.”

“Ne estu tro certa pri tio,” Kalikot avertis lin. “Tititi-Huĉu scias multegon, ĉar li estas feo, kaj liaj povoj estas multe superaj al ĉiuj niaj.”

Rugedo levis siajn ŝultrojn senpacience kaj turnis sin al la Aŭskultanto.

“Aŭskultu,” diris li, “kaj diru al mi ĉu vi aŭdas ovojn

Tiktoko de Oz

veni tra la Tubo.”

La Longorela Aŭskultanto aŭskultis kaj poste kapneis. Sed Kalikot ridis pro la Reĝo.

“Neniu povas aŭdi ovon, Via Moŝto,” diris li. “Por trovi la veron necesas rigardi per la Magia Spiontubo.”

“Jen!” kriis la Reĝo. “Kial mi ne jam pensis pri tio? Tuj rigardu, Kalikot!”

Do Kalikot iris al la Spiontubo kaj murmurante magian sorĉdiron li kaŭzis ke la alia fino ĉirkaŭtordu sin, tiel ke ĝi rigardis rekte en la Tubon. Tiam li metis sian okulon al la vitro kaj povis rigardi laŭ ĉiuj turniĝoj kaj kurbaĵoj de la Magia Spiontubo kaj profunde en la Tubon, al kie niaj amikoj tiutempe faladis.

“Jadi!” li kriis. “Jen venas drako!”

“Granda drako?” demandis Ruggedo.

“Monstro. Li havas elektran lampon sur la pinto de sia vosto, do mi povas tre klare vidi lin. Kaj la aliaj homoj ĉiuj rajdas sur lia dorso.”

“Kion pri la ovoĵ?” demandis la Reĝo.

Kalikot denove rigardis.

“Mi tute ne vidas ovoĵn,” diris li; “sed mi konjektas ke la drako estas same danĝera kiel ovoĵ. Verŝajne Tititi-Huĉu sendis lin ĉi tien por puni vin ĉar vi ĵetis tiujn fremdulojn en la Malpermesitan Tubon. Mi avertis ke vi



Tiktoko de Oz

ne faru tion, Via Moŝto.”

Tiu informo maltrankviligis la Reĝon de la Knomoj. Dum kelkaj minutoj li paŝis tien kaj reen, palpante sian longan barbon kaj plenforte pensante. Poste li turnis sin al Kalikot kaj diris:

“Drako nur povas grati per siaj ungoj kaj mordi per siaj dentoj, nenion pli.”

“En la vero, multon pli, sed tio tute sufiĉas,” respondis Kalikot tre serioze. “Sed pripensu: neniu povas vundi drakon, ĉar drako estas la plej fortika vivantaĵo en la mondo. Unu bato per ĝia giganta vosto povus dispecigi cent knomojn, kaj per dentoj kaj ungoj ĝi povus disŝiri eĉ vin aŭ min tiom ke estus preskaŭ neeble rekunmeti nin. Iam, antaŭ plurcent jaroj, vagante tra kelkaj dizertaj kavernoj, mi trovis peceton de knomo kuŝantan sur la roka planko. Mi demandis al la peceto de knomo pri kio okazis al ĝi. Bonfortune la buŝo estis parto de tiu peco—la buŝo kaj la maldekstra okulo—do ĝi povis diri al mi ke la kaŭzo estis fera drako. Ĝi atakis la kompatindan knomon kaj disigis lin ĉiudirekten, kaj ĉar neniu amiko apudestis por kolekti la pecojn kaj rekunmeti lin, ili restis apartaj dum tre multaj jaroj. Do, Via Moŝto, necesas kompreni ke ne konvenas rikani pri drako.”

La Reĝo atente aŭskultis Kalikoton. Diris li:

Ĉapitro Dek Kvar

“Nur necesos enĉenigi tiun drakon kiun Tititi-Huĉu sendis ĉi tien, kaj tiel li ne povos atingi nin per siaj ungoj kaj dentoj.”

“Li ankaŭ elspiras flamojn,” Kalikot memorigis lin.

“Nek mi nek miaj knomoj timas fajron,” diris Ruggedo.

“Nu, kion pri la Armeo de Ugabuo?”

“Dek ses malkuraĝaj oficiroj kaj Tiktoko! Mi eĉ povus tute sola venki ilin; sed mi ne provos. Mi alvokos mian knoman armeon por ke ili pelu la invadantojn el mia teritorio, kaj se ni kaptos iujn el ili mi planas puŝi pinglojn en ilin ĝis ili saltos pro doloro.”

“Mi esperas ke vi ne dolorigos iun el la knabinoj,” diris Kalikot.

“Mi dolorigos ĉiujn!” muĝis la kolera Metala Monarko. “Kaj el tiu henanta Mulo mi faros hufosupon kaj per ĝi mi manĝigos miajn knomojn por ke ĝi aldonu al ilia forto.”

“Kial ne esti afabla al la fremduloj kaj liberigi vian kaptiton, la fraton de la Vilulo?” proponis Kalikot.

“Neniam!”


“Povus forpreni de vi multan ĝenon. Kaj vi ne volas la Malbelulon.”

“Mi ne volas lin, estas vere. Sed mi rifuzas permesi ke iu ordonu al mi. Mi estas Reĝo de la Knomoj kaj mi estas la Metala Monarko, kaj mi faros kion mi volas kaj kiel mi volas kaj kiam mi volas!”

Tiktoko de Oz

Dirinte tiun parolon Ruggedo ĵetis sian sceptron je la kapo de Kalikot, tiel bone celigante ĝin ke la Reĝa Ĉambelano devis faligi sin sur la plankon por eskapi ĝin. Sed la Aŭskultanto ne vidis la sceptron veni kaj ĝi tiom proksimege pasis lian kapon ke ĝi forrompis la pinton de unu el liaj longaj oreloj. Li faris timigan krion kiu tute alarmis Ruggedon, kaj la Reĝo bedaŭris la akcidenton ĉar tiuj longaj oreloj de la Aŭskultanto estis vere valoraj por li.

Do la Reĝo de la Knomoj forgesis koleri kontraŭ Kalikot kaj ordonis sian Ĉambelanon alvoki Generalon Guf kaj la knoman armeon kaj taŭge armi ilin. Post tio ili marŝu al la buŝo de la tubo, kie ili kaptu la vojaĝantojn tuj kiam ili aperos.





ĈAPITRO 15

La Drako Defias Dangĝeron

KVANKAM la veturo tra la Tubo estis pli longa, ĉifoje, ol antaŭe, ĝi estis multe pli komforta tiel ke ĝi ĝenis neniun ajn el niaj amikoj. Plejparte ili interparoladis kaj ĉar la drako estis bonhumora kaj amis la sonon de sia propra voĉo ili baldaŭ bone konis lin kaj akceptis lin kiel kunulon.

“Komprenu,” diris Vilulo, laŭ sia honesta maniero, “Kuoks estas nia amiko, kaj sekve la drako estas bonulo. Se li estus malamiko anstataŭ amiko, mi estas certa ke mi multe malŝatus lin, ĉar lia spiro odoras sulfure, li estas tre aroganta kaj tiom forta kaj feroĉa ke li estus tre danĝera malamiko.”

Tiktoko de Oz

“Jes ja,” respondis Kuoks, kiu aŭskultis tiun parolon plezure; “mi supozas ke mi estas tiom terura kiom iu ajn vivanto. Al mi plaĉas ke vi trovas min aroganta, ĉar tio pruvas ke mi konas miajn bonajn kvalitojn. Kaj ke mia spiro odoras sulfure, mi ne kulpas pri tio, kaj iam mi renkontis viron kies spiro odoris pro cepoj, kaj mi opinias tion multe pli malbona.”

“Ne mi,” diris Betinjo; “mi amas cepojn.”

“Kaj mi amas sulfuron,” deklaris la drako, “do ni ne kverelu pri diversaj preferoj.”

Dirinte tion, li enspiregis kaj elĵetis el sia buŝo flamon dek kvin metrojn longa. La sulfuro tusigis Betinjon, sed ŝi memoris pri la cepoj kaj diris nenion.

Ili tute ne sciis kioman distancon ili jam trairis la centron de la tero, nek kiam anticipi la finiĝon de la veturo. Unufoje la knabineto komencis:

“Kiam ni atingos la fundon de ĉi tiu truo? Kaj, Vilulo, ĉu ne estas strange ke la nuna fundo estis la supra kiam ni falis alidirekten?”

“Kio perpleksigas min,” diris Fajliloj, “estas ke ni povas fali ambaŭdirekten.”

“Ti-o,” anoncis Tiktoko, “es-tas ĉar la mon-do es-tas ron-da.”

“Precize,” respondis Vilulo. “La mekanismo en via kapo bonege funkcias, Tiktoko. Vi scias, Betinjo, ke ekzistas io

Ĉapitro Dek Kvin

nomata la Allogo de Gravito, kiu tiras ĉion direkte al la centro de la tero. Pro tio ni falas el la lito, kaj tial ĉio kroĉiĝas al la surfaco de la tero.”

“Do kial ĉiu ne iras al la centro de la tero?” demandis la knabineto.

“Mi supozis ke vi demandos al mi pri tio,” respondis Vilulo malfeliĉavoĉe. “La kialo, kara, estas ke la tero estas tiom solida ke aliaj solidaĵoj ne povas trairi ĝin. Sed kiam estas truo, kiel ĉikaze, ni falas rekte al la centro de la mondo.”

“Kial ni ne haltas tie?” demandis Betinjo.

“Ĉar ni tiom rapidas ke ni portiĝas ĝis la alia fino.”

“Mi ne komprenas tion, kaj dolorigas mian kapon kiam mi klopodas kompreni ĝin,” ŝi diris post kelka pensado. “Unu aĵo tiras nin al la centro kaj alia aĵo puŝas nin for de ĝi. Sed—”

“Bonvolu ne demandi al mi la kialon,” interrompis la Vilulo. “Se vi ne komprenas, ni forlasu la termon.”

“Ĉu *vi* komprenas?” ŝi demandis.

“Ne ĉia magio estas en felando,” li diris serioze. “Ekzistas multa magio en la tuta Naturo, kaj vi povas vidi ĝin egale facile en Usono, kie vi kaj mi iam loĝis, same kiel ĉi tie.”

“Mi neniam vidis ĝin,” ŝi respondis.


“Ĉar vi tiom kutimis al ĝi ke vi ne konsciis ke ĝi

Tiktoko de Oz

estas magio. Ĉu io povus esti pli mirinda ol kiam ni vidas floron kreski kaj burĝoni, aŭ kiam ni akiras lumon el la elektro en la aero? La bovinoj kiuj fabrikas lakton nepre enhavas mekanismon tutsame nekredeblan kiel tiu en la kupra korpo de Tiktoko, kaj eble vi rimarkis ke—”

Kaj tiam, antaŭ ol Vilulo povis fini sian parolon, la forta taglumo subite aperis al ili, pliheliĝis, kaj plene kovris ilin. La ungoj de la drako ne plu gratadis la metalan Tubon, ĉar li ĵetiĝis en la liberan aeron tridek metrojn aŭ pli kaj flugis tiom for de la dekliva truo ke li surteriĝis sur la pinto de monto tuj super la enirejo de la multaj subteraj kavernoj de la Reĝo de la Knomoj.

Kelkaj oficiroj falis de siaj seĝoj kiam Kuoks trafis la teron, sed plejparte la pasaĝeroj de la drako sentis nur malgrandan frapon. Ĉiuj ĝojis denove esti sur la solida tero kaj ili tuj degrimpis kaj komencis ĉirkaŭrigardi. Iom strange, tuj kiam ili deiris de la drako, la seĝoj ligitaj al la dorso de la monstro malaperis, kaj tio verŝajne okazis ĉar ili ne plu utilis kaj ĉar Kuoks aspektis multe pli digna pro siaj ne plu kovritaj skvamoj. Kompreneble li ankoraŭ havis la kvardek metrojn da rubando ĉirkaŭ sia kolo, kaj ankaŭ la grandan medalionon, sed ili nur aspektigis lin “bele kostumita,” laŭ komento de Betinjo.



Tiktoko de Oz

Nun la armeo de knomoj grupiĝis dense ĉirkaŭ la buŝo de la Tubo, por esti pretaj kapti la bandon de invadantoj tuj kiam ili elĵetiĝos. Efektive, centoj da knomoj grupiĝis, kaj ilin komandis Guf, ilia plej fama Generalo. Sed ili ne anticipis ke la drako flugos tiom alten, kaj li tiom subite ĵetiĝis el la Tubo ke plene surprizis ilin. Kiam la knomoj frotis la miron el siaj okuloj kaj denove povis pensi klare, ili trovis la drakon trankvile sidanta sur la montoflanko multe super iliaj kapoj, dum la aliaj fremduloj staris grupe kaj trankvile subrigardis ilin.

Generalo Guf koleris pro la eskapo, kvankam nur li mem kulpis.

“Subiru por kaptiĝi!” li kriis, skuante sian glavon je ili.

“Supreniru por kapti nin—se vi kuraĝas!” respondis Reĝino Kaj, kiu streĉadis la risortojn de sia Ordinara Soldato, por ke li povu pli vigle batali.

La unua respondo de Guf estis kolerega muĝo pro la defio; post tio li turnis sin kaj ordonis al siaj knomoj. Ili ĉiuj estis armitaj per akraj lancoj kaj unuanime ili levis la lancojn kaj ĵetis ilin rekte kontraŭ siajn malamikojn, tiel ke ili rapidis tra la aero kiel perfekta nubo da flugantaj armoj.

Iom da damaĝo eble rezultus se la drako ne rapide rampus antaŭ la aliajn, ĉar lia korpo estis tiom granda ke

Ĉapitro Dek Kvin

ĝi ŝildis ĉiun el ili, inkluzive de Hanĉjo. La lancoj trafis la arĝentajn skvamojn de Kuokso kaj poste falis senefike al la tero. Kompreneble ili estis magiaj lancoj kaj ĉiuj tuj resaltis al la manoj de la ĵetintoj, sed eĉ Guf povis vidi ke estus senutile ripeti la atakon.

Nun estis la vico de Reĝino Kaj ataki, do la Generaloj kriis “An—taŭ—en marŝu!” kaj la Koloneloj kaj Majoroj kaj Kapitanoj ripetis la ordonon kaj la brava Armeo de Ugabuo, kiu ŝajne konsistis plejparte el Tiktoko, marŝis unuope cele la knomojn, dum Betinjo kaj Polikromo hurais kaj Hanĉjo laŭte muĝis “Hi-ha!” kaj Vilulo kriis “Hura!” kaj Reĝino Kaj kriegis: “Ataku, Tiktoko—ataku!”

La knomoj ne atendis por ke la Horloĝfunkcia homo ataku sed tuj malaperis en la subterajn kavernojn. Ili grave eraris pro sia rapido, ĉar Tiktoko apenaŭ faris dek du paŝojn antaŭ ol lia kupra piedfingro frapiĝis per roko kaj li falis sur la teron, kie li kriis: “Le-vu mi-n! Le-vu mi-n! Le-vu mi-n!” ĝis Vilulo kaj Fajliloj antaŭenkuris kaj resurpiedigis lin.

La drako ridis mallaŭte kaj kaŝe dum li gratis sian maldekstran orelon per malantaŭa ungo, sed neniu multe atentis Kuokson ĝuste tiam.

Al Kaj kaj ŝiaj oficiroj estis evidente ke ne eblas batali se la malamikoj ne ĉeestas, kaj por trovi la malamikojn

Tiktoko de Oz

ili devos kuraĝe eniri la subteran Regnon de la Knomoj. Tiom aŭdaca paŝo necesigas militkoncilion.

“Ĉu vi ne opinias ke estos plej bone ke mi vizitu Ruggedon kaj obeu la ordonojn de la Jinjino?” demandis Kuoks.

“Neniell!” respondis Reĝino Kaj. “Ni jam forpelis la armeon de knomoj kaj la sola restanta tasko estas trudi nin en tiujn kavernojn kaj konkeri la Reĝon de la Knomoj kaj lian tutan popolon.”

“Tio ŝajnas al mi iom granda tasko,” diris la drako, fermante siajn okulojn dormeme. “Sed agu laŭvole, kaj mi atendos. Ne rapidu nur por mi. Mi vivas milojn da jaroj kaj kelkataga prokrasto tute neniom gravas al mi, kaj verŝajne mi dormos ĝis venos la tempo ke mi agu.”

Kajon provokis tiu parolo.

“Tutegale vi reiru al Tititi-Huĉu nun,” ŝi diris, “ĉar la Reĝo de la Knomoj jam preskaŭ konkeriĝis.”

Sed Kuoks kapneis. “Ne,” diris li; “mi atendos.”







ĈAPITRO 16

La Kaprica Knomo

VILULO diris nenion dum la konversacio inter Reĝino Kaj kaj Kuoks, simple ĉar li ne opiniis la temon prikverelinda. Sekura en lia poŝo kuŝis la Amo-Magneto, kiu neniam malsukcesis gajni ĉiun koron. La knomoj, li sciis, estis kiaj la senkoraj Rozoj kaj tial ili estos amikigeblaj tuj kiam li montros la magian talismanon.

Vilulo ĉefe maltrankvilis pri la problemo atingi la Regnon de Rugedo kaj nun kiam la enirejo kuŝis antaŭ li li estis certa ke li povos savi sian perditan fraton. Kaj kaj la drako kverelu pri kiu konkeru la knomojn, se ili volas; Vilulo lasos ilin provi, kaj se ili malsukcesos li mem havas en sia poŝo konkerilon.

Ĉapitro Dek Ses

Sed Kaj estis certa ke ŝi ne povos malsukcesi, ĉar ŝi opiniis ke ŝia Armeo povas fari kion ajn. Do ŝi kunvokis la oficirojn kaj ordonis al ili kiel ili agu, kaj ŝi ankaŭ instrukiis al Tiktoko pri kion li faru kaj diru.

“Bonvolu ne pafi per via pafilo krom se absolute necesos,” ŝi pludiris, “ĉar mi ne volas esti kruela aŭ verŝi sangon—krom se nepre necesos.”

“Bo-ne,” respondis Tiktoko; “sed mi kre-das ke Ru-ge-do ne san-gus eĉ se mi ple-ni-gus li-n per tru-oj kaj me-tus li-n en cid-ro-pre-mi-lo-n.”

Tiam la oficiroj enviciĝis, la kvar Generaloj kvarope kaj poste la kvar Koloneloj kaj la kvar Majoroj kaj la kvar Kapitanoj. Ili eltiris siajn brilantajn glavojn kaj ordonis ke Tiktoko marŝu kaj li marŝis. Dufoje li stumblis, ĉar lin faligis la krudaj rokoj, sed kiam li atingis la glatan vojon li pli bone sukcesis. En la mornecan buŝon de la enirejo de la kaverno li paŝis senhezite, kaj post li fiere paŝis la oficiroj kaj Reĝino Kaj. La aliaj atendis iomete, por vidi kio okazos.

Kompreneble la Reĝo de la Knomoj sciis ke ili venas, kaj estis preta ricevi ilin. Tuj interne de la roka koridoro kondukanta al la juvelita tronĉambro estis profunda truo, kutime kovrita. Rugedo ordonis ke oni forprenu la kovrilon kaj nun ĝi estis malferma, apenaŭ videbla en la senlumeco.

Tiktoko de Oz

La cirkonferenco de la truo estis tiom granda ke ĝi preskaŭ plenigis la koridoron kaj restis nur sufiĉa spaco por lasi ke oni ĉirkaŭmarŝu ĝin se oni premas sin al la rokaj muroj. Tion faris Tiktoko, ĉar liaj kupraj okuloj vidis la truon klare kaj li evitis ĝin; sed la oficiroj marŝis rekte en la truon kaj falis amasiĝinte sur la fundon. Momenton poste Reĝino Kaj ankaŭ marŝis en la truon, ĉar ŝi tenis sian mentonon alta en la aero kaj ne atentis pri kien ŝi metis siajn piedojn. Poste unu el la knomoj tiris stangeton kiu remetis la kovrilon sur la truon kaj tiel firme kaptis la oficirojn de Ugabuo kaj ilian Reĝinon.

Rilate al Tiktoko, li plu marŝis rekte al la kaverno kie Rugedo sidis en sia trono kaj tie li frontis la Reĝon de la Knomoj kaj diris:

“Mi nun kon-ke-ras vi-n en la no-mo de Re-ĝi-no Kaj Ce-te-r de U-ga-bu-o, ki-es Ar-me-o mi es-tas, kaj mi de-kla-ras vi-n ŝi-a kap-ti-to!”

Rugedo ridis je li.

“Kie estas tiu fama Reĝino?” li demandis.

“Ŝi es-tos ĉi ti-e post mi-nu-to,” diris Tiktoko. “Eb-le ŝi hal-tis por li-gi si-a-n ŝu-la-ĉo-n.”

“Nu, jen, Tiktoko,” komencis la Reĝo de la Knomoj per severa voĉo, “jam sufiĉis la absurdaĵoj. Via Reĝino kaj ŝiaj oficiroj estas ĉiuj kaptitaj, mi jam superfortis ilin, do eble vi diros al mi kion vi intencas fari.”

“La or-do-no es-tis ke mi kon-ke-ru vi-n,” respondis



Tiktoko de Oz

Tiktoko, “kaj mi-a me-ka-nis-mo laŭ-eb-le plej zor-ge stre-bis o-be-i la or-do-no-n.”

Rugedo batis sian gongon kaj Kalikot aperis, tuj sekvate de Generalo Guf.

“Prenu tiun kuprulon en la laborejojn kaj devigu lin marteladi oron,” ordonis la Reĝo. “Ĉar li funkcias per mekanismo li sendube senpaŭze laboros. Estus preferinde ke li neniam estu kreita, sed ĉar li ekzistas mi de nun bone utiligos lin.”

“Se vi klo-po-dos kap-ti mi-n,” diris Tiktoko, “mi ba-ta-los.”

“Ne batalu!” kriis Generalo Guf serioze, “ĉar estos senutile rezisti kaj eble vi vundos iun.”

Sed Tiktoko levis sian pafilon kaj celis, kaj ne sciante kian damaĝon farus la pafilo, la knomoj timis fronti ĝin.

Dum li tiel defis la Reĝon de la Knomoj kaj liajn ĉefoficistojn, Betinjo Bobin trankvile rajdis en la reĝan kavernon, sidante sur la dorso de sia mulo Hanĉjo. La knabinton tedis atendo por ke “io okazu” do ŝi venis por vidi ĉu Rugedo estas kaptita.

“Najlojn kaj bulojn!” muĝis la Reĝo; “kiel vi aŭdacas venigi tiun beston ĉi tien kaj eniri neanoncite?”

“Mi vidis neniun kiu anoncu min,” respondis Betinjo. “Mi supozas ke viaj servistoj ĉiuj estis okupataj. Ĉu vi jam estas konkerita?”

Ĉapitro Dek Ses

“Ne!” kriis la Reĝo, preskaŭ freneza pro kolerego.

“Do bonvolu doni al mi manĝaĵon, ĉar mi malsategas,” diris la knabino. “Sciu, ĉi tia konkerado multe similas al atendo por cirkoparado, ĝi bezonas multan tempon por aperi kaj en la realo ne montriĝas tre impona.”

La knomojn multe mirigis tiu parolo kaj dum kelka tempo ili nur povis rigardi ŝin malŝate kaj silente, ĉar ili ne trovis vortojn dirindajn. La Reĝo fine resukcesis uzi sian langon kaj diris:

“Terrampulo! tiu malrespekto al mia moŝteco kondamnas vin al morto. Vi estas ordinara mortipovulo, kaj ĉesigi la vivadon de mortipovulo estas tiom facile ke mi ne devigos vin atendi eĉ duone tiom longatempem kiom vi atendis ke mi konkeriĝu.”

“Mi preferas ke vi ne ĉesigu mian vivadon,” komentis Betinjo, deirante de la dorso de Hanĉjo kaj ekstarante apud lin. “Kaj nur tre malinda Reĝo mortigus vizitanton dum ŝi malsatas. Se vi donos al mi manĝaĵon, mi diskutos tiun mortigotemon kun vi; sed, mi avertas vin jam nun ke mi ne aprobas ĝin, kaj neniam aprobos ĝin.”

Ŝia trankvileco kaj manko de timo imponis al la Reĝo de la Knomoj, kvankam li intense malamis ĉiujn mortipovulojn.

“Kion vi volas manĝi?” li demandis bruske.

“Nu, ŝinkan sandviĉon, eble; aŭ eble paron da bone boligitaj ovoĵ—”

Tiktoko de Oz

“Ovoj!” kriis la tri knomoj kiuj ĉeestis, timtremante tiom ke iliaj dentoj klakadis.

“Kio estas?” demandis Betinjo mirante. “Ĉu ovoj tiom multekostas ĉi tie kiom ĉeĥejme?”


“Guf,” diris la Reĝo agitite, turnante sin al sia Generalo, “ni detruu tiun aŭdacan mortipovulon tuj! Prenu ŝin kaj trenu ŝin al la Ŝlima Kavoj kaj enŝlosu ŝin.”

Guf rigardetis al Tiktoko, kies pafilo ankoraŭ celis, sed ĝuste tiam Kalikot kaŝe iris malantaŭ la kuprulon kaj piedbatis liajn genuartikojn tiel ke ili subite fleksiĝis antaŭen kaj faligis Tiktokon al la planko, dum lia pafilo falis de liaj manoj.

Tiam Guf, vidante Tiktokon senhelpa, klopodis kapti Betinjon. Samtempe la kalkanoj de Hanĉjo ekĵetiĝis kaj trafis la Generalon ĝuste en tiu loko kie lia zono estis bukita. Li leviĝis en la aeron rapide kiel kanonobuso, forte frapis la Reĝon de la Knomoj kaj platigis lian Moŝton kontraŭ la muron de roko aliflanke de la kaverno. Kune ili falis al la planko konfuzitaj kaj ĉifitaj. Vidante tion Kalikot flustris al Betinjo:

“Venu kun mi—rapidu!—mi savos vin.”

Ŝi rigardis en la vizaĝon de Kalikot necerte kaj konkludis ke li aspektas honesta kaj bonhumora, do ŝi decidis sekvi lin. Li gvidis ŝin kaj la mulon tra pluraj koridoroj kaj en malgrandan kavernon tre plaĉe kaj komforte meblitan.



Ĉapitro Dek Ses

“Jen mia propra ĉambro,” diris li, “sed vi plenlibere uzu ĝin. Atendu ĉi tie dum minuto kaj mi portos al vi ion manĝeblan.”

Kiam Kalikot revenis li portis pleton sur kiu estis rostitaj agarikoj, bulko de minerala pano kaj iom da petrolbutero. La buteron Betinjo ne povis manĝi, sed la pano estis bona kaj la argarikoj bongustegaj.

“Jen la ŝlosilo por la pordo,” diris Kalikot, “kaj estos plej bone ke vi enŝlosu vin.”

“Ĉu ankaŭ Polikromo kaj la Roza Princino povos veni ĉi tien?” ŝi demandis.

“Eble. Kie ili estas?”

“Mi ne scias. Mi postlasis ilin ekstere.”

“Nu, se vi aŭdos tri frapojn sur la pordo, malfermu ĝin,” diris Kalikot; “sed neniun enlasu kiu ne faros tri frapojn.”

“Bone,” promesis Betinjo, kaj post la foriro de Kalikot el la komforta kaverno ŝi fermis kaj ŝlosis la pordon.

Dume Kaj kaj ŝiaj oficiroj, trovinte sin kaptitaj en la truo, kriadis kaj kriegis ĝis ili laciĝis, sed neniu venis helpi ilin. Estis tre senlume kaj malsekete en la truo kaj ili ne povis elgrimpi ĉar la muroj estis pli altaj ol iliaj kapoj kaj la kovrilo estis fermita. Unue la Reĝino estis kolera, poste ĉagrenita, kaj post tio senkuraĝigita; sed la oficiroj nur timis. Ĉiu el la kompatinduloj elkore volis esti denove en Ugabuo prizorgante sian fruktarbaron, kaj kelkaj estis

Tiktoko de Oz

tiom malfeliĉaj ke ili komencis riproĉi Kajon kiu kaŭzis por ili tiom da ĝenoj kaj danĝero.

Fine la Reĝino sidiĝis sur la fundo de la truo kaj apogis sian dorson per la muro. Bonŝance ŝia akra kubuto tuŝis sekretan risorton en la muro kaj granda plata roko svingiĝis interne. Kaj falis sur sian dorson, sed la postan momenton ŝi eksaltis kaj kriis al la aliaj:

“Irejo! Irejo! Sekvu min, bravuloj, kaj ni ankoraŭ eble eskapos.”

Ŝi komencis rampi tra la irejo, kiu estis egale senluma kaj malseketa kiel la truo, kaj la oficiroj sekvis ŝin unuope. Ili rampis, kaj rampis plu, kaj ankoraŭ plu rampadis, ĉar la irejo ne estis sufiĉe granda por ke ili staru rekte. Ĝi turniĝis tien kaj tordiĝis alien, kelkfoje kiel korktirilo, kelkfoje zigzage, sed malofte ĝi kondukis longe kaj rekte.

“Ĝi neniam finiĝos—neniam!” ĝemis la oficiroj, kiuj trovis la haŭton sur siaj genuoj forfrotata de la krudaj rokoj.

“Ĝi *devos* finiĝi,” respondis Kaj kuraĝe, “alie oni ja ne farus ĝin. Ni ne scias kien ĝi kondukas, sed kia ajn loko estas pli bona ol tiu abomeninda truo.”

Do ŝi plu rampis, kaj la oficiroj plu rampis, kaj dum ili rampis tra tiu aĉa subtera koridoro Polikromo kaj Vilulo kaj Fajliloj kaj la Roza Princino, kiuj staradis ekster la enirejo de la regno de Ruggedo, demandis al si pri kio okazis al ili.



ĈAPITRO 17

Tragika Transformo

“NI ne maltrankviliĝu,” diris Vilulo al siaj akompanantoj, “ĉar la Reĝino eble bezonos multan tempon por konkeri la Metalan Monarkon, pro tio ke Tiktoko devas ĉion fari laŭ sia malrapida, mekanika maniero.”

“Ĉu vi supozas ke ili verŝajne malsukcesos?” demandis la Roza Princino.

“Jes ja,” respondis Vilulo. “Tiu Reĝo de la Knomoj vere estas potenca persono kaj havas multegajn knomojn por helpi sin, sed nia kuraĝa Reĝino komandas nur Horloĝfunkcian Homon kaj bandon de senkuraĝaj oficiroj.”

“Ŝi devintus lasi ke Kuoks faru la konkeradon,” diris Polikromo, dancante leĝere sur roka pinto kaj flirtigante

Tiktoko de Oz

siajn belajn drapiraĵojn. “Sed eble la drako saĝe lasis ke ŝi iru la unua, ĉar kiam ŝi malsukcesos konkeri Ruggedon eble ŝi fariĝos pli modestambicia.”


“Kie nun estas la drako?” demandis Ozga.

“Tie supre sur la rokoj,” respondis Fajliloj. “Rigardu, kara; kaj vi vidos lin de ĉi tie. Li diris ke li iomete ripozos dum ni priagos Ruggedon, kaj li aldonis ke post nia plena fiasko li vekiĝos kaj rapidtuje konkeros la Reĝon de la Knomoj, laŭ la ordono de lia mastro la Jinjino.”

“Kuoks havas bonan intencojn,” diris Vilulo, “sed mi opinias ke ni ne bezonos lian servon; ĉar tuj kiam mi certos ke Reĝino Kaj kaj ŝia armeo malsukcesis konkeri Ruggedon, mi eniros la kavernon kaj montros al la Reĝo la Amo-Magneton. Tion li ne povos rezisti; sekve la konkero facile efektiviĝos.”

Tiun parolon de Vilulo aŭdis la Longorela Aŭskultanto, kiu tiumomente staris apud Ruggedo. Ĉar kiam la Reĝo kaj Guf rekonsciiĝis post la piedbato farita de Hanĉjo kaj relevis sin, ilia unua ago estis surdorsigi Tiktokon kaj meti pezan diamanton sur lin, por ke li ne povu relevi sin. Post tio ili zorge metis lian pafilon en angulon de la kaverno kaj la Reĝo sendis Gufon alvenigi la Longorelan Aŭskultanton.

La Aŭskultanto ankoraŭ koleris Ruggedon pro ĉi ties ago



Tiktoko de Oz

rompi lian orelon, sed li agnoskis la Reĝon de la Knomoj sia mastro kaj pretis obei liajn ordonojn. Do li ripetis la parolon de Vilulo al la Reĝo, kiu tuj konsciis ke lian Regnon frontas granda danĝero. Ĉar Ruggedo sciis pri la Amo-Magneto kaj lin ege malplezurigis la penso ke eble Vilulo montros al li la magian talismanon kaj transformos la tutan malamon en lia koro en amon. Ruggedo fieris pri sia malamo kaj malamamis ĉian amon.

“Vere,” li diris, “mi preferus konkeriĝi kaj perdi mian riĉon kaj mian Regnon ol rigardi tiun aĉan Amo-Magneton. Kiel mi malebligos ke Vilulo prenos ĝin el sia poŝo?”

Kalikot revenis al la kaverno sufiĉatempe por aŭdi tiun demandon, kaj ĉar li estis lojala knomo kaj fervoris helpi sian Reĝon, li respondis per la diro:

“Se ni povos ligi la brakojn de Vilulo firme al lia korpo, li ne povos preni la Amo-Magneton el sia poŝo.”

“Vere!” kriis la Reĝo ĝojante pro tiu facila solvo de la problemo. “Tuj venigu dekdu knomojn kun ŝnuroj kaj loku ilin en la koridoro kie ili povos kapti kaj ligi Vilulon tuj kiam li eniros.”

Tion faris Kalikot, kaj dume la rigardantoj ekster la enirejo pli kaj pli malkvietiĝis pri siaj amikoj.

“Mi ne multe maltrankvilas pri la Ugabuanoj,” diris Polikromo, kiu serioziĝis pro la atendado kaj eble iom

Ĉapitro Dek Sep

nervoziĝis, “ĉar ili ne estas mortigeblaj, kvankam Rugedo eble ja povus multe suferigi ilin kaj eĉ plene detruĝi ilin. Sed estis malsaĝe permesi ke Betinjo kaj Hanĉjo eniru solaj la kavernojn. La knabineto estas mortipova kaj havas tute neniamajn magipovojn, do se Rugedo kaptos ŝin ŝi estos plene je lia dispono.”

“Ja estas vere,” respondis Vilulo. “Mi malvolonte trovas ke iu katastrofo trafis malgrandan Betinjon, do mi deziras jam nun eniri kaj fini nian maltrankvilon.”

“Ni akompanu vin,” asertis Fajliloj, “ĉar per la Amo-Magneto vi povos rapide komplezigi la Reĝon de la Knomoj.”

Tiel oni decidis ne plu atendi. Vilulo la unua marŝis tra la enirejon, kaj post li sekvis la aliaj. Ili ne anticipis danĝeron al si mem, kaj Vilulon, kiu marŝis kun la manoj en siaj poŝoj, multe surprizis ke ŝnuro ekĵetiĝis el la mallumo kaj ĉirkaŭis lian korpon, ligante liajn brakojn tiom firme ke li ne povis eĉ tiri siajn manojn el la poŝoj. Vidiĝis pluraj ridetantaj knomoj, kiuj rapide nodigis la ŝnurojn kaj poste kondukis la kaptiton laŭ la koridoro al la kaverno. Oni tute ne atentis la aliajn, sed Fajliloj kaj la Princino sekvis Vilulon, decidinte ne dizerti sian amikon kaj esperante ke oportuno troviĝos por savi lin.

Kaj Polikromo, nu tuj kiam ŝi vidis ke Vilulo kaptiĝis

Tiktoko de Oz

ŝi turnis sin kaj retrokuris leĝere tra la koridoro kaj la elirejon. Post tio ŝi facile saltis de roko al roko ĝis ŝi haltis apud la granda drako, kiu kuŝis profunde dormante.

“Vekiĝu, Kuoks!” ŝi kriis. “Nun venis la horo por agi.”

Sed Kuoks ne vekigis. Li kuŝis kvazaŭ en tranco, tute senmova, kun siaj enormaj okuloj firme fermitaj. La palpebroj surhavis grandajn arĝentajn skvamojn, same kiel la cetero de lia korpo.

Polikromo povintus kredi Kuokson morta se ŝi ne sciis ke drakoj nur malfacile mortas aŭ se ŝi ne rimarkus ke lia korpo ŝvelas dum li spiras. Ŝi prenis rokeron kaj batadis liajn palpebrojn per ĝi, dirante:

“Vekiĝu, Kuoks—vekiĝu!” Sed li rifuzis vekigi.

“Ve, estas domaĝe!” ĝemis la bela Filino de la Ĉielarko. “Kiu estas la plej bona kaj plej certa metodo vekigi drakon? Eble ĉiuj niaj amikoj kaptiĝos kaj detruigis dum tiu granda besto dormas.”

Ŝi ĉirkaŭmarŝis Kuokson du- aŭ tri-foje, penante trovi senteman lokon sur lia korpo kie bato aŭ puŝo sentiĝus; sed li kuŝis etendite sur la rokoj kun sia mentono plate sur la tero kaj liaj kruroj tiritaj sub lian korpon, kaj oni povis vidi nur lian dikan ĉielbluan haŭton—pli dikan ol tiu de rinocero—kaj liajn arĝentajn skvamojn.



Tiktoko de Oz

Post tio, fine sen espero vekis la beston, kaj maltrankvila pri la sorto de siaj amikoj, Polikromo rekuris al la enirejo kaj rapidis laŭ la koridoro en la kavernon de la Reĝo de la Knomoj.

Tie ŝi trovis Ruggedon ripozanta sur sia trono kaj fumanta longan pipon. Apud li staris Generalo Guf kaj Kalikot, kaj staris antaŭ la Reĝo la Roza Princino, Fajliloj kaj Vilulo. Tiktoko ankoraŭ kuŝis sur la planko, pezigita per la granda diamanto.

Rugedo nun estis pli kontenta. Unu post la alia li renkontis la invadantojn kaj facile kaptis ilin. La timegata Amo-Magneto ja estis en poŝo de Vilulo, nur unu-du metrojn for de la Reĝo, sed Vilulo ne povis montri ĝin kaj nur se la okuloj de Rugedo vidus la talismanon ĝi povus efiki al li. Rilate al Betinjo Bobin kaj ŝia mulo, li kredis ke Kalikot metis ilin en la Ŝliman Kavon, kaj li supozis ke Kaj kaj ŝiaj oficiroj estas sekure kaptitaj kaj restantaj en la truo. Rugedo ne timis Fajlilojn aŭ Ozgan, sed por esti certa li ordonis ke oni metu orajn manligilojn sur iliajn pojn. Tio ne multe ĝenis ilin sed ja nebligis ke ili ataku, se ili volus ataki.

La Reĝo de la Knomoj, kredante sin firma mastro de la situacio, estis ridanta kaj rikananta pri siaj kaptitoj kiam Polikromo, elegante bela kaj dancante kiel

Ĉapitro Dek Sep

lumradio, eniris la kavernon.

“Oho!” kriis la Reĝo; “Ĉielarko sub la tero, ĉu?” Li rigardis firme Polikromon, kaj eĉ pli firme, kaj post tio li rektiĝis kaj premis la ĉifojn el sia robo kaj bonordigis sian barbon. “Jadi,” diris li, “vi estas allogega; krome, mi perceptas ke vi estas feino.”

“Mi estas Polikromo, Filino de la Ĉielarko,” ŝi diris fiere.

“Nu,” diris Rugedo. “Vi plaĉas al mi. La aliajn mi malamas. Mi malamas ĉiujn homojn—sed ne vin! Ĉu vi ŝatus loĝi ĉiam en ĉi tiu bela kaverno, Polikromo? Rimarku la juvelojn kiuj ornamas la murojn. Ili havas ĉian koloron de via Ĉielarko—kaj estas malpli forglitemaj. Mi kolektigos por via ĉiutaga festeno rosgutojn kaj vi estos Reĝino de ĉiuj miaj knomoj kaj tiros la nazon de Kalikot laŭvole.”

“Dankon sed ne,” ridis Polikromo. “Mia hejmo estas en la ĉielo, kaj mi nur vizitas ĉi tiun solidan, malpuran teron. Sed diru al mi, Rugedo, kial miaj amikoj estas ligitaj per ŝnuroj kaj ĉenoj?”

“Ili minacis min,” respondis Rugedo. “La malsaĝuloj ne sciis kiom potenca mi estas.”

“Do, ĉar ili nun estas sendanĝeraĵoj, kial ne liberigi ilin kaj resendi ilin al la surfaco de la tero?”

“Ĉar mi malamas ilin kaj intencas suferigi ilin pro ilia

Tiktoko de Oz

invado. Sed mi marĉandos kun vi, dolĉa Polinjo. Restu ĉi tie kaj loĝu kun mi kaj mi liberigos ĉiujn. Vi estos mia filino aŭ edzino aŭ onklino aŭ avino—laŭ via prefero—sed restu ĉi tie por ilumini mian obskuran regnon kaj feliĉigi min!”

Polikromo mirante rigardis lin. Poste ŝi turnis sin al Vilulo kaj demandis:

“Ĉu vi estas certa ke li ankoraŭ ne vidis la Amo-Magneton?”

“Tute certa,” respondis Vilulo. “Sed ŝajne vi mem estas iaspeca Amo-Magneto, Polikromo.”

Denove ŝi ridis kaj diris al Rugedo: “Eĉ ne por liberigi miajn amikojn mi akceptus loĝi en via regno. Nek mi povus longe toleri la ĉeestadon de monstro kia vi.”

“Vi forgesas,” respondis la Reĝo, forte sulkigante la frunton, “ke ankaŭ vi estas kaptita.”

“Ne vere, Rugedo. La Filinon de la Ĉielarko ne povas atingi via malico.”

“Kaptu ŝin!” subite kriis la Reĝo, kaj Generalo Guf antaŭensaltis por obei. Polikromo staris tute senmove, sed kiam Guf klopodis preni ŝin liaj manoj renkontis unu la alian en la aero, kaj jam la Filino de la Ĉielarko estis en alia parto de la ĉambro, ridante kaj trankvile kiel antaŭe.



Tiktoko de Oz

Plurfoje Guf strebis kapti ŝin kaj Rugedo eĉ venis de sia trono por helpi sian Generalon; sed neniam ili povis meti manon sur la belan ĉielfeiron, kiu flugetis tien kaj tien rapide kiel la lumo kaj konstante defiis ilin per sia gaja ridado dum ŝi evitis iliajn klopodojn.

Do post iom da tempo ili ĉesis ĉasi kaj Rugedo reiris al sia trono kaj viŝis la ŝviton de sia vizaĝo per fajne teksita poŝtuko el orŝtofo.

“Nu,” diris Polikromo, “kion vi intencas fari nun?”

“Mi plezuriĝos, por kompensi la multajn ĝenojn al mi,” respondis la Reĝo de la Knomoj. Post tio li diris al Kalikot: “Alvoku la ekzekutistojn.”

Kalikot tuj eliris kaj baldaŭ revenis kun dudek knomoj, kiuj ĉiuj estis preskaŭ tiom fiaspektaj kiel ilia malamata mastro. Ili portis orajn pinĉilojn, kaj pikilojn el arĝento, kaj krampojn kaj ĉenojn kaj diversajn timigaspektajn ilojn, ĉiuj el valoraj metaloj kaj ornamitaj per diamantoj kaj rubioj.

“Nu, Dolor,” diris Rugedo, parolante al la ĉefo de la ekzekutistoj, “venigu la Armeon de Ugabuo kaj ilian Reĝinon el la truo kaj torturu ilin ĉi tie antaŭ mi—antaŭ ankaŭ iliaj amikoj. Estos ege amuze.”

“Mi aŭdas Vian Moŝton, kaj mi obeas Vian Moŝton,” respondis Dolor, kaj li eliris kun siaj knomoj en la koridoron. Post kelkaj minutoj li revenis kaj klinis sin

Ĉapitro Dek Sep

antaŭ Ruggedo.

“Ĉiuj estas for,” diris li.

“For!” kriis la Reĝo de la Knomoj. “Kie?”

“Ili ne postlasis adreson, Via Moŝto; sed ili ne estas en la truo.”

“Pikoj kaj flakoj!” muĝis la Reĝo; “kiu deprenis la kovrilon?”

“Neniu,” diris Dolor. “La kovrilo restis en sia loko, sed la kaptitoj ne estis sub ĝi.”

“Tiukaze,” minacvoĉis la Reĝo, strebante kaŝi sian malplezuriĝon, “iru al la Ŝlima Kavoj kaj alvenigu la knabinon kaj la azenon. Kaj dum ni torturos ilin Kalikot prenu cent knomojn kaj serĉu la eskapintajn kaptitojn— la Reĝinon de Ugabuo kaj ŝiajn oficirojn. Se li ne trovos ilin, mi torturos Kalikoton.”

Kalikot foriris aspektante malĝoja kaj maltrankvila, ĉar li sciis ke la Reĝo estas sufiĉe kruela kaj maljusta por plenumi sian minacon. Ankaŭ Dolor kaj la ekzekutistoj foriris, alidirekten, sed kiam ili revenis Betinjo Bobin ne estis kun ili, nek Hanĉjo.

“Estas neniu en la Ŝlima Kavoj, Via Moŝto,” raportis Dolor.

“Ĵaluzaj ĵelekukoj!” kriegis la Reĝo. “Ankoraŭ eskapo? Ĉu vi certas ke vi trovis la ĝustan kavon?”

“Ekzistas nur unu Ŝlima Kavoj, kaj neniu estas en ĝi,”

Tiktoko de Oz

respondis Dolor sen dubo.

Rugedo komencis alarmiĝi, krom esti kolera. Sed tiuj trompitaĵoj esperoj faris lin eĉ pli venĝema kaj li firigardis la aliajn kaptitojn kaj diris:

“Ne gravas la knabino kaj la azeno. Ĉi tie estas almenaŭ kvar kiuj ne povos eskapi mian venĝon. Mi pensu; mi opinias ke mi alidecidos pri Tiktoko. Plene blankvarmigu la oran fandujon, kaj ni enĝetos la kuprulon kaj tute fandos lin.”

“Sed, Via Moŝto,” protestis Kalkikot, kiu revenis al la ĉambro sendinte cent knomojn por serĉi la Ugabuanojn, “memoru ke Tiktoko estas tre kurioza kaj interesa maŝino. Estus domaĝe maldoni al la mondo tian lertan mekanikaĵon.”

“Se vi plu parolos ankaŭ vi eniros fornon kun li!” kriegis la Reĝo. “Vi enuigas min, Kalikot, kaj mi pripensas transformi vin en terpomon kaj fari fritiĵojn el vi! Nun konsiderendas,” li diris malpli severtone, “la Vilulo. Ĉar li posedas la Amo-Magneton, mi deziras transformi lin en kolombon, kaj ni povos pafadi al li per la pafilo de Tiktoko. Nu, temas pri tre interesa ceremonio kaj mi petas ke vi ĉiuj atente observu min por vidi ke mi neniel trompas vin.”

Li venis el sia trono por stari antaŭ Vilulo, kaj gestis per siaj manoj, kun la manplatoj malsupren

Ĉapitro Dek Sep

turnitaj, farante sep duoncirklojn super la kapo de la viktimo, dirante per nelaŭta sed klara voĉtono la magian vugvon:

“Adi, edi, idi, odi, udi, u-i-u!

Idu, ido, idi, ide, ida, vu!”

La efiko de tiu bone konata sorĉkanto estis tuja. Anstataŭ Vilulo bela kolombo kuŝis flirtante sur la planko, kun siaj flugiloj ligitaj per maldikaj ŝnuretoj ĉirkaŭvinditaj. Rugedo ordonis al Dolor, kiu tranĉis la ŝnuretojn per tondilo. Libera, la kolomo rapide supren flugis sur ŝultron de la Roza Princino, kiu ame karesis ĝin.

“Tre bone! Tre bone!” kriis Rugedo, kunfrotante siajn manojn gaje. “Unu malamiko estas venkita; nun ni pritraktu la aliajn.”

(Eble estas dezirinde averti miajn legantojn ke ili ne provu la ĉisupran transformon; ĉar, kvankam mi priskribis precize la magian formulon, estas kontraŭleĝe en ĉiuj civilizitaj landoj transformi personon en kolombon per la vortoj uzitaj de Rugedo. Neniu leĝo malpermesis al la Reĝo de la Knomoj fari tiun transformon, sed se magiisto provus fari tion en iu alia lando, kaj sukcesus, tiu magiisto severe puniĝus.)

Kiam Polikromo vidis Vilulon transformita en kolombon kaj konsciis ke Rugedo simile agos al la Princino kaj al

Tiktoko de Oz

Fajliloj, kaj ke Tiktoko baldaŭ fandiĝos en ujo, ŝi turnis sin kaj kuris el la kaverno, tra la kaverno kaj reen al la loko kie kuŝas dormante Kuoks.





ĈAPITRO 18

Lerta Liberigo

LA okuloj de la granda drako estis ankoraŭ ŝlositaj kaj li eĉ ronkis kvazaŭ malproksima tondro; sed Polikromo nun sentis urĝegon, ĉar plia prokrasto signifus ke ŝiaj amikoj detruigus. Ŝi prenis la perlan ĉenon, al kiu la granda talismano estis ligita, kaj tiris ĝin plenforte.

La rezulto estis kuraĝiga. Kuoks ĉesis ronki kaj liaj palpebroj moviĝetis. Do Polikromo denove ektiregis—kaj denove—ĝis malrapide la grandaj palpebroj leviĝis kaj la drako rigardis ŝin senŝancele. Diris li, dormeme:

“Kio estas, eta Polikromo?”

“Rapidu!” kriis Polikromo. “Rugedo kaptis ĉiujn niajn

Tiktoko de Oz

amikojn kaj tre baldaŭ detruos ilin.”

“Nu, nu,” diris Kuoks, “mi suspektis ke tio okazos. Liberigu la vojon iomete, kara, kaj mi kuros al la kaverno de la Reĝo de la Knomoj.”

Ŝi retropaŝis iom kaj Kuoks levis sin sur siajn dikajn kruojn, batis per sia longa vosto kaj jam post momentero estis subenglitinta sur la rokoj kaj kurinta en la enirejon.

Laŭlonge de la koridoro li rapidis, preskaŭ plenigante ĝin per sia enorma korpo, kaj nun li puŝis sian kapon en la juvelitan kavernon de Ruggedo.

Sed la Reĝo jam antaŭlonge faris planojn por kapti la drakon, kiam ĝi aperos. Tuj kiam Kuoks puŝis sian kapon en la ĉambbron dika ĉeno falis el supre kaj ĉirkaŭis lian kolon. Poste la finoj de la ĉeno sufoke kuntiriĝis—ĉar en apuda kaverno mil knomoj tiregis ilin—tiel ke la drako ne povis pli antaŭeniri al la Reĝo. Li ne povis uzi siajn dentojn aŭ ungojn kaj ĉar lia korpo ankoraŭ estis en la koridoro eĉ ne estis sufiĉa spaco por ke li batu siajn malamikojn per sia terura vosto.

Ruggedo multe ĝojis pro la sukceso de sia ruzo. Li tuj antaŭe transformis la Rozan Princinon en violonon kaj estis preta transformi Fajlilojn en arĉon por la violono, kaj kiam la drako alvenis por interrompi lin li kriis:

“Bonvenon, mia kara Kuoks, al mia reĝa amuzo. Ĉar vi estas ĉi tie, vi observos iom da tre lerta magio, kaj

Ĉapitro Dek Ok

fininte pri Fajliloj kaj Tiktoko mi intencas transformi vin en lacerteton—ĥameleonan—kaj vi loĝos en mia kaverno por amuzi min.”

“Bonvolu pardonu ke mi kontraŭdiras Vian Moŝton,” respondis Kuoks per trankvila voĉo, “sed mi kredas ke vi ne plu faros magiajn agojn.”

“Ĉu? Kial ne?” demandis la Reĝo surprizite.

“Pro bona kialo,” diris Kuoks. “Ĉu vi vidas rubandon ĉirkaŭ mia kolo?”

“Jes; kaj mirigas min ke digna drako surhavas tian stultaĵon.”

“Ĉu vi klare vidas ĝin?” persistis la drako, ridetante pro amuziĝo.

“Jes,” deklaris Ruggedo.

“Do vi ne plu posedas magian povon kaj vi estas senhelpa kiel omaro,” asertis Kuoks. “Mia granda mastro, Tititi-Huĉu, la Jinjino, sorĉis la rubandon tiel ke kiam Via Moŝto rigardas ĝin ĉia scio pri magio tuj forlasas vin, kaj neniu magia formulo memorata de vi iam denove plenumos vian volon.”

“Pu! Mi kredas ne eĉ unu vorton!” kriis Ruggedo, kvankam parte timigita. Li turnis sin al Fajliloj kaj strebis transformi lin en violonarĉon. Sed li ne povis memori la ĝustajn vortojn nek la mangestojn kaj post kelkaj provoj li fine ĉesis provi.

Tiktoko de Oz

Nun la Reĝo de la Knomoj tiom alarmiĝis ke li sekrete tremis en siaj ŝuoj.

“Mi konsilis ke vi ne kolerigu Tititi-Huĉun,” grumblis Kalikot, “kaj nun vi vidas la rezulton de via malobeo.”

Rugedo tuj ĵetis sian sceptron je la Reĝa Ĉambelano, kiu kiel kutime lerte evitis ĝin, kaj post tio li diris kun klopodo aroganti:

“Ne gravas; mi ne bezonas magion por ebligi ke mi detruu la invadantojn; fajro kaj la glavo efektivigos tion kaj mi ankoraŭ estas Reĝo de la Knomoj kaj mastro de mia Subtera Regno!”


“Denove mi petas pardonon ke mi devas kontraŭdiri,” diris Kuoks. “La Granda Jinjino ordonas ke vi foriru tuj el ĉi tiu Regno kaj serĉu la surfacon de la tero, kie vi eterne vagados, sen hejmo kaj sen lando, sen amiko kaj sen servanto, kaj sen pli da riĉo ol vi portas kun vi en viaj poŝoj. La Granda Jinjino estas tiom malavara ke li permesos ke vi plenigu viajn poŝojn per juveloj aŭ oro, sed vi ne rajtos kunpreni ion alian.”

Rugedo nun gapis al la drako miroplene.

“Ĉu Tititi-Huĉu kondamnas min al tia sorto?” li demandis raŭke.

“Jes,” diris Kuoks.

“Nur ĉar mi ĵetis kelkajn fremdulojn en la Malpermesitan Tubon?”



Ĉapitro Dek Ok

“Nur pro tio,” ripetis Kuoks per severa, kondamna voĉo.

“Nu, mi rifuzas. Kaj via freneza Jinjinaĉo ne povos devigi min!” deklaris Ruggedo. “Mi intencas resti ĉi tie, Reĝo de la Knomoj, ĝis la fino de la mondo, kaj mi defias vian Tititi-Huĉun kaj ĉiujn liajn feojn—kaj ankaŭ lian mallertan mesaĝiston, kiun mi devis ĉeni!”

Denove la drako ridetis, sed la rideto ne estis tia ke ĝi feliĉigis Ruggedon. Anstataŭe, estis io tiom frida kaj senkompata en la mieno de la drako ke la kondamnita Reĝo de la Knomoj tremis kaj estis svenkora.

Malmulte komfortigis Ruggedon la scio ke la drako estas ĉenita, kvankam li fanfaronis pri tiu fakto. Li gapis la enorman kapon de Kuoks kvazaŭ fascinate kaj timo estis en la okuloj de la olda Reĝo dum li rigardis la agojn de lia malamiko.

Ĉar la drako nun moviĝadis; ne abrupte, sed kvazaŭ faronte ion. Tre zorgoplene li levis unu ungon, tuŝis la bukon de la granda juvelita talismano kiu pendis ĉirkaŭ lia kolo, kaj tuj ĝi larĝe malfermiĝis.

Unue nemulto okazis; ses kokinovoĵoj ruliĝis sur la plankon kaj post tio la talismano per akrasona klik! fermiĝis. Sed la efekto de tiu simpla evento rilate al la knomoj estis nekredebla. Generalo Guf, Kalikot, Dolor kaj lia grupo de ekzekutistoj ĉiuj staradis proksime al la pordo

Tiktoko de Oz

kondukanta al la vasta serio de subteraj kavernoj kiuj konsistigis la regnon de la knomoj, kaj tuj kiam ili vidis la ovojn ili sonigis ĥoron da timegoplenaj krioj kaj rapidis tra la pordon, fermante ĝin antaŭ la vizaĝo de Ruggedo kaj metante multepezan bronzan riglilon trans ĝin.

Ruggedo, dancante pro teruriĝo kaj farante laŭtajn kriojn, nun saltis sur la sidlokon de sia trono por eskapi de la ovoj, kiuj ruliĝadis senhalte al li. Eble tiuj ovoj, senditaj de la saĝa kaj lerta Tititi-Huĉu, estis iel sorĉitaj, ĉar ili senescepte ruliĝis sekvante Ruggedon kaj atinginte la tronon kie li rifuĝis ili komencis ruliĝi supren laŭ la kruroj al la sidloko.

La Reĝo ne povis toleri tion. Lia timego pri ovoj estis reala kaj absoluta kaj li saltis de la trono al la centro de la ĉambro kaj poste kuris al malproksima angulo.

La ovoj sekvis, ruliĝante malrapide sed senpaŭze liadirekten. Ruggedo ĵetis sian sceptron je ili, kaj post tio sian rubian kronon, kaj fine li detiris siajn pezajn orajn sandalojn kaj furioze ĵetis ilin kontraŭ la alvenantajn ovojn. Sed la ovoj evitis ĉiun ĵetaĵon kaj daŭrigis sian proksimiĝon. La Reĝo staris tremante, liaj okuloj gapis pro teruriĝo, ĝis ili estis nur duonan metron for; tiam per vigla salto li supersaltis ilin kaj rapide kuris al la koridoro kondukanta al la ekstera elirejo.

Kompreneble la drako blokis la pordejon, ĉar li estis

Ĉapitro Dek Ok

ĉenita en la koridoro kun sia kapo en la kaverno, sed kiam li vidis la Reĝon kuri liadirekten li kaŭriĝis kiel eble plej multe kaj puŝis sian mentonon al la planko, lasante malgrandan spacon inter sia korpo kaj la planko de la koridoro.

Rugedo ne eĉ momenton hezitis. Urĝite de timego, li saltis sur la nazon de la drako kaj poste rampis al lia dorso, kie li sukcesis puŝi sin tra la spacon. Pasinte la kapon li disponis pri pli da spaco kaj li glitis laŭ la skvamoj de la drako al lia vosto kaj post tie kurigis siajn kruojn laŭeble plej rapide al la elirejo. Sen halti tie, ĉar lia timo estis giganta, la Reĝo plukuris suben laŭ la monta vojo, sed antaŭ ol tre longe iri li stumblis kaj falis.

Kiam li relevis sin li rimarkis ke neniu sekvas lin, kaj dum li penis denove spiri li ekmemoris la lastan dekretan de la Jinjino—ke li estos pelita el sia Regno kaj devos vagadi sur la faco de la tero. Nu, jen li estas, vere pelita el sia kaverno; pelita de tiuj timigaj ovoĵ; sed li retroiros kaj defios ilin; li ne akceptos perdi sian multevaloran Regnon kaj siajn tiranajn povojn, nur ĉar Tititi-Huĉu diris ke tiel devas esti.

Do, kvankam ankoraŭ timante, Rugedo kuraĝigis sin rampi retren laŭ la vojo al la enirejo, kaj alveninte tien li vidis la ses ovoĵn kuŝantajn en vico tuj antaŭ la arka enirejo.


Tiktoko de Oz


Unue li haltis sendanĝere distance por pripensi la aferon, ĉar la ovoĵ nun estis senmovaj. Dum li demandis al si pri kio estas farebla, li memoris ke ekzistas magia sorĉo kiu detruas ovojn kaj sendanĝerigas ilin por knomoj. Naŭ gestoĵ estas farendaj kaj ses sorĉoversoj estas deklamendaj; sed Rugedo parkere sciis ilin. Nun kiam li havis multan tempon por tre precize memori, li zorgoplene plenumis la tutan riron.

Sed fiaskis. La ovoĵ ne malaperis, kontraŭ lia atendo, do li duafoje ripetis la sorĉon. Kiam ankaŭ tio malsukcesis, li memoris, ĝemante pro malespero, ke lia magio povo estis forprenita kaj ke estonte li povos nenion pli fari ol povas ordinara mortipovulo.

Kaj jen la ovoĵ, por ĉiam barantaj lin de la Regno kiun li regis tiom longe kaj plenpotence! Li ĵetis rokojn kontraŭ ilin, sed li maltrafis ĉiun ovon. Li kriaĉis kaj riproĉegis kaj tiris siajn harojn kaj barbon, kaj dancis pro senhelpa pasio, sed tio neniom forigis la lastan juĝon faritan de la Jinjino, kiun la misfaroĵ de Rugedo mem okazigis al li.

Ekde tiu tempo li estis forpelito—vaganto sur la faco de la tero—kaj eĉ li forgesis plenigi siajn poŝojn per oro kaj juveloj antaŭ ol fuĝi de sia antaŭa Regno!





ĈAPITRO 19

Reĝo Kalikot

POST kiam la Reĝo sukcesis eskapi, Fajliloj diris al la drako, malgajavoĉe:

“Ve! kial vi ne venis pli frue? Ĉar vi dormadis anstataŭ konkeri, la bela Roza Princino fariĝis violono sen arĉo, kaj kompatinda Vilulo sidas tie, kveranta kolombo!”

“Ne malkvietiĝu,” respondis Kuoks. “Tititi-Huĉu scias kion li faras, kaj mi ricevis miajn ordonojn de la Granda Jinjin mem. Portu la violonon ĉi tien kaj tuŝu per ĝi tre leĝere mian palruĝan rubandon.”

Fajliloj obeis kaj tuj kiam ĝi kontaktis la rubandon la sorĉo farita de la Reĝo de la Knomoj nuliĝis kaj la Roza

Ĉapitro Dek Naŭ

Princino mem staris antaŭ ili, dolĉa kaj ridetanta kiel antaŭe.

La kolombo, starante sur la dorso de la trono, vidis kaj aŭdis ĉion, do sen atendi ordonon, ĝi flugis rekte al la drako kaj ekstaris sur la rubando. Tuj Vilulo renormaliĝis kaj Kuoks diris al li grumblante:

“Bonvolu deiri de mia maldekstra piedfingro, Vilulo, kaj pli multe zorgu pri kien vi paŝas.”

“Bonvolu pardonu!” respondis Vilulo, tre feliĉa pro reakiro de sia natura formo. Post tio li kuris levi la pezan diamanton de la brusto de Tiktoko kaj helpi starigi la Horloĝfunkcian Homon.

“Mul-taj-n dan-koj-n!” diris Tiktoko. “Ki-e es-tas la fi-a Re-ĝo ki-u vo-lis fan-di mi-n en u-jo?”

“Li foriris, por ĉiam,” respondis Polikromo, kiu sukcesis puŝi sin en la ĉambron apud la drako kaj vidis tre interesate la eventojn. “Sed mi demandas al mi kie estas Betinjo Bobin kaj Hanĉjo, kaj ĉu ia damaĝo trafis ilin.”

“Ni traserĉu la kavernojn ĝis trovi ilin,” deklaris Vilulo; sed kiam li iris al la pordo kondukanta en la aliajn kavernojn li trovis ĝin fermita kaj riglita.

“Mia frunto estas tre forta puŝilo,” diris Kuoks; “kaj mi kredas povi rompi tiun pordon, eĉ kvankam ĝi konsistas el solida oro.”

“Sed vi estas kaptito, kaj la ĉenoj ligantaj vin estas

Tiktoko de Oz

fiksitaj al io en alia ĉambro, tiel ke ni ne povas liberigi vin,” Fajliloj diris malkviete.

“Ho, ne gravas tio,” respondis la drako. “Mi restis kaptita nur ĉar mi volis tion,” kaj dirinte tion li antaŭen paŝis kaj rompis la fortajn ĉenojn kvazaŭ ili estus nur fadenoj.

Sed kiam li klopodis puŝrompi la pezan metalan pordon, eĉ lia granda forto malsukcesis, kaj post pluraj provoj li rezignis kaj kaŭriĝis en angulo por elpensi pli bonan rimedon.

“Mi mal-ferm-os la por-do-n,” asertis Tiktoko, kaj irinte al la granda gongo de la Reĝo li bategis ĝin ĝis la bruo estis preskaŭ surdiga.

Kalikot, en la apuda kaverno, ne sciis kio okazis al Ruggedo kaj ĉu li eskapis la ovojn kaj sukcesis superi la drakon. Sed kiam li aŭdis la sonon de la gongo, kiu ja ofte vokis lin antaŭ la Reĝon, li decidis ke sendube Ruggedo venkis; do li forprenis la riglilon, malfermis la pordon kaj eniris la reĝan kaverton.

Multe mirigis lin la trovo ke la Reĝo estas for kaj la sorĉoj nuligitaj kiuj antaŭe regis la Princinon kaj Vilulon. Sed ankaŭ forestis la ovoj do Kalikot antaŭeniris al la drako, kiu laŭ lia scio estas la mesaĝisto de Tititi-Huĉu, kaj humile klinis sin antaŭ la besto.

“Kion vi deziras?” li demandis.



Tiktoko de Oz

“Kie estas Betinjo?” demandis la drako.

“Sekura en mia propra ĉambro,” diris Kalikot.

“Alvenigu ŝin!” ordonis Kuoks.

Do Kalikot iris al la ĉambro de Betinjo kaj trifoje frapetis la pordon. La knabineto estis dormanta, sed ŝi aŭdis la frapetojn kaj malfermis la pordon.

“Vi povas eliri nun,” diris Kalikot. “La Reĝo forkuris, hontigite, kaj viaj amikoj petas ke vi venu al ili.”

Do Betinjo kaj Hanĉjo reiris kun la Reĝa Ĉambelano al la tronkaverno, kie ŝin akceptis tre ĝoje ŝiaj amikoj. Ili rakontis al ŝi pri kio okazis al Ruggedo kaj ŝi rakontis al ili pri la afableco de Kalikot. Kuoks malmulton diris ĝis la fino de la konversacio, sed tiam li turnis sin al Kalikot kaj demandis:

“Ĉu vi kredas ke vi povus regi viajn knomojn pli bone ol Ruggedo?”

“Mi?” balbutis la Ĉambelano, kiun tre surprizis la demando. “Nu, certe mi ne povus malpli bone regi ilin.”

“Ĉu la knomoj obeus vin?” demandis la drako.

“Kompreneble,” diris Kalikot. “Ili multe pli amas min ol iam ili amis Ruggedon.”

“Do de nun vi estos la Metala Monarko, Reĝo de la Knomoj, kaj Tititi-Huĉu atendas ke vi regu vian Regnon saĝe kaj bone,” diris Kuoks.

“Hura!” kriis Betinjo; “mi ĝojas pro tio. Reĝo Kalikot,

Ĉapitro Dek Naŭ

mi salutas Vian Moŝton kaj esperas ke vi trovos ĝojon en via morna olda Regno!”

“Ni ĉiuj deziras por li ĝojon,” diris Polikromo; kaj la aliaj rapidis gratuli la novan Reĝon.

“Ĉu vi liberigos mian karan fraton?” demandis Vilulo.

“La Malbelulon? Tre volonte,” respondis Kalikot. “Mi jam antaŭ longe petegis Ruggedon ke li forsendu lin, sed li rifuzis. Mi ankaŭ proponis helpi vian fraton eskapi, sed ankaŭ li rifuzis.”

“Tiom honoroplena li estas!” diris Vilulo, multe plaĉite. “Nia tuta familio havas noblajn naturojn. Sed ĉu mia kara frato fartas bone?” li demandis maltrankvile.

“Li manĝas kaj dormas tre normale,” respondis la nova Reĝo.

“Mi esperas ke li ne tro laboras,” diris Vilulo.

“Li tute ne laboras. Efektive, nenion en nia regno li povus fari egalbone kiel niaj knomoj, kiuj estas tiom multenombraj ke estas granda ĝeno trovi sufiĉan laboron por ili. Do via frato bezonas nur distri sin.”

“Estas pli simile al vizito ol al kaptiteco,” asertis Betinjo.

“Ne precize,” respondis Kalikot. “Kaptito ne povas iri kien aŭ kiam li volas, kaj ne estas propra mastro.”

“Kie nun estas mia frato?” demandis Vilulo.

“En la Metala Arbaro.”

“Kie estas tio?”

Tiktoko de Oz

“La Metala Arbaro estas en la Granda Kupolita Kaverno, la plej granda en nia tuta regno,” respondis Kalikot. “Ĝi estas preskaŭ simila al la ekstero, pro sia granda dimensio, kaj Rugedo faris la mirindan arbaron por distri sin, kaj ankaŭ por lacigi siajn multe laborantajn knomojn. Ĉiuj arboj estas el oro kaj arĝento kaj la tero estas pavimita per multevaloraj ŝtonoj, do ĝi estas kvazaŭ kaso.”

“Ni tuj iru tien kaj savu mian karan fraton,” pledis Vilulo fervore.

Kalikot hezitis.

“Mi dubas ke mi povos trovi la vojon,” diris li. “Rugedo faris tri sekretajn vojojn al la Metala Arbaro, sed li ŝanĝas la pozicion de tiuj tri vojoj ĉiusemajne, por ke neniu povu iri al la Metala Arbaro sen lia permeso. Tamen se ni atente serĉos, eble ni povos trovi unu el la sekretaj vojoj.”

“Tio memorigas min: kio okazis al Reĝino Kaj kaj la Oficiroj de Ugabuo?” diris Fajliloj.

“Mi tute ne scias,” respondis Kalikot.

“Ĉu vi opinias ke Rugedo detruis ilin?”

“Ho, ne; mi estas certa ke ne. Ili falis en la grandan truon en la koridoro, kaj ni surmetis la kovrilon por restigi ilin tie; sed kiam la ekzekutistoj iris serĉi ilin, ili ĉiuj malaperis el la truo kaj ni trovis nenan spuron de ili.”

Ĉapitro Dek Naŭ

“Estas strange,” komentis Betinjo penseme. “Mi kredas ke Kaj scias nenian magion; alie, ŝi jam antaŭe estus uzinta ĝin. Sed tia malapero, tio ja ŝajnas magio, ĉu ne?”

Ili akordis ke tiel ŝajnas, sed neniu povis klarigi la misteron.

“Tamen,” diris Vilulo, “ili estas for, tio estas certa, do ni ne povas helpi ilin aŭ esti helpataj de ili. Kaj plej grave ĝuste nun estas savi mian karan fraton el kaptiteco.”

“Kial oni nomas lin la Malbelulo?” demandis Betinjo.

“Mi ne scias,” konfesis Vilulo. “Mi ne bone memoras lian aspekton, ĉar nur antaŭ tre longe mi lastafoje vidis lin, sed ĉiuj en nia familio estas famaj pro siaj belaj vizaĝoj.”

Betinjo ridis kaj Vilulo aspektis iom ĉagrenita, sed Polikromo nuligis lian embarason dirante milde: “Oni povas esti malbelaspekta sed belspirita.”

“Nia unua tasko,” diris Vilulo, iom komfortigita per tiu komento, “estas trovi unu el la sekretaj vojoj al la Metala Arbaro.”

“Vere,” konsentis Kalikot. “Do mi intencas kunvenigi la ĉefajn knomojn de mia regno en ĉi tiu tronĉambro kaj informi ilin ke mi estas ilia nova Reĝo. Mi tiam povos peti ilin helpi nin serĉi la sekretajn vojojn.”

“Bona ideo,” diris la drako, kiu ŝajnis denove dormemiĝi.

Tiktoko de Oz

Kalikot iris al la granda gongo kaj batis ĝin samkiel Ruggedo, sed neniu respondis al la alvoko.

“Kompreneble,” diris li, saltante de la trono, kie li estis sidiĝinta. “Tiu alvoko estas por mi, kaj mi ankoraŭ estas la Reĝa Ĉambelano, kaj mi restos tia ĝis mi nomumos alian personon al tiu posteno.”

Do li kuris el la ĉambro kaj trovis Gufon kaj ordonis ke li respondu la vokon de la gongo de la Reĝo. Reirinte al la reĝa kaverno, Kalikot unue bruigis la gongon kaj poste sidiĝis en la trono, surhavante la malnovan rubian kronon de Ruggedo kaj tenante en mano la sceptron kiun Ruggedo tiom ofte ĵetis celante lian kapon.

Kiam Guf eniris li miregis.

“Prefere foriru el tiu trono antaŭ ol olda Ruggedo revenos,” li diris avertante.

“Li ne revenos, kaj mi nun estas la Reĝo de la Knomoj, anstataŭ li,” anoncis Kalikot.


“Tio estas tute vera,” asertis la drako, kaj ĉiuj kiuj ĉirkaŭstaris la tronon klinis sin respektoplene antaŭ la nova Reĝo.


Vidinte tion, Guf ankaŭ klinis sin, ĉar li ĝojis ke eksigita estas tiu severega mastro Ruggedo. Poste, Kalikot, tre reĝece, informis Gufon ke li estas nomumita Reĝa Ĉambelano, kaj promesis ne ĵeti la sceptron kontraŭ lin krom se li meritos tion.



Tiktoko de Oz

Kiam ĉio estis plaĉe aranĝita, la nova Ĉambelano foriris por informi ĉiujn knomojn de la subtera Regno, sciante ke ĉiu el ili ĝojos pro la ŝanĝo de Reĝoj.





ĈAPITRO 20

Drako Delikate Demisias

KIAM la ĉefaj knomoj kunvenis antaŭ sia nova Reĝo ili ĝoje salutis lin kaj promesis obei liajn ordonojn. Sed, kiam Kalikot demandis al ili, neniu el ili konis la vojon al la Metala Arbaro, kvankam ĉiuj helpis fari ĝin. Do la Reĝo ordonis ke ili zorge serĉu vojon, kaj informu lin tuj kiam ili trovos ĝin.

Dume Kuoks sukcesis retrorampi el la roka koridoro kaj tiel retrovi la liberan aeron kaj sian antaŭan pozicion sur la flanko de la monto, kaj tie li kuŝis sur la rokoj, plene endorma, ĝis la sekva tago. La aliaj grupanoj ricevis ĉambrojn, la plej bonajn en la kavernoj de la knomoj, ĉar Reĝo Kalikot opiniis ke li

Tiktoko de Oz

ŝuldas al ili sian promociiĝon kaj li volis esti kiel eble plej gastama.

Multan miron kaŭzis la plena malapero de la dek ses oficiroj de Ugabuo kaj ilia Reĝino. Neniu knomo vidis ilin, nek ili troviĝis dum la serĉo je la vojoj kondukantaj al la Metala Arbaro. Eble neniu malfeliĉis pro ilia perdiĝo, sed ĉiuj volis scii kio okazis al ili.

La sekvan tagon, kiam niaj amikoj vizitis la drakon, Kuoks diris al ili: “Mi nun devas adiaŭi vin, ĉar mia tasko ĉi tie estas finita kaj mi devas foriri al la alia flanko de la mondo, al kiu mi apartenas.”

“Ĉu vi denove trairos la Tubon?” demandis Betinjo.

“Kompreneble. Sed la veturo estos soleca, ĉifoje, pro la manko de kunkonversaciantoj, kaj mi ne rajtas inviti iun el vi akompani min. Tial, tuj kiam mi glitos en la truon mi ekdormos, kaj kiam mi ĵetiĝos el la alia fino mi vekigōs ĉeĥejme.”

Ili dankis la drakon pro lia amikeco kaj deziris por li bonan vojaĝon. Ili ankaŭ sendis dankon al la granda Jinjino, kies justa kondamno je Ruggedo tiom bone helpis ilin. Kuoks oscedis kaj etendis sin kaj promenis al la Tubo, en kiun li glitis kapantaŭen kaj malaperis.

Ili vere sentis ke ili perdis amikon, ĉar la drako estis kaj afabla kaj amikema dum ilia mallonga konatiĝo kun li; sed ili sciis ke li devas reiri al sia propra lando. Do

Ĉapitro Dudek

ili reiris al la kavernoj por renovigi la serĉon je la kaŝitaj vojoj al la arbaro, sed dum tri tagoj ĉiu strebo trovi ilin estis vana.

Polikromo kutimis ĉiutage iri al la monto por provi vidi sian patron, la Ĉielarkon, ĉar ŝin tedis la vagado sur la tero kaj ŝi sopiris reesti kun siaj fratinoj en la ĉielpalacoj. Kaj la trian tagon, dum ŝi sidis senmove sur roka pinto, kiun ŝi vidis? Ruggedon, kaŝe kaj rampe grimpanta la monton!

La eksreĝo aspektis tre mizera. Liaj vestoj estis malpuraj kaj ĉifonaj kaj li havis neniujn sandalojn sur la piedoj nek ĉapelon sur la kapo. Postlasinte siajn kronon kaj sceptron kiam li fuĝis, la old knomo ne plu aspektis reĝa, sed nur almozpetanta.

Plurfoje Ruggedo jam rampis al la buŝo de la kaverno, kaj trovis tie ke la ses ovojn ankoraŭ gardas. Li tute bone sciis ke li devas akcepti sian sorton kaj fariĝi senhejma vaganto, sed li ĉefe bedaŭris nun ke li neglektis plenigi siajn poŝojn per oro kaj juveloj. Li konsciis ke vaganto kiu estas riĉa multe pli bone sukcesas ol malriĉa, do li plu restis proksime al la kavernoj en kiuj, laŭ lia scio, estas tiom da trezoro, esperante trovi oportunon plenigi siajn poŝojn.

Tiel li ekmemoris la Metalan Arbaron.

“Aha!” li diris al si. “Nur mi konas la vojon al tiu

Tiktoko de Oz

Arbaro, kaj tie mi povos plenigi miajn poŝojn per la plej valoraj juveloj en la tuta mondo!”


Li rigardis siajn poŝojn; malplezurigis lin la trovo ke ili estas tre malgrandaj. Eble li povos pligrandigi ilin, por ke ili entenu pli. Li sciis pri malriĉulino kiu loĝas en dometo ĉe la piedo de la monto, do li iris al ŝi kaj petegis ke ŝi kudru poŝojn sur lian tutan robon, kaj li pagis al ŝi donacante diamantan ringon kiun li portis sur fingro. La virino ĝojegis posedi tiom valoran ringon kaj ŝi kudris tiom da poŝoj sur la robon de Rugedo kiom eblis.

Post tio li reiris sur la monton kaj, ĉirkaŭrigardinte zorgoplene por certigi ke neniu observas lin, li tuŝis risorton en roko kaj ĝi malrapide ensvingiĝis, liberigante larĝan koridoron. Tiun li eniris, refermante la rokon malantaŭ si.

Tamen, Rugedo efektive ne tre zorgis kaŝi sian agon, ĉar Polikromo sidis nur malmulte for kaj ŝiaj akrevidaj okuloj rimarkis precize kiel Rugedo utiligis la kaŝitan risorton. Do ŝi leviĝis kaj rapidis en la kavernon, kie ŝi informis Kalikoton kaj siajn amikojn pri sia trovo.

“Tute sendube tiu estas vojo al la Metala Arbaro,” kriis Vilulo. “Venu, ni tuj sekvu Rugedon kaj savu mian kompatindan fraton!”

Ili konsentis pri tio kaj Reĝo Kalikot kunvokis grupon



Ĉapitro Dudek

de knomoj por helpi ilin portante torĉojn por lumigi la vojon.

“La Metala Arbaro havas brilegan lumon propran,” diris li, “sed la vojo trans la valon verŝajne estos obskura.”

Polikromo facile trovis la rokon kaj tuŝis la risorton, tiel ke malpli ol horon post la eniro de Rugedo ili ĉiuj estis en la koridoro sekvante rapide la eksreĝon.

“Li intencas rabi el la Arbaro, mi certas,” diris Kalikot, “sed li trovos ke li ne plu aŭtoritatas en ĉi tiu Regno kaj mi ordonos ke miaj knomoj elĵetu lin.”

“Do bonvolu ĵeti lin kiel eble plej forte,” diris Betinjo, “ĉar li meritas tion. Ne ĝenas min honesta, tute malkaŝa malamiko, kiu batalas fidinde; sed estas fie kaj trompe ŝanĝi knabinojn en violonojn kaj meti ilin en Ŝlimajn Kavojn, kaj Rugedo ne meritas simpation. Sed vi devos permesi ke li kunprenu tiom da trezoro kiom li povos meti en siajn poŝojn, Kalikot.”

“Jes, tion diris la Jinjino; sed ni malmulton perdos. Estas pli da trezoro en la Metala Abaro ol povus miliono da knomoj porti en siaj poŝoj.”

Ne estis malfacile marŝi tra tiu koridoro, precipe kiam la torĉoj iluminis la vojon, do ili bone progresis. Sed la distanco montriĝis longa kaj Betinjo laciĝis pro marŝado do ŝi sidiĝis sur la dorson de la mulo. La vojo abrupte

Tiktoko de Oz

turniĝis kaj miriga grandioza lumo iluminis ilin. La postan momenton ili ĉiuj staris sur la rando de la eksterordinara Metala Arbaro.

Ĝi kuŝis sub alia monto kaj okupis grandan kupolitan kavernon, kies plafono estis pli alta ol spajro de kirko. En tiu spaco la laboremaj knomoj konstruis, dum multaj jaroj da laborado, la plej belan arbaron en la mondo. La arboj—trunkoj, branĉoj kaj folioj—estis tute el solida oro, kaj la arbustoj kaj la plantoj estis el filigrana arĝento, tute pura. La arboj turis tiom alte kiom naturaj vivantaj kverkoj kaj estis tre fajne ĉizitaj.

Sur la tero estis dense lokitaj gemoj ĉiakoloraj kaj -dimensiaj, kaj tie kaj tie inter la arboj estis padoj sur kiuj la ŝtoneroj estis ĉizitaj diamantoj plej puraj. Entute pli da trezoro estis en tiu Metala Arbaro ol en la tuta cetero de la mondo—se ni ne enkalkulas la landon Oz, kie eble egalvalora trezoro troviĝas en la fama Smeralda Urbo.

Niajn amikojn tiom mirigis la vidaĵo ke dum kelka tempo ili staris gapante. Tiam krietis Vilulo:

“Mia frato! Mia kara perdita frato! Ĉu li vere estas kaptito en ĉi tiu loko?”

“Jes,” respondis Kalikot. “La Malbelulo estas ĉi tie jam de du aŭ tri jaroj, mi bone scias tion.”



Tiktoko de Oz

“Sed kion li povus manĝi?” demandis Betinjo. “Estas belega loĝloko, jes vere, sed oni ne povas matenmanĝi per rubioj kaj di’antoj, aŭ eĉ oro.”

“Oni ne bezonas, kara,” Kalikot certigis al ŝi. “La Metala Arbaro ne plenigas la tutan kavernon. Preter tiuj oraj kaj arĝentaj arboj estas aliaj arboj, realaj arboj, kiuj produktas tre bonmanĝajn fruktojn. Ni promenu tiudirekten, ĉar mi estas tute certa ke ni trovos la fraton de Vilulo en tiu parto de la kaverno, ne en ĉi tiu.”

Do ili komencis marŝadi sur la diamantoŝtoneraj padoj, kaj ĉiupaŝe ilin pli kaj pli mirigis la eksterordinara beleco de la oraj arboj kun ilia brilanta foliaro.

Subite ili aŭdis krion. Juveloj disiris ĉiudirekten kiam iu kaŝita inter la arbustoj forkuris de ili. Poste laŭta voĉo kriis: “Halt!” kaj aŭdiĝis baraktado.



ĈAPITRO 21

Falsmodesta Frato

KUN rapide batantaj koroj ili ĉiuj antaŭenkuris kaj, preter grupo de dignaj metalaj arboj, trovis vere nekredeblan scenon.

Jen Rugedo kaptita de la manoj de la oficiroj de Ugabuo, el kiuj dek du firme tenis la oldan knomon malgraŭ lia strebado eskapi. Jen ankaŭ Reĝino Kaj, severe rigardanta la baraktoscenon; sed vidante siajn malnovajn akompanantojn proksimiĝi ŝi forturnis sin honte.

Ĉar Kaj kaj ŝiaj oficiroj vere estis malagrabra vidaĵo. La vestoj de Ŝia Moŝto, iam tiom riĉaj kaj belaj, nun estis trivitaj kaj disŝiritaj pro ŝia longa rampado tra la tunelo

Tiktoko de Oz

kiu, konsciuj, kondukis ŝin rekte en la Metalan Arbaron. Efektive ĝi estis unu el la tri sekretaj vojoj, kaj nepre la plej malfacila. Kaj ne nur trovis siajn belajn jupon kaj jakon ŝiritaj, sed ŝia krono estis fleksita kaj disbatita kaj eĉ ŝiaj ŝuoj estis tiom tranĉitaj kaj splititaj ke ili estis pretaj fali de ŝiaj piedoj.

La oficiroj suferis eĉ iom pli ol ilia ĉefo, ĉar truoj estiĝis en la genuoj de iliaj pantalonoj, kaj akraj pintoj de rokoj en la plafono kaj flankoj de la tunelo ĉifonigis ĉiun milimetron de la iam belaj uniformoj. Pli ĉifona kaj mizera armeo neniam restis post batalo, ol tiuj senkulpaĵaj viktimoj de la rokoplena vojo. Sed ĝi ŝajnis al ili la sola rimedo por eskapi de la kruela Reĝo de la Knomoj; do ili plu rampadis, malgraŭ sia suferado.

Kiam ili atingis la Metalan Arbaron iliaj okuloj vidis pli da rabaĵoj ol ili iam prirevis; sed ili estis kaptitoj en tiu grandega kupolo kaj ne povos eskapi preninte la abundajn riĉaĵojn. Eble neniam ekzistis pli malfeliĉa kaj hejmsopirema aro de “konkerintoj” ol tiu grupo el Ugabuo.

Post pluraj tagoj da vagado en la eksterordinara karcero ilin timigis trovi ke Ruggedo ĉeestas. Senesperaj pro sia malgaja stato, la oficiroj montris kuraĝon la unuan fojon post sia foriro el la hejmo kaj, ne sciante ke Ruggedo ne

Ĉapitro Dudek Unu

plu estas Reĝo de la knomoj, ili ĵetis sin sur lin kaj ĵus sukcesis kapti lin kiam iliaj kunaventurantoj atingis tiun lokon.

“Jadi jade!” kriis Betinjo. “Kio okazis al vi ĉiuj?”

Kaj antaŭeniris por renkonti ilin, malgaja kaj indigna.

“Necesis eskapi el la truo tra malgranda tunelo kiu havas akrajn pintoplenajn rokojn ambaŭflanke,” diris ŝi, “kaj ne nur niaj vestoj ĉifoniĝis sed nia karno estas tiom vundita kaj doloroplena ke ĉiu nia artikolo estas rigida kaj lama. Aldonas al nia sufero ke ni ankoraŭ estas kaptitoj; sed nun ni sukcesis kapti la fian Metalan Monarkon kaj ni devigos lin liberigi nin.”

“Rugedo ne plu estas la Metala Monarko, Reĝo de la Knomoj,” Fajliloj informis ŝin. “Li estas senpostenigita kaj pelita el sia regno de Kuoks; sed jen la nova Reĝo, kies nomo estas Kaliko, kaj plaĉas al mi certigi al Via Moŝto ke li estas nia amiko.”

“Plezurigas renkonti Vian Moŝton, tute certe,” diris Kalikot, klinante sin tiom ĝentile kiom se la Reĝino ankoraŭ surhavis belegajn vestojn.

La oficiroj, aŭdinte tiun klarigon, nun liberigis Rugedon; sed, ĉar li ne havis kien iri, li apude staris kaj frontis sian iaman serviston, nun Reĝo anstataŭ li, humile kaj plede.

“Kion vi faras ĉi tie?” demandis Kalikot severatone.

Tiktoko de Oz

“Nu, oni promesis tiom da trezoro kiom mi povos porti en miaj poŝoj,” respondis Ruggedo; “do mi venis ĉi tien por akiri ĝin, ĉar mi ne volis ĝeni Vian Moŝton.”

“La ordono estis ke vi por ĉiam forlasu la landon de la knomoj!” deklaris Kalikot.

“Mi scias; kaj mi foriros tuj kiam mi plenigis miajn poŝojn,” diris Ruggedo, humile.

“Do plenigu ilin kaj foriru,” respondis la nova Reĝo.

Ruggedo obeis. Klininte sin, li komencis preni manplenojn da juveloj kaj ŝovi ilin en siajn poŝojn. Ili estis multepezaj, tiuj diamantoj kaj rubioj kaj smeraldoj kaj ametistoj kaj ceteraĵoj, tiel ke post nelonge Ruggedo apenaŭ povis stari pro la pezego, kvankam la poŝoj ankoraŭ ne estis plenaj. Kiam li ne plu povis klini sin sen fali, Betinjo kaj Polikromo kaj la Roza Princino helpis lin, prenante la plej altkvalitajn gemojn kaj puŝante ilin en liajn poŝojn.

Fine ili ĉiuj estis plenaj kaj Ruggedo estis komika vidaĵo, ĉar certe neniu iam antaŭe havis tiom da poŝoj, kaj ja ne poŝon plenan de tia altevalora aro da gemoj. Li neglektis danki la junulinojn pro ilia komplezo, sed li malafable kapgestis adiaŭe al ili kaj ŝanceliĝante marŝis laŭ la vojo per kiu li antaŭe venis. Ili lasis lin foriri silente, ĉar malgraŭ ĉiu prenitaĵo, la amaso de juveloj sur la tero apenaŭ aspektis malpli densa, pro sia



Tiktoko de Oz

multenombreco. Ili ankaŭ esperis ke ili la lastan fojon vidis la maldignan eksreĝon.

“Min multe ĝojigas ke li foriris,” diris Betinjo, profunde ĝemante. “Se li ne senzorge kaj malsaĝe elspezos sian riĉon, li havas sufiĉe por fondi bankon kiam li atingos Oklahoman.”

“Sed mia frato—mia kara frato! Kie li estas?” demandis Vilulo maltrankvile. “Ĉu vi vidis lin, Reĝino Kaj?”

“Kiel aspektas via frato?” demandis la Reĝino.

Vilulo hezitis respondi, sed Betinjo diris: “Oni nomas lin la Malbelulo. Eble vi rekonos lin pro tio.”

“Ni vidis nur unusolan personon en ĉi tiu kaverno,” diris Kaj, “kaj li forkuris de ni kiam ajn ni proksimiĝis al li. Li kaŝis sin tie, inter la neoraj arboj, kaj ni ankoraŭ ne sukcesis vidi lian vizaĝon. Do mi ne povas scii ĉu aŭ ne li estas malbela.”

“Nepre estas mia kara frato!” kriis Vilulo.

“Jes, nepre,” konsentis Kalikot. “Neniu alia loĝas en ĉi tiu grandioza kupolo, do ne povas esti eraro.”

“Sed kial li kaŝis sin inter tiuj verdaj arboj, anstataŭ ĝui ĉiujn ĉi tiujn brilantajn orajn?” demandis Betinjo.

“Ĉar li trovas manĝaĵojn inter la naturaj arboj,” respondis Kalikot, “kaj mi memoras ke li konstruis malgrandan domon tie, en kiu li dormas. Rilate al tiuj brilantaj oraj arboj, mi agnoskas ke unuavide ili tre bele

Ĉapitro Dudek Unu

aspektas. Oni ne povas ne admiri ilin, kaj ankaŭ la riĉajn juvelojn dismetitajn sub ilin, sed se oni devas konstante rigardi ilin, ili fariĝas iom tedaj.”

“Mi kredas ke tio estas vera,” deklaris Vilulo. “Mia kara frato tre saĝe preferas realajn arbojn ol imitaĵojn. Sed venu, ni iru tien por trovi lin.”

Vilulo tuj komencis paŝi al la verda arbareto, kaj la aliaj sekvis lin, dezirante vidi la finan saviĝon de lia longe serĉita, longe perdita frato.

Ne longe for de la rando de la arbareto ili trovis malgrandan dometon, lerte faritan el tigoj kaj oraj branĉoj kunplektitaj. Dum ili proksimiĝis al la loko ili ekvidis ulon kuri en la dometon kaj brufermi la pordon post si.

Vilulo kuris al la pordo kaj laŭte kriis:

“Frato! Frato!”

“Kiu vokas,” demandis malfeliĉa, malfortika voĉo el interne de la dometo.

“Vilulo—via propra amanta frato—kiu delonge serĉas vin kaj nun venis savi vin.”

“Tro malfrue!” respondis la malgaja voĉo. “Neniu nun povas savi min.”

“Ho, vi eraras pri tio,” diris Vilulo. “Estas nova Reĝo de la Knomoj, nomita Kalikot, anstataŭ Rugedo, kaj li promesis liberigi vin.”

Tiktoko de Oz

“Liberigi! Mi ne kuraĝas liberiĝi!” diris la Malbelulo, per senespera voĉo.

“Kial ne, Frato?” demandis Vilulo, maltrankvile.

“Ĉu vi scias kion oni faris al mi?” sonis la respondo tra la fermita pordo.

“Ne. Diru al mi, Frato, kion oni faris?”

“Kiam Rugedo unue kaptis min mi estis tre bela. Ĉu vi memoras, Vilulo?”

“Ne klare, Frato; vi estis tre juna kiam mi foriris de la hejmo. Sed mi memoras ke Panjo opiniis vin bela.”

“Ŝi pravis! Mi estas certa ke ŝi pravis,” ploris la kaptito. “Sed Rugedo volis damaĝi min—fari min tia ke la tuta mondo opinios min malbela—do li faris fian sorĉon. Mi enlitiĝis bela—eble, pli ĝuste, linda—nu, tre modeste, mi nur diru bonaspekta—kaj mi vekiĝis la postan matenon la plej malbela homo en la tuta mondo! Mi tiom aĉaspektas ke kiam mi rigardas per spegulo mi timigas min.”

“Povra Frato,” diris Vilulo komplate, kaj ĉiuj aliaj silentis simpatie.

“Mi tiom hontis pro mia aspekto,” daŭrigis la voĉo de la frato de Vilulo, “ke mi volis kaŝi min; sed la kruela Reĝo Rugedo devigis min aperi antaŭ la tuta knomaro, al kiu li diris: ‘Jen la Malbelulo!’ Sed kiam la knomoj vidis

Ĉapitro Dudek Unu

mian vizaĝon ĉiuj ekridis kaj rikanis, kaj tio instigis ilin ne plu labori. Vidante tion, Rugedo koleriĝis kaj puŝis min en tunelon, kaj fermis la rokenirejon por ke mi ne povu eliri. Mi sekvis la longon de la tunelo ĝis atingi ĉi tiun kupolegon, kie staras la eksterordinara Metala Arbaro, kaj ĉi tie mi restas de tiam.”

“Kompatinda Frato!” ripetis Vilulo. “Sed mi petas vin nun eliri kaj fronti nin, viajn amikojn. Neniu ĉi tie ridos aŭ rikanos, negrave kiom malbela vi estas.”

“Neniel,” ĉiuj aldonis, subtene.

Sed la Malbelulo rifuzis la inviton.

“Mi ne povas,” diris li; “vere, mi ne povas fronti nekonatojn, ĉar mi estas malbela.”

Vilulo turnis sin al la ĉirkaŭanta grupo.

“Kion mi faru?” li demandis lamente. “Mi ne povas lasi mian karan fraton ĉi tie, kaj li rifuzas veni el tiu domo kaj fronti nin.”

“Mi scias,” respondis Betinjo. “Li surmetu maskon.”

“Ĝuste tiun ideon mi bezonis!” kriis Vilulo, ĝoje; kaj li vokis: “Frato, metu maskon sur vian vizaĝon, tiel ke neniu el ni povos vidi kia vi aspektas.”

“Mi ne havas maskon,” respondis la Malbelulo.

“Jen,” diris Betinjo; “li uzu mian poŝtukon.”

Vilulo rigardis la malgrandan kvadratan ŝtofpecon kaj kapneis.

Tiktoko de Oz

“Ne sufiĉe granda,” li oponis; “mi certas ke ĝi ne sufiĉas por kaŝi la vizaĝon de viro. Sed li povos uzi mian.”

Dirinte tion li tiris el poŝo sian propran poŝtukon kaj iris al la pordo de la dometo.

“Jen, mia Frato,” li vokis, “prenu ĉi tiun poŝtukon kaj faru el ĝi maskon. Mi ankaŭ donos al vi mian tranĉiilon por ke vi povu tranĉi truetojn por la okuloj, kaj poste ligu ĝin sur vian vizaĝon.”

La pordo malrapide malfermiĝis, nur sufiĉe por ke la Malbelulo elmetu sian manon kajprenu la poŝtukon kaj la tranĉilon. Poste ĝi refermiĝis.

“Ne forgesu truon por via nazo,” kriis Betinjo. “Vi devos spiri, memoru.”

Dum kelka tempo estis silente. Reĝino Kaj kaj ŝia armeo sidis sur la tero ripozante. Betinjo sidis sur la dorso de Hanĉjo. Polikromo dancis leĝere tien kaj reen sur la juvelitaj vojoj dum Fajliloj kaj la Princino promenis tra la arbaretoj brak'-en-brake. Tiktoko, kiu neniam estis laca, staris senmove.

Post iom da tempo sono aŭdeblis el la dometo.

“Ĉu vi pretas?” demandis Vilulo.

“Jes, Frato,” estis la respondo kaj la pordo malfermiĝis por lasi la Malbelulon elpaŝi.

Betinjo eble ridus aŭdeble se ŝi ne memorus kiom



Ĉapitro Dudek Unu

facile la frato de Vilulo sentas mokon, ĉar la poŝtuko per kiu li maskis sian aspekton estis ruĝa kovrita per grandaj blankaj rondaj punktoj. En ĝi du truoj estis tranĉitaj—antaŭ la okuloj—kaj du malpli grandaj antaŭ la nazo ebligis ke la viro facile spiradu. La tuko estis streĉe tiritita sur la vizaĝon de la Malbelulo kaj ligita malantaŭ lia kolo.

Liaj vestoj iam estis bonaj, sed nun estis lamentige trivitaj kaj ĉifonaj. Liaj silkaj ŝtrumpoj enhavis truojn, kaj liaj ŝuoj estis skrapitaj kaj bezonis nigriĝi. “Sed kion oni anticipu,” flustris Betinjo, “pri persono kiu de tiom da jaroj estis kaptito?”

Vilulo antaŭenkuris kaj ĉirkaŭbrakumis sian nove retrovitan fraton per ambaŭ brakoj. La frato ankaŭ ĉirkaŭbrakumis Vilulon, kiu post tio antaŭenkondukis lin kaj konigis lin al la tuta kunveninta grupo.

“Ĉi tiu estas la nova Reĝo de la Knomoj,” li diris kiam ili atingis Kalikoton. “Li estas nia amiko, kaj liberigis vin.”

“Tio estas afabla komplezo,” respondis Malbelulo per malfeliĉa voĉo, “sed mi malvolegas reiri al la mondo en ĉi tia stato. Krom se mi restos por ĉiam maskita, mia aĉa vizaĝo acidigos la lakton kaj malfunkciigos la horloĝojn.”

“Ĉu ne eblos iel nuligi la sorĉon?” demandis Betinjo.

Tiktoko de Oz

Vilulo rigardis espereme Kalikoton, kiu kapneis.

“Certe *mi* ne povas nuligi la sorĉon,” li diris. “Rugedo amis la magion, kaj lernis multajn sorĉojn kiujn tute ne konas ni, la aliaj knomoj.”

“Eble Rugedo mem povus nuligi sian propran sorĉon,” sugestis Kaj; “sed, domaĝe, ni lasis la oldan Reĝon eskapi.”

“Ne gravas, mia kara Frato,” diris Vilulo konsole; “min tre feliĉigas trovi vin eĉ kvankam eble mi neniam vidos vian vizaĝon. Do ni festu ĉi tiun ĝojigan rekuniĝon.”

La Malbelulon plorigis tiu tenera parolo, kaj la larmoj komencis malsekigi la ruĝan poŝtukon, do Vilulo delikate viŝis ilin per la maniko de sia mantelo.





ĈAPITRO 22

Komplezaj Kisoj

“ĈU vi bedaŭros foriri de ĉi tiu bela loko?” Betinjo demandis al la Malbelulo.

“Neniel,” diris li. “Juveloj kaj oro estas tre malvarmaj kaj senkoraj, kaj mi estas certa ke mi baldaŭ mortus pro soleco se mi ne trovus ĉi tiun naturan arbaron ĉe la bordo de la artefarita. Ĉiuokaze, sen tiuj realaj arboj mi baldaŭ mortus pro malsato.”

Betinjo rigardis la kuriozajn arbojn.

“Mi tute ne komprenas tion,” ŝi konfesis. “Kion manĝeblan vi trovas ĉi tie?”

“La plej bonan manĝaĵon en la mondo,” Malbelulo respondis. “Ĉu vi vidas tiun arbareton maldekstre?” li

Tiktoko de Oz

aldonis, indikante ĝin per gesto; “nu, tiaj arboj ne kreskas en via lando, aŭ en iu alia loko ekster ĉi tiu kaverno. Mi nomas ilin ‘Hotelarboj’, ĉar ili fruktigas ian specialan menu-nukson kiun mi nomas ‘Trimanĝaj Nuksoj’.”

“Nekredeble!” diris Betinjo. “Kiaj estas ‘Trimanĝaj Nuksoj’?”

“Aspekte ili iom similas al kokosoj,” klarigis la Malbelulo. “Oni bezonas nur pluki nukson kaj sidiĝi kaj tagmanĝi. Unue oni malŝraŭbas la supron kaj en ĝi estas taso da bona supo. Manĝinte tion, oni malŝraŭbas la mezon kaj en ĝi estas kavo plena de viando kaj terpomoj, legomoj kaj tre bona salato. Oni manĝas tion kaj poste malŝraŭbas la malsupron kaj trovas en ĝi deserton: torton kaj kukon, fromaĝon kaj biskvitojn, kaj nuksojn kaj sekajn vinberojn. La Trimanĝaj Nuksoj varias rilate al gusto kaj enhavo, sed ĉiuj estas bonaj kaj en ĉiu oni trovas kompletan tripartan tagmanĝon.”

“Sed kion oni manĝas en la mateno?” demandis Betinjo.

“Nu, kreskas Matenmanĝaj Arboj por tio, tie, dekstre. Ili produktas nuksojn, simile al la aliaj, sed la nuksoj enhavas kafon aŭ ĉokoladon anstataŭ supon; avenkaĉon anstataŭ viandon kun terpomoj, kaj fruktojn anstataŭ deserton. Malgraŭ la malfeliĉeco de mia vivo en ĉi tiu eksterordinara karcero, mi devas agnoski ke neniu povus

Ĉapitro Dudek Du

vivi pli lukse en la plej bona hotelo en la mondo ol mi mem ĉi tie; sed mi ĝojos reesti en la libera aero kaj vidi la bonan malnovan sunon kaj la arĝentan lunon kaj la molan verdan herbon kaj la florojn kiujn kisas la matena roso. Ha, kiom pli belaj estis tiuj benoj ol la scintilo de gemoj aŭ la malvarma brilo de oro!”

“Kompreneble,” diris Betinjo. “Ĝam mi konis knabeton kiu volis malsani pro rubeolo, ĉar ĉiuj aliaj knabetoj najbaraj suferis pro ĝi, kaj li estis tre malfeliĉa ĉar li ne povis afliktiĝi per ĝi, malgraŭ ĉia strebo. Do mi estas preskaŭ certa ke tio kion ni volas sed ne povas havi ne taŭgas por ni. Ĉu ne, Vilulo?”

“Ne ĉiam, kara,” li serioztone respondis. “Se ni ĉiam volus nenion, ni havus ĉiam nenion, ĉu bonan ĉu malbonan. Mi opinias ke niaj sopiroj estas naturaj, kaj se ni agas laŭ la instigo de la naturo ni ne multe eraras.”

“Rilate al mi,” diris Reĝino Kaj, “mi opinias ke la mondo estus teda sen la oro kaj la juveloj.”

“Ĉio bonas siamaniere,” diris Vilulo; “sed eblas havi tro da io bona. Kaj mi rimarkis ke la valoro de io dependas de kiom malofta ĝi estas kaj malfacile akirebla.”

“Pardonu ke mi interrompas vin,” diris Reĝo Kalikot, veninte al ilia flanko, “sed, ĉar ni jam savis la fraton de

Tiktoko de Oz

Vilulo, mi deziras reiri al mia reĝa kaverno. Ĉar mi estas Reĝo de la Knomoj, mi devas prizorgi miajn viglajn regatojn kaj certigi ke ili bone kondukas.”

Do ĉiuj turnis sin kaj komencis marŝi tra la Metala Arbaro al la alia flanko de la granda kupolhava kavo, kie ili antaŭe eniris ĝin. Vilulo kaj lia frato marŝis duope kaj ambaŭ aspektis feliĉaj pro sia rekunesto post la longa aparteco. Betinjo ne kuraĝis rigardi la grandpuktan poŝtukon, timante ke ŝi ridos aŭdeble, do ŝi marŝis malantaŭ la du fratoj kondukante Hanĉjon per lia maldekstra orelo.

Kiam fine ili atingis la lokon kie la koridoro kondukis al la ekstera mondo, Reĝino Kaj diris, hezitmaniere, kio ne estis kutima por ŝi:

“Mi ne konkeris la Landon de la Knomoj, kaj mi ne anticipas fari tion; sed mi deziras kolekti kelkajn el ĉi tiuj belaj juveloj antaŭ ol foriri el ĉi tie.”

“Prenu laŭvole, s’rino,” diris Reĝo Kalikot, kaj tuj la oficiroj de la Armeo utiligis tiun reĝan permeson kaj komencis plenigi siajn poŝojn, dum Kaj kunligis multajn diamantojn en granda poŝtuko.

Farinte tion, ĉiuj eniris la koridoron; la knomoj iris la unuaj por lumigi la vojon per siaj torĉoj. Ili ne multe marŝis antaŭ ol Betinjo surprizite diris:

“Ho, estas juveloj ankaŭ ĉi tie!”

Ĉapitro Dudek Du

Ĉiuj turnis sian rigardon al la tero kaj ili trovis veran juvelvojon sur la roka planko.

“Strange!” diris Kalikot, multe surprizite. “Mi nepre sendu kelkajn knomojn por kolekti la gemojn kaj remeti ilin en la Metalan Arbaron. Kiel ili venis ĉi tien?”

Sur la tuta vojo laŭlonge de la koridoro ili trovis tiun juvelvojon, sed kiam ili proksimiĝis al la fino la mistero klariĝis. Ĉar tie, kaŭrante sur la planko kun sia dorso al la roka muro, sidis olda Rugedo, fortege en- kaj el-spirante kvazaŭ plene lacigite. Ili komprenis ke li disŝutis la juvelojn el siaj multaj poŝoj: ili krevis, unu post la alia, pro la pezo de sia enhavo dum li fuŝmarŝis laŭlonge de la koridoro.

“Sed al mi ne gravas,” diris Rugedo, profunde ĝemante. “Mi nun konscias ke mi ne povus longe porti tian tre pezan ŝarĝon, eĉ se mi sukcesus eskapi el ĉi tiu koridoro portante ĝin. Mi timas ke la virino kiu kudris la poŝojn sur mian robon uzis nebonkvalitan fadenon, kaj pro tio mi dankos sin.”

“Ĉu ankoraŭ restas al vi juveloj?” demandis Betinjo.

Li rigardetis la internon de kelkaj restantaj poŝoj.

“Malmultaj,” diris ili, “sed ili sufiĉos por miaj bezonoj, kaj mi ne plu deziras esti riĉa. Se iu el vi bonvolos helpi min leviĝi, mi eliros kaj forlasos vin, ĉar mi scias ke vi ĉiuj malamas min kaj preferus liberan spacon anstataŭ mian ĉeeston.”

Tiktoko de Oz

Vilulo kaj Kalikot surpiedigis la oldan Reĝon, kaj nur tiam li rimarkis la fraton de Vilulo. La stranga kaj neatendita apero de la Malbelulo tiom surprizis Ruggedon ke li ekkriis kaj komencis tremi, kvazaŭ vidante fantomon.

“Ki-ki-kiu estas?” li sukcesis balbuti.

“Mi estas tiu senhelpa kaptito kiun transformis via kruela magio el bela viro en malbelan!” respondis la frato de Vilulo, per severe riproĉa voĉo.

“Vere, Ruggedo,” diris Betinjo, “hontu pro tiu malica ago.”

“Mi ja hontas, kara,” agnoskis Ruggedo, kiu nun estis tiom amikema kaj humila kiom antaŭe li estis kruela kaj venĝema.

“Tial,” respondis la knabino, “faru pli da magio kaj redonu al la kompatindulo lian naturan vizaĝon.”

“Se mi povus,” respondis la olda Reĝo, “sed memoru ke Tititi-Huĉu forprenis de mi ĉian magipovon. Tamen, mi neniam ĝenis min per lerno de kiel nuligi la sorĉon kiun mi faris al la frato de Vilulo, ĉar mi intencis ke li ĉiam restu malbela.”

“Ĉiu sorĉo,” komentis bela Polikromo, “havas antidoton; kaj se vi ja sciis tiun malbelecosorĉon, Ruggedo, certe vi sciis nuligi ĝin.”

Li kapneis.



Tiktoko de Oz

“Se mi sciis, mi—mi forgesis,” li balbutis bedaŭre.

“Penu pensi!” petegis Vilulo, fervore. “*Bonvolu* peni pensi!”

Rugedo taŭzis sian hararon per ambaŭ manoj, ĝemis, frapis sian bruston, frotis sian orelon, kaj rigardis stulte la grupon.

“Mi malklare memoretas ke ja ekzistis ia maniero nuligi la sorĉon,” diris li; “sed misfortuno tiom konfuzis mian cerbon ke mi ne povas memori kio ĝi estis.”

“Atentu, Rugedo,” diris Betinjo, akre, “ĝis nun ni bone traktis vin, sed ni ne toleros pli da absurdeco, kaj se vi volas bone farti vi enmensigos tiun sorĉon!”

“Kial?” li demandis, turnante sin por rigardi la knabineton miroplene.

“Ĉar multe gravas al la frato de Vilulo. Li ege hontas pro sia nuna aspekto, kaj vi kulpas pri tio. Efektive, Rugedo, vi tiom fie agis dum via vivo ke tute ne malutilos al vi kompleze agi nun.”

Rugedo palpebrumetis al ŝi, kaj denove ĝemis, kaj post tio aspektis vere klopodanta pensi.

“Mi kredas memori, tre malklare,” diris li, “ke iaspeca kiso nuligos la malbelecosorĉon.”

“Kia kiso?”

“Kia? Nu, aŭ—aŭ—aŭ kiso de Konata Knabino; aŭ—aŭ—kiso de Konata Knabino kiu iam estis Feino; aŭ—

Ĉapitro Dudek Du

aŭ kiso de persono kiu ankoraŭ estas Feino. Mi ne memoras ĉu tiu aŭ ĉi tiu. Sed kompreneble neniu knabino, konata aŭ feina, konsentus kisi personon tiom malbelan—tiom ege, ege, ege malbelan—kiom la frato de Vilulo.”

“Mi tute ne certas pri tio,” diris Betinjo, admirinde kuraĝa; “mi estas Konata Knabino, kaj se *mia* kiso nuligos tiun aĉan sorĉon, mi—mi kisos.”

“Ho, vere vi ne povus,” protestis Malbelulo. “Mi devus forpreni mian maskon, kaj kiam vi vidus mian vizaĝon, nenio instigus vin kisi min, negrave kiom komplezema vi estas.”

“Nu, rilate al tio,” diris la knabineto, “mi tute ne bezonos vidi vian vizaĝon. Jen mia plano: Restu en ĉi tiu obskura koridoro, kaj ni forsendos la knomojn kun la torĉoj. Vi forprenos la poŝtukon, kaj mi—mi kisos vin.”

“Vere jen kompleza ago, Betinjo!” diris Vilulo, dankeme.

“Nu, ĝi nepre ne mortigos min,” ŝi respondis; “kaj, se feliĉigos vin kaj vian fraton, mi akceptas la riskon.”

Do Kalikot ordonis ke la torĉoportantoj foriru el la koridoro, kaj ili faris tion per iro tra la rokan aperturon. Reĝino Kaj kaj ŝia armeo ankaŭ eliris; sed tiom interesis la aliajn la eksperimento farota de Betinjo ke ili restis en

Tiktoko de Oz

grupo ĉe la buŝo de la koridoro. Kiam la granda roko relokiĝis, plene fermante la aperturon, ili restis en plena obskuro.

“Nu,” vokis Betinjo gajavoĉe, “ĉu vi jam forprenis la poŝtukon de via vizaĝo, Malĉjo?”

“Jes,” li respondis.

“Nu, do, kie vi estas?” ŝi demandis, etendante siajn brakojn.

“Ĉi tie,” diris li.

“Vi devos kliniĝi iom, sciu.”

Li trovis ŝiajn manojn kaj tenante ilin per siaj li klinis sin ĝis lia vizaĝo estis proksima al tiu de la knabineto. La aliaj aŭdis klaran ŝmacan kison, kaj poste Betinjo diris:

“Jen! Mi kisis, kaj tute ne dolorigis min!”

“Diru al mi, kara frato, ĉu la sorĉo nuligiĝis?” demandis Vilulo.

“Mi ne scias,” estis la respondo. “Eble jes kaj eble ne. Mi ne povas scii.”

“Ĉu iu havas alumeton?” demandis Betinjo.

“Mi havas plurajn,” diris Vilulo.

“Do Rugedo flamigu unu el ili kaj rigardu la vizaĝon de via frato, dum ni aliaj ĉiuj turnos al li la dorson. Rugedo malbeligis vian fraton, do verŝajne li povos toleri la hororon rigardi lin, se la sorĉo ne estas nuligita.”

Ĉapitro Dudek Du

Akceptinte tion, Rugedo prenis la alumeton kaj flamigis ĝin. Li rigardetis kaj estingis la alumeton.

“Ankoraŭ malbela!” li diris timtreme. “Do ne sukcesis la kiso de Konata Knabino.”

“Mi provu,” proponis la Roza Princino, per sia dolĉa voĉo. “Mi estas Konata Knabino kiu iam estis Feino. Eble mia kiso nuligos la sorĉon.”

Fajliloj ne plene aprobis tion, sed li estis tro malavida por protesti. Do la Roza Princino palpe sekvis la vojon al la frato de Vilulo kaj kisis lin.

Rugedo flamigis alian alumeton, dum ĉiuj forturnis sin.

“Ne,” anoncis la eksreĝo; “ankaŭ tio ne nuligis la sorĉon. Evidente necesas ke Feino kisu—aŭ eble mia memoro plene fuŝis.”

“Ponjo,” diris Betinjo, petege, “ĉu vi bonvolos provi?”

“Kompreneble!” respondis Polikromo, gaje ridante. “Neniam mi kisis viron dum la miloj da jaroj de mia ekzisto, sed mi kisos lin por plaĉi al nia fidela Vilulo, kies malegoisma amo al sia malbela frato meritas rekompenco.”

Jam dum ŝi parolis Polikromo paŝis leĝere al la flanko de la Malbelulo kaj rapide tuŝis lian vangon per siaj lipoj.

“Ho, dankon—dankon!” li fervore kriis. “Ĉifoje mi

Tiktoko de Oz

ŝanĝiĝis, mi scias tion. Mi sentas la ŝanĝon! Mi estas aliforma. Viĉjo—kara Viĉjo—denove mi estas mi!”

Fajliloj, kiu estis proksima al la aperturo, tuŝis la risorton kiu liberigis la grandan rokon kaj ĝi subite eksteren puŝis sin kaj enlasis inundon de taglumo.

Ĉiu staris senmove, gapante al la frato de Vilulo kiu, ne plu maskite de la grandpunkta poŝtuko, ridetis responde al ilia rigardo.

“Nu,” diris Vilulo, fine ĉesigante la grandan silenton kaj amase enspirante aeron pro kontentiĝo, “vi ne plu estas la Malbelulo, kara frato; sed por diri la tute honestan veron, la vizaĝo natura por vi ne estas pli bela ol necesas.”

“Mi opinias lin tre bonaspekta,” komentis Betinjo, rigardante la viron kritike.

“Kompare kun antaŭe,” diris Reĝo Kalikot, “li vere estas bela. Vi, kiuj neniam vidis lian malbelecon, eble ne komprenas tion; sed misfortune mi devis rigardi la Malbelulon ofte, kaj mi ripetas ke, kompare kun antaŭe, tiu viro nun estas bela.”

“Bone,” respondis Betinjo, vikle, “ni akceptas vian takson, Kalikot. Kaj nun ni foriru el ĉi tiu tunelo kaj reeniru la mondon.”



ĈAPITRO 23

Rugedo Reformiĝas

ILI ne bezonis multan tempon por reatingi la reĝan kavernon de la Reĝo de la Knomoj, kie Kalikot ordonis ke oni portu al ili la plej plaĉajn manĝaĵojn troveblajn tie.

Rugedo sekvis la ceteran parton de la grupo kaj kvankam neniu atentis la eksreĝon ili ne kontraŭis lian ĉeeston nek ordonis ke li foriru. Li rigardis time por trovi ĉu ovoj ankoraŭ gardas la enirejon, sed ili jam malaperis; do li rampis en la kavernon, sekvante la aliajn, kaj humile kaŭris en angulo de la ĉambro.

Tie Betinjo trovis lin. Ĉiuj kunuloj de la knabineto nun tiom feliĉis pro la sukceso de la serĉo de Vilulo je sia frato, kaj la ridado kaj gajeco ŝajnis tiom vastigita, ke

Tiktoko de Oz

la koro de Betinjo moliĝis rilate al la senamika oldulo kiu iam estis ilia fervora malamiko, kaj ŝi portis al li iom da manĝaĵoj kaj trinkaĵoj.

La okuloj de Ruggedo pleniĝis per larmoj pro tiu neatendita komplezo. Li prenis manon de la infano per sia propra kaj premis ĝin danke.

“Atentu, Kalikot,” diris Betinjo, parolante al la nova Reĝo, “kiel utilas malamikadi kontraŭ Ruggedo? Lia tuta magia povo estas for, do li ne plu povas damaĝi, kaj mi estas certa ke li pentas sian misagadon al ĉiuj.”

“Ĉu?” demandis Kalikot, rigardante sian eksmastron.

“Jes,” diris Ruggedo. “La knabino pravas. Mi bedaŭras kaj mi estas sendanĝera. Mi ne volas vagadi tra la tuta mondo, sur la tero, ĉar mi estas knomo. Neniu knomo povas esti feliĉa aliloke ol subtere.”

“Se tiel estas,” diris Kalikot, “mi permesos ke vi restu ĉi tie se vi bone kondutos, sed se vi denove miskondutos, mi elpelos vin, laŭ la ordono de Tititi-Huĉu, kaj vi devos vagi.”

“Ne dubu, ĉar mi bone kondutos,” promesis Ruggedo. “Estas malfacile esti Reĝo, kaj eĉ pli malfacile esti bona Reĝo. Sed nun mi estas ordinara knomo kaj mi estas certa ke mi kondutos senkulpe.”

Al ĉiuj estis agrable aŭdi tion kaj scii ke Ruggedo vere reformiĝis.

Ĉapitro Dudek Tri

“Mi esperas ke li plenumos sian promeson,” flustris Betinjo al Vilulo; “sed se li denove miskondutos ni estos tre malproksime de la Regno de la Knomoj kaj Kalikot devos mem priatenti la oldan knomon.”

Polikromo estis iom nekontenta dum la pasintaj unu-du horoj. La bela filino de la Ĉielarko sciis ke jam ŝi faris ĉion eblan por helpi siajn teramikojn, do ŝi komencis sopiri al sia ĉielhejmo.

“Mi kredas,” ŝi diris, atente aŭskultinte, “ke komencas pluvi. La Reĝo de la Pluvo estas mia onklo, sciu, kaj eble li legis miajn pensojn kaj helpos min. Ĉiukaze, mi devas rigardi la ĉielon kaj certiĝi.”

Do ŝi eksaltis kaj kuris tra la koridoro al la ekstera enirejo, kaj ĉiuj sekvis ŝin kaj grupiĝis sur ebena parto de la flanko de la monto. Efektive, mallumaj nuboj plenigis la ĉielon kaj malrapida, guteta pluvo komenciĝis.

“Ne daŭros longe,” diris Vilulo, rigardante supren, “kaj kiam ĉesos pluvi ni perdos la dolĉan feineton kiun ni amas. Ve,” li pludiris, post momento, “la nuboj jam disiĝas okcidente, kaj—vidu!—jen venas la Ĉielarko.”

Betinjo ne rigardis la ĉielon; ŝi rigardis Polikromon, kies feliĉa, ridetanta vizaĝo nepre antaŭdiris la alvenon de ŝia patro por porti ŝin al la Nubaj Palacoj. Post momento

Tiktoko de Oz

radio de sunbrilo inundis la monton kaj belega Ĉielarko aperis.

Farante krion de ĝojo Polikromo saltis sur rokan pinton kaj etendis siajn brakojn. Senhezite la Ĉielarko suben iris ĝis ĝia fino estis ĝuste ĉe ŝiaj piedoj, kaj per unu gracia salto ŝi suriris ĝin kaj tuj ŝin ĉirkaŭbrakumis ŝiaj radiantaj fratinoj, la filinoj de la Ĉielarko. Sed Polikromo liberigis sin por kliniĝi trans la randon de la brilanta arko kaj kapgesti kaj rideti kaj ĵeti dekduon da kisoj al siaj ekskamaradoj.

“Adiaŭ!” ŝi vokis, kaj ili ĉiuj kriis “Adiaŭ!” responde kaj gestis per siaj manoj al sia bela amikino.

Malrapide la grandioza arko leviĝis kaj degelis en la ĉielon, ĝis la okuloj de la fervoraj rigardantoj vidis nur lanugajn nubojn naĝantajn sur la bluo.

“Mi ege bedaŭras pro la foriro de Polikromo,” diris Betinjo, kiu emis plori; “sed mi s’pozas ke ŝi estos ege pli feliĉa kun siaj fratinoj en la ĉielpalacoj.”

“Sendube,” respondis Vilulo, serioze kapgestante. “Tie estas ŝia hejmo, sciu, kaj povraj vagantoj kiuj ne havas hejmon, samkiel ni, komprenas kion tio signifas por ŝi.”

“Iam,” diris Betinjo, “ankaŭ mi havis hejmon. Nun, mi havas nur—nur—karan Hanĉjon!”

Ŝi metis siajn brakojn ĉirkaŭ sian vilan nehoman amikon, kaj li diris: “Hi-ha!” per tono kiu indikis ke li



Tiktoko de Oz

komprenas ŝian senton. Kaj la homa vila amiko karesis la kapon de la infano tenere kaj diris: “Vi eraras pri tio, Betinjo, kara. Mi neniam dizertos vin.”

“Nek mi!” kriis la frato de la Vilulo, per fervora tono.

La knabineto rigardis ilin dankeme, kaj ŝiaj okuloj ridetis tra la larmoj.

“Bone,” ŝi diris. “Denove pluvas, do ni reiru en la kavernon.”

Iom senĝoje, ĉar ĉiuj amis Polikromon kaj sentos ŝian foreston, ili reeniris la regnon de la Reĝo de la Knomoj.





ĈAPITRO 24

Doroteo Delicas

“NU,” diris Reĝino Kaj, kiam ĉiuj denove sidis en la reĝa kaverno de Kalikot, “kion ni faru sekve? Se mi povus trovi la vojon al Ugabuo mi rekondukus mian armeon hejmen tuj, ĉar min tro superŝutis aĉaj malfacilaĵoj.”

“Ĉu vi ne volas konkeri la mondon?” demandis Betinjo.

“Mi ŝanĝis mian celon,” agnoskis la Reĝino. “La mondo estas tro granda por konkero fare de nur unu persono kaj mi estis pli feliĉa inter miaj propraj kunugabuanoj. Mi volas—kiom ege mi volas—jam reesti tie!”

“Ankaŭ mi!” kriis ĉiu oficiro fervortone.

Nun la leganto sciu ke en la tre malproksima Lando Oz la bela Reganto, Ozma, atente rigardis la aventurojn

Tiktoko de Oz

de Vilulo, kaj Tiktoko, kaj ĉiuj kiujn ili renkontis. Tagon post tago Ozma, kun la mirinda Sorĉisto de Oz sidanta apud ŝi, rigardis Magian Bildon en radiuma kadro, kiu okupis unu flankon de la komforta buduaro de la Reganto en la palaco de la Smeralda Urbo. La Magia Bildo estis speciala, ĉar ĝi montris ĉiun scenon kiun Ozma volis rigardi, kaj ĉiuj bildaĵoj moviĝadis, precize kiam la eventoj okazis. Do Ozma kaj la Sorĉisto rigardis ĉiun agon de la aventurantoj ekde la momento kiam Vilulo renkontis ŝipfuĝintan Betinjon kaj Hanĉjon en la Regno de la Rozoj, kaj kiam la Rozan Princinon, prakuzino de Ozma, ekzilis ŝiaj senkoraj regatoj.

Kiam Kaj kaj ŝiaj sekvantoj fervorege volis reiri al Ugabuo, Ozma kompatis ilin kaj memoris ke Ugabuo estas angulo de la Lando Oz. Ŝi turnis sin al sia kunsidanto kaj demandis:

“Ĉu via magio povas reporti tiujn malfeliĉulojn al ilia kutima hejmo, Sorĉisto?”

“Jes, Via Moŝto,” respondis la malgranda Sorĉisto.

“Mi opinias ke la povra Reĝino sufiĉe suferis dum sia fuŝprovo konkeri la mondon,” diris Ozma, ridetante pro la absurdeco de tiu entrepreno, “do sendube de nun ŝi estos kontenta en sia propra Regno. Bonvolu sendi ŝin tien, Sorĉisto, kaj kun ŝi la oficiojn kaj Fajlilojn.”

“Kaj kien la Rozan Princinon?” demandis la Sorĉisto.

Ĉapitro Dudek Kvar

“Sendu ŝin kun Fajliloj al Ugabuo,” respondis Ozma. “Ili fariĝis firmaj amikoj kaj mi estas certa ke apartigi ilin malfeliĉigus ilin.”

“Bone,” diris la Sorĉisto, kaj tute sen ĝeno aŭ mistero li faris magian riton kiu estis simpla kaj efika. Sekve la sidantojn en la kaverno de la Reĝo de la Knomoj surprizis kaj mirigis la malapero de la Ugabuanoj el la ĉambro, kaj kun ili la Roza Princino. Unue ili tute ne komprenis; sed baldaŭ Vilulo suspektis la veron, kaj, kredante ke nun Ozma interesiĝas pri la grupo li tiris el poŝto etan ilon kiun li tenis apud sia orelo.

Ozma, vidante tiun agon per sia Magia Bildo, tuj prenis similan ilon kiu estis sur apuda tablo kaj tenis ĝin apud sia propra orelo. La du iloj registris la samajn delikatajn sonvibrojn kaj konsistigis sendratan telefonon, inventitan de la Sorĉisto. Homoj apartigitaj per distanco tiel kapablis konversacii tute facile kaj tute sen konektanta drato.

“Ĉu vi aŭdas min, Vilulo?” demandis Ozma.

“Jes, Via Moŝto,” li respondis.

“Mi resendis la Ugabuanojn al ilia propra valetto,” anoncis la Reganto de Oz, “do ne maltrankviliĝu pro ilia malapero.”

“Vi multe komplezis,” diris Vilulo. “Sed, Via Moŝto

Tiktoko de Oz

permesu ke mi raportu ke mia propra tasko ĉi tie jam estas finita. Mi trovis mian perditan fraton, kaj li nun estas apud mi, libera el la ĉenoj de malbeleco kiujn ĵetis sur lin Ruggedo. Tiktoko fidele servis min kaj miajn kamaradojn, laŭ via peto, kaj mi esperas ke vi nun retransportos la Horloĝfunkcian Homon al via felando Oz.”

“Mi faros tion,” respondis Ozma. “Sed kion pri vi, Vilulo?”

“Mi estis tre feliĉa en Oz,” li diris, “sed mia ŝuldo al aliaj devigas min ekzili min de tiu ĝuplena lando. Unue, mi devas prizorgi mian nove trovitan fraton, kaj mi havas novan kamaradon, karan knabineton nomitan Betinjo Bobin, kiu estas senhejma kaj al ŝi mankas amikoj escepte de mi kaj malgranda azeno nomita Hanĉjo. Mi promesis al Betinjo ke mi neniam dizertos ŝin dum ŝi bezonos amikon, do mi devas por ĉiam rezigni pri la ĝojoj de la Lando Oz.”

Li diris tion kun bedaŭroĝemo, kaj Ozma ne respondis sed metis la iletan sur sian tablon, tiel ĉesigante la komunikadon kun la Vilulo. Sed la bela Reganto de Oz plu rigardis sian magian bildon, kun pensema esprimo sur sia vizaĝo, kaj la malgranda Sorĉisto de Oz rigardis Ozman kaj ridetis agrable al si.

En la kaverno de la Reĝo de la Knomoj Vilulo remetis

Ĉapitro Dudek Kvar

la sendratan telefonon en sian poŝon kaj turninte sin al Betinjo diris per laŭeble plej gaja voĉo:

“Nu, kamaradeto, kion ni faru nun?”

“Mi vere ne scias,” ŝi respondis kun senkomprena vizaĝo. “Mi iomete bedaŭras ke niaj aventuroj finiĝis, ĉar mi ĝuis ilin, kaj nun post la foriro de Reĝino Kaj kaj ŝiaj kunuloj, kaj la foriro de Polikromo, kaj—ve!—kie estas Tiktoko, Viĉjo?”

“Ankaŭ li malaperis,” diris Vilulo, ĉirkaŭrigardante la kavernon kaj saĝe gestante per sia kapo. “Li jam estas en la palaco de Ozma en la Lando Oz, lia hejmo.”

“Ĉu ne ankaŭ via hejmo?” demandis Betinjo.

“Antaŭe ĝi estis hejmo por mi, kara; sed nun mia hejmo estas kie vi kaj mia frato estas. Ni estas vagantoj, sciu, sed se ni restos kune mi estas certa ke ni estos tre ĝuplenaj.”

“Sekve,” diris la knabino, “ni foriru el ĉi tiu senaera subtera kaverno kaj serĉu novajn aventurojn. Certe jam ĉesis pluvi.”

“Mi estas preta,” diris Vilulo, do ili adiaŭis Reĝon Kalikoton, kaj dankis lin pro lia helpo, kaj eliris al la buŝo de la koridoro.

La ĉielo nun estis klara kaj brile blua; la suno brilegis kaj eĉ tiu severa rokoplana lando aspektis bela post ilia subtera enkarceriĝo. Nun ili estis nur kvar—Betinjo kaj

Tiktoko de Oz

Hanĉjo, kaj Vilulo kaj lia frato—kaj la grupeto marŝis suben laŭ la monto kaj sekvis nekularan padon kiu kondukis sudokcidenten.

Dume Ozma konferencis kun la Sorĉisto, kaj poste kun Tiktoko, kiun la magio de la Sorĉisto estis rapide transportinta al la palaco de Ozma. Tiktoko estis plena de laŭdoj pri Betinjo Bobin, “ki-u,” li diris, “es-tas pres-kaŭ e-ga-le pla-ĉa ki-el Do-ro-te-o mem.”

“Ni venigu Doroteon,” diris Ozma, kaj alvokinte sian plej amatan servistinon, nomitan Ĵelea Konfitaĵ*, ŝi petis ŝin peti Princinon Doroteon veni jam tuj. Do kelkajn momentojn poste Doroteo eniris la ĉambron de Ozma kaj salutis ŝin kaj la Sorĉiston kaj Tiktokon kun la sama humila rideto kaj simpla mieno kiu akiris por la knabineto la amon de ĉiu renkontito.

“Ĉu vi volas min, Ozma?” ŝi demandis.

“Jes, kara. Mi ne scias kion fari, kaj mi deziras vian konsilon.”

“Verŝajne ĝi ne multon valoros,” respondis Doroteo, “sed mi agos laŭeble. Pri kio temas, Ozma?”

“Vi ĉiuj scias,” diris la knabina Reganto, parolante al siaj tri amikoj, “kiom dubebone estas venigi mortipovulojn en ĉi tiun felandon Oz. Estas vere ke mi invitis plurajn mortipovulojn hejmlaŭ ĉi tie, kaj ili ĉiuj montriĝis fidindaj kaj lojalaj regatoj. Efektive, neniu el vi tri estas indiĝena

Ĉapitro Dudek Kvar

Ozano. Doroteo kaj la Sorĉisto venis ĉi tien el Usono, kaj Tiktoko venis el la Lando Ev. Sed kompreneble li ne estas mortipovulo. Vilulo estas alia Usonano, kaj li kaŭzis mian maltrankvilon, ĉar nia kara Viĉjo rifuzas reveni ĉi tien kaj tiel dizerti la novajn amikojn kiujn li trovis en siaj lastatempaj aventuroj, ĉar li kredas ke ili bezonas lian helpon.”

“Vilulo de ĉiam estas bonkora,” komentis Doroteo. “Sed kiuj estas la nove trovitaj amikoj?”

“Unu estas lia frato, kiu dum multaj jaroj estis kaptito de la Reĝo de la Knomoj, nia malnova malamiko Ruggedo. Tiu frato ŝajnas afabla honestulo, sed li faris nenion kio meritigus ke li ricevu hejmon en la Lando Oz.”

“Kaj kiu alia?” demandis Doroteo.

“Mi menciis al vi Betinjon Bobinon, la knabineton kies ŝipo pereis—tre simile al vi, iam—kaj de tiam ŝi akompanas la Vilulon dum lia serĉo je sia perdita frato. Vi memoras ŝin, ĉu ne?”

“Ho, jes!” krietis Doroteo. “Mi ofte rigardis ŝin kaj Hanĉjon per la Magia Bildo. Ŝi estas kara knabineto, kaj olda Hanĉjo estas karulo! Kie ili nun estas?”

“Rigardu,” respondis Ozma ridetante pro la entuziasmo de ŝia amikino.

Doroteo turnis sin al la bildo, kiu montris Betinjon kaj Hanĉjon, kun Vilulo kaj lia frato, promenantaj laŭ la rokoplennaj vojoj de dezerta lando.

Tiktoko de Oz

“Ŝajnas al mi,” ŝi diris, kontempleme, “ke ili estas multe malproksime de bona dormloko aŭ ia bona manĝaĵo.”

“Vi pra-vas,” diris Tiktoko. “Mi jam es-tis en ti-u lan-do, ĝi es-tas de-zer-to.”

“Ĝi estas la lando de la knomoj,” klarigis la Sorĉisto, “kiuj estas tiom petolemaj ke neniu volas loĝi proksime al ili. Mi anticipas ke Viĉjo kaj liaj amikoj suferos multajn malfacilaĵojn antaŭ ol foriri el tiu rokoplana loko, krom se—”

Li turnis sin al Ozma kaj ridetis.

“Krom se mi petos ke vi transportu ilin ĉiujn ĉi tien?” ŝi demandis.

“Jes, via Moŝto.”

“Ĉu via magio povus fari tion?” demandis Doroteo.

“Mi kredas ke jes,” diris la Sorĉisto.

“Nu,” diris Doroteo, “rilate al Betinjo kaj Hanĉjo, mi volonte havus ilin ĉi tie en Oz. Estus tre agrable havi knabinan kunludanton miaaĝan, komprenu. Kaj Hanĉjo ja estas tre kara muleto!”

Ozma ridis pro la sopirema esprimo en la okuloj de la knabino, kaj poste ŝi tiris Doroteon al si kaj kisis ŝin.

“Ĉu mi ne estas via amiko kaj kunludanto?” ŝi demandis.

Doroteo ruĝiĝis.

“Vi scias ke mi elkore amas vin, Ozma!” ŝi kriis. “Sed vin tiom okupas la regado de ĉi tiu granda Lando Oz ke ni ne povas ĉiam esti kune.”

Ĉapitro Dudek Kvar

“Mi scias, kara. Mia unua devo temas pri miaj regatoj, kaj mi kredas ke estus ĝojige al ni ĉiuj se Betinjo estus kun ni. Estas bela ĉambraro tuj kontraŭ via kie ŝi povos loĝi, kaj mi konstruos oran stalon por Hanĉjo en la stalaro kie loĝas la Segĉevalo. Ni konatigos la mulon al la Malkuraĝa Leono kaj la Malsata Tigro, kaj mi estas certa ke ili baldaŭ fariĝos firmaj amikoj. Sed mi ne povos venigi Betinjon kaj Hanĉjon al Oz se mi ne ankaŭ venigos la fraton de Viĉjo.”

“Kaj, se vi ne venigos la fraton de Viĉjo, ankaŭ restos ekstere povra Viĉjo kiun ni ĉiuj multe amas,” diris la Sorĉisto.

“Nu, ki-al ne ve-ni-gi li-n?” demandis Tiktoko.

“La Lando Oz ne estas rifuĝejo por ĉiuj suferantaj mortipovuloj,” klarigis Ozma. “Mi ne volas esti malafabla al Viĉjo, sed lia frato ne rajtas peti komplezon de mi.”

“La Lando Oz ne estas dense loĝata,” sugestis Doroteo.

“Do vi konsilas min alvenigi la fraton de Viĉjo?” demandis Ozma.

“Nu, ni ja ne volas perdi Vilulon, ĉu?”

“Tute nel!” respondis Ozma. “Kion vi opinias, Sorĉisto?”

“Mi pretigas mian magion por transporti ilin ĉiujn.”

“Kaj vi, Tiktoko?”

“La fra-to de Vi-lu-lo es-tas bo-nu-lo, kaj ni ne-pre ne per-du Vi-lu-lo-n.”

Tiktoko de Oz

“Do, estas decidite,” konkludis Ozma. “Faru la magion, Sorĉisto!”

Li metis arĝentan teleron sur malgrandan tenilon kaj verŝis sur la teleron malgrandan kvanton da palruĝa pulvoro kiu estis en kristala flakoneto. Post tio li murmuris iom malfacilan sorĉkanton kiun la Sorĉistino Glinda la Bona instruis al li, kaj ĉio finiĝis per nubeto de parfumita fumo kiu estis tiom irita ke kaj Ozma kaj Doroteo devis fronti siajn okulojn dum momento.

“Bonvolu pardoni la malagrablan fumon,” diris la Sorĉisto. “Mi certigas al vi ke la fumo estas vere necesa parto de mia sorĉarto.”

“Vidu!” kriis Doroteo, indikante la Magian Bildon, “ili malaperis! Ili ĉiuj malaperis.”

Efektive la bildo nun montris la saman rokoplenan pejzaĝon kiel antaŭe, sed la tri homoj kaj la mulo ne plu videblis en ĝi.

“Ili malaperis,” diris la Sorĉisto, polurante la arĝentan teleron kaj vindante ĝin per delikata ŝtofo, “ĉar ili estas ĉi tie.”

Tiumomente Ĵelea Konfitaĵ eniris la ĉambron.

“Via Moŝto,” ŝi diris al Ozma, “Vilulo kaj alia viro estas en la atendoĉambro kaj volas saluti vin. Viĉjo ploras kiel bebo, sed li diris ke temas pri ĝojlarmoj.”

“Sendu ilin ĉi tien tuj, Ĵelea!” ordonis Ozma.




Tiktoko de Oz

“Ankaŭ,” pludiris la servistino, “knabino kaj malgrandaspeca mulo mistere venis, sed ŝajne ili ne scias kie ili estas nek kiel ili venis ĉi tien. Ĉu mi sendu ankaŭ ilin ĉi tien?”

“Ho, ne!” kriis Doroteo, fervore saltante de sia seĝo; “mi mem iros renkonti Betinjon, ĉar ŝi multe konfuziĝos en ĉi tiu granda palaco.”

Kaj ŝi subenkuris la ŝtupojn po du por saluti sian novan amikino, Betinjon Bobinon.





ĈAPITRO 25

La Am-Areo

“NU, ĉu ‘Hi-ha!’ estas via sola parolo?” demandis la Segĉevalo, ekzamenante Hanĉjon per siaj tuberokuloj kaj malrapide svingante la branĉon kiun li uzis kiel voston.

Ili estis en bela stalo malantaŭ la palaco de Ozma, kie la ligna Segĉevalo—plene viva—loĝis en orpanela stalo, kaj kie estis ĉambroj por la Malkuraĝa Leono kaj la Malsata Tigro, plenaj de molaj kusenoj sur kiuj ili povis kuŝi kaj oraj trogoj el kiuj ili manĝis.

Apud la stalo de la Segĉevalo metiĝis alia por la mulo Hanĉjo. Ĝi ne estis egale bela kiel la alia, ĉar la Segĉevalo estis la plejamata rajdbesto de Ozma; sed Hanĉjo havis aron da kusenoj kiel liton (kiujn ne bezonis

Tiktoko de Oz

la Segĉevalo ĉar li neniam dormis) kaj tioma lukso estis nekonata de la muleto tiel ke li nur staris senmove kaj rigardis siajn ĉirkaŭaĵojn kaj siajn kunulojn miroplene kaj surprizite.

La Malkuraĝa Leono, aspektante tre digna, estis etendita sur la marmora planko de la stalo, okulumante Hanĉjon trankvile kaj kritike, kaj apude kaŭris la enorma Malsata Tigro, kiu aspektis egale interesata de la nove veninta besto. La Segĉevalo, rigide staranta antaŭ Hanĉjo, ripetis sian demandon:

“Ĉu ‘Hi-ha!’ estas via sola parolo?”

Hanĉjo movis siajn orelojn embarasate.

“Mi neniam diris ion alian antaŭ nun,” li respondis; kaj li komencis tremi pro timo aŭdante sin paroli.

“Mi bone komprenas tion,” komentis la Leono, balancante sian grandan kapon. “Strangaĵoj okazas en ĉi tiu Lando Oz, same kiel ĉie aliloke. Mi kredas ke vi venis ĉi tien de la malvarma, civilizita, ekstera mondo, ĉu ne?”

“El tie, jes,” respondis Hanĉjo. “Je unu minuto mi estis ekster Oz—kaj la sekvan minuton mi estis interne de ĝi! Tio sufiĉis por doni al mi nervoŝokon, certe vi komprenas tion; sed ke mi trovas min kapabla paroli same kiel Betinjo, tio estas mirigaĵo kiu alarmas min.”

“Estas ĉar vi estas en la Lando Oz,” diris la Segĉevalo.



Ĉapitro Dudek Kvin

“Ĉiuj bestoj parolas, en ĉi tiu favorata lando, kaj necesas agnoski ke estas pli amikeme ol muĝi vian aĉan ‘Hi-ha!’ kiun neniu komprenas.”

“Muloj tre bone komprenas,” deklaris Hanĉjo.

“Ĉu? Do mi supozas ke ekzistas aliaj muloj en via ekstera mondo,” diris la Tigro, oscedante dormeme.

“Estas multegaj en Usono,” diris Hanĉjo. “Ĉu vi estas la sola Tigro en Oz?”

“Ne,” agnoskis la Tigro, “mi havas multajn parencojn kiuj loĝas en la Ĝangala Lando; sed mi estas la sola Tigro loĝanta en la Smeralda Urbo.”

“Ekzistas ankaŭ aliaj Leonoj,” diris la Segĉevalo; “sed mi estas la sola ĉevalo, iaspeca, en ĉi tiu favorata Lando.”

“Tial ĉi tiu lando estas favorata,” diris la Tigro. “Komprenu, amiko Hanĉjo, ke la Segĉevalo fieras ĉar liajn hufojn kovras oraj platoj, kaj ĉar nia amata Reganto, Ozma de Oz, amas rajdi sur lia dorso.”

“Betinjo rajdas sur *mia* dorso,” deklaris Hanĉjo fiere.

“Kiu estas Betinjo?”

“La plej kara, plej dolĉa knabino en la tuta mondo!”

La Segĉevalo kolere snufis kaj stampfis per siaj oraj piedoj. La Tigro kaŭris kaj grumblis. Malrapide la granda Leono surpiediĝis, kaj liaj haroj hirtiĝis.

“Amiko Hanĉjo,” diris li, “aŭ via juĝkapablo eraras aŭ vi volas trompi nin. La plej kara, plej dolĉa knabino en

Tiktoko de Oz

la mondo estas nia Doroteo, kaj mi batalos iun ajn—ĉu beston ĉu homon—kiu aŭdacas nei tion!”

“Ankaŭ mi!” minacis la Tigro, montrante du vicojn de enormaj blankaj dentoj.

“Vi ĉiuj eraras!” asertis la Segĉevalo malestime. “Neniu knabino vivanta estas komparebla kun mia mastrino, Ozma de Oz!”

Hanĉjo malrapide turnis sin ĝis liaj kalkanoj frontis la aliajn. Li diris persiste:

“Mia deklaro ne eraras, nek mi agnoskos ke povas ekzisti pli dolĉa vivanta knabino ol Betinjo Bobin. Se vi volas batali, nur provu—mi estas preta!”

Dum ili hezitis, okulumante dube la kalkanojn de Hanĉjo, gaja rido surprizis la bestojn kaj turnante siajn kapojn ili vidis tri belajn knabinojn starantajn tuj interne de la riĉe ĉizita enirejo de la stalaro. En la centro estis Ozma, ŝiaj brakoj ĉirkaŭis la taliojn de Doroteo kaj Betinjo, kiuj staris ambaŭflanke de ŝi. Ozma estis preskaŭ duonan kapon pli alta ol la aliaj du knabinoj, kiuj estis preskaŭ samgrandaj. Neobservate, ili aŭskultis la konversacion de la bestoj, kio por malgranda Betinjo Bobin ja estis tre stranga sperto.

“Malsaĝaj bestoj!” krietis la Reganto de Oz, per milda sed riproĉa voĉo. “Kial batali por defendi nin, kiuj ĉiuj estas amantaj amikoj kaj neniel rivaloj? Respondu al mi!”

Ĉapitro Dudek Kvin

ŝi pludiris, dum ili klinis la kapojn ŝafece.

“Mi rajtas esprimi mian opinion, Via Moŝto,” plendis la Leono.

“Ankaŭ la aliaj,” respondis Ozma. “Min plezurigas ke vi kaj la Malsata Tigro plej amas Doroteon, ĉar ŝi estis via unua amiko kaj akompananto. Ankaŭ min plezurigas ke mia Segĉevalo plej amas min, ĉar kune ni spertis kaj ĝojon kaj malĝojon. Hanĉjo pruvis sian fidelecon kaj lojalecon defendante sian propran mastrineton; do vi ĉiuj pravas unumaniere sed malpravas alie. Nia Lando Oz estas Am-Areo, kaj ĉi tie amikeco superas ĉian alian kvaliton. Se vi ĉiuj ne povas esti amikoj, vi ne povas gardi nian amon.”

Ili akceptis tiun riproĉon tre humile.

“Bone,” diris la Segĉevalo, tute feliĉe. “Kunpremu hufojn, amiko Mulo.”

Hanĉjo tuŝis la hufon de la ligna ĉevalo per sia.

“Ni estu amikoj kaj kunfrotu la nazojn,” diris la Tigro. Do Hanĉjo modeste nazfrotis kun la granda besto.

La Leono nur kapgestis kaj diris, kaŭrante antaŭ la mulo:

“Ĉiu amiko de amiko de nia amata Reganto estas amiko de la Malkuraĝa Leono. Mi kredas ke tio inkluzivas vin. Se iam vi bezonos helpon aŭ konsilon, amiko Hanĉjo, petu de mi.”

Tiktoko de Oz

“Nun, tiel devas esti,” diris Ozma, al kiu tre plaĉis vidi ilin plene reamikiĝintaj. Ŝi turnis sin al siaj akompanantoj: “Venu, karuloj, ni rekomencu promeni.”

Dum ili forturnis sin Betinjo demandis mirante:

“Ĉu ĉiuj bestoj en Oz parolas kiel ni?”


“Preskaŭ ĉiuj,” respondis Doroteo. “Estas flava Kokino ĉi tie, kaj ŝi povas paroli, ankaŭ ŝiaj kokidoj; kaj estas Palruĝa Katido supre en mia ĉambro kiu tre bele parolas. Sed mi havas malgrandan vilan nigran hundon nomitan Toto, kiu delonge estas kun mi en Oz, kaj lia sola parolo ĉiam estas nur ‘Boj! Boj!’”

“Ĉu vi scias la kialon?” demandis Ozma.

“Nu, li estas Kansasa besto, do mi s’pozas ke li diferencas de la febestoj,” respondis Doroteo.

“Ankaŭ Hanĉjo ne estas febesto, ne pli ol Toto,” diris Ozma, “sed tuj kiam li eniris la sorĉon de nia felando li trovis sin kapabla paroli. Estis same pri Vilĉinjo, la flava Kokino kiun vi kunportis iam. La sama sorĉo trafis Toton, mi certigas al vi; sed li estas saĝa hundeto kaj kvankam li komprenas ĉion diratan al li li preferas ne paroli.”

“Jadi!” krietis Doroteo. “Mi tute ne s’pektis ke Toto trompas min.” Ŝi tiris malgrandan arĝentan fajfilon el poŝo kaj sonigis akran noton per ĝi. Post momento ili aŭdis la sonon de rapidantaj paŝetoj, kaj vila nigra hundo kuradis al ili sur la vojo.



Tiktoko de Oz

Doroteo surgenuiĝis antaŭ li kaj skuante fingron ĝuste super lia nazo ŝi diris:

“Toto, mi ĉiam ame traktis vin, ĉu ne?”

Toto rigardis ŝin per siaj brilantaj nigraj okuloj kaj svingis sian voston.

“Boj! Boj!” li diris, kaj Betinjo tuj sciis ke tio signifas jes, ankaŭ Doroteo kaj Ozma sciis tion, ĉar ne eblis miskompreni la tonon de la voĉo de Toto.

“Tio estas hunda respondo,” diris Doroteo. “Ĉu plaĉus al vi, Toto, se mi dirus al vi nur la parolon ‘boj, boj’?”

La voston Toto nun svingegis, sed li silentis plu.

“Vere, Doroteo,” diris Betinjo, “li povas paroli per sia bojo kaj sia vosto same bone kiel ni. Ĉu vi ne komprenas tian hundolingvaĵon?”

“Certe mi komprenas,” respondis Doroteo. “Sed Toto devas fariĝi pli konversaciema. Jen, sinjoro!” ŝi pludiris, parolante al la hundo, “mi ĵus unuafoje sciiĝis ke vi povas paroli vortojn—kiam vi volas. Ĉu vi volas, Toto?”

“Vuf!” diris Toto, kaj tio signifis “ne”.

“Eĉ nur unusolan vorton, Toto, por pruvi ke vi estas egale bona kiel ĉiu alia besto en Oz?”

“Vuf!”

“Nur unu vorton, Toto—post tio vi povos forkuri.”

Li rigardis ŝin rigide dum momento.

Ĉapitro Dudek Kvin

“Bone. Mi forkuras!” li diris, kaj forkuris rapide kiel sago.

Doroteo kunfrapis siajn manojn pro ĝojo, dum Betinjo kaj Ozma ambaŭ ridegis pro ŝia plezuro kaj la sukceso de la eksperimento. Brak'-en-brake ili forpromenis tra la belaj ĝardenoj de la palaco, kie grandiozaj floroj abunde kreskas kaj fontoj sendas siajn arĝentajn akverojn en la altan aeron. Kaj post nelonge, dum ili ĉirkaŭiris angulon, ili trovis Vilulon kaj lian fraton, kiuj sidis kune sur ora benko.

La duo levis sin respektoplene kiam la Reganto de Oz proksimiĝis al ili.

“Ĉu vi ĝuas nian Landon Oz?” Ozma demandis al la fremdulo.

“Mi estas tre feliĉa ĉi tie, Via Moŝto,” respondis la frato de Vilulo. “Kaj mi tre dankas vin pro via permeso ke mi loĝu en ĉi tiu plaĉega loko.”

“Danku Viĉjon pro tio,” diris Ozma. “Ĉar vi estas lia frato, mi bonvenigis vin.”

“Kiam vi pli bone konos Fraĉjon,” diris Vilulo fervore, “vi ĝojos ke li fariĝis unu el viaj lojalaj regatoj. Mi nur nun mem ekkonas lin, kaj mi trovas multon admirindan en lia karaktero.”

Forlasinte la fratojn Ozma kaj la knabino daŭrigis sian promenadon. Baldaŭ Betinjo ekkrietis:

Tiktoko de Oz

“La frato de Viĉjo ne povus esti egale feliĉa en Oz kiel *mi*. Ĉu vi scias, Doroteo, mi ne kredis ke knabino povas tiel ĝue loĝi—*ie ajn*—kiel ĉi tie nun?”

“Mi scias,” respondis Doroteo. “Ankaŭ mi tre ofte sentas tion.”

“Estus bonege,” pludiris Betinjo, reveme, “se ĉiu knabineto en la mondo povus loĝi en la Lando Oz; kaj ankaŭ ĉiu knabeto!”

Ozma ridis aŭdinte tion.

“Estas bonfortune por ni, Betinjo, ke via deziro ne estas plenumbla,” diris ŝi, “ĉar tiu giganta armeo da knabinoj kaj knaboj estus tiom amasa ke ni devus foriri.”

“Jes,” konsentis Betinjo, post iom da pripensado. “Mi supozas ke tio estas vera.”



·LA·
·FINO·

MAPO DE LA
LANDOJ
PROKSIMAJ AL
LA LANDO OZ

REGNO
IKS

NENILANDO

GAILLANDO

NETRANSIREBLA

SANGIGANTAJ
SABLOJ

LANDO DE LA
GILIKULOJ

ALLLANDO

BASLANDO

LANDO DE LA

MANGTULOJ

SMEBALDA
URBO

LANDO DE LA KVEL

GRANDA SABLĀ

FELICA VALO

ARBEJO
BYRZO

MIFKETOJ

T



